

L. N. NEWELL
BAKŠIŠ

BAKSIS



BARSTIS



L. N. N E W E L L

B A K Ŝ I Ŝ

SKIZOJ EL LA VIVO DE EGIPTOJ

NOVELARO

1938

LITERATURA MONDO, BUDAPEST

Ĉi tiu libro
estas la sepdek-tria
libro, eldonita de Literatura Mondo.

B A K Ŝ I Ŝ

Ni staris sur Bastiono de la Citadelo, alte en la vespera aero; sub la piedoj kuŝis Kairo, etendigante ĝis la sabloj de la horizonto, kie tranĉis la palbluan ĉielon la arogeme silentaj Piramidoj. Malantaŭ ni estis muroj kaj fortikaĵoj, konstruitaj de Napoleono, de la Mamelukoj, kaj de la granda Muhammad Ali; kaj en tiuj palacoj oni nun aŭdis la signalajn vokojn kaj la klarionojn de la anglaj soldatoj. Antaŭ ni staris la domoj de la kairaj milionoj: kunpremita amaso da verva, baraktanta vivo, senĉese luktanta por pano, por volupto, por feliĉo, por amo, por iom da ripozo. Sed nun silente; silente staris la sennombraj domoj kaj minaretoj, oraj kie lavis ilin la horizontalaj radioj de la suno, brune purpuraj en la ombroj kaj en la ombraj stratoj. Estis la horo de la vespera preĝo; kaj miloj da etaj fum-kolonetoj levigis al la blua zenito.

Ni turnis nin, kaj komencis senparole malsupreniri laŭ la serpenta vojo, suben en la pulsantan vivon. Ĉiam suben, stumblante tra tordita abismo el kastelmuroj, preter palpebrumantaj lanternetoj kaj la reflektoj sur la bajonetoj de gardostarantoj. Subite ni eliris el la lasta pordego, kaj ekiris laŭ la ankoraŭ klina strato. Ŝvebis ankoraŭ iom da lumo, sed la aero pli-

densiĝis, preskaŭ palpebla, kaj la homoj pasantaj estis misteraj blankaj ombroj. La urbo estis strange silenta.

Ni konsciis malantaŭ ni la gvatan bat-batadon de piedoj sur la strata polvo. Sekvis nin kelkaj knabinetoj en blankaj roboj, kies grandaj okuloj kaptis kaj spegulis la lastajn erojn de la lumo. Ili nenion diris, sed atente sekvadis. Ili plimultiĝis; baldaŭ estis deko, dudeko, multaj dekoj: ili ŝajne solidiĝis el la aero. Kaj tiam, kvazaŭ responde al signalo, ili ĉiuj kune komencis krii: »Bakŝiŝ, bakŝiŝ, bakŝiŝ!...« Nubanta, maldensa sono, senĉese ĉirkaŭanta nin; kvazaŭ horo el miloj da birdetoj, ekscititaj pro la proksimeco de la sunleviĝo. La son-nebulo volvis nin, kirliĝanta, leviĝanta, sinkanta; ŝajnis, ke la knabinetoj jam ne ekzistas, nur ilia akuta, delikata, birda krietado daŭris. Kvazaŭ ĝia netereca sono havis nenian rilaton kun sia tre praktika, tereca signifo.

Ni preskaŭ forkuris de tiu insista sono; ni rapidis laŭ la mallumaj, turniĝantaj stratoj; kaj tiam ni subite eskapis sur grandan placon, kie estis helaj lumoj, la kornobruoj de taksioj, kaj la familiaraj krioj de gazetvendistoj. La birdohoro refandiĝis en la ombrojn malantaŭe; kaj ni komencis paroli denove per normala voĉo.

EDZIĜPROPONO

La ŝipego nepercepteble proksimiĝis al la kajo. Fone, Port Said kuŝis plata, preskaŭ senkolora pro la blanka sunlumo de tagmezo. Etaj figuroj en galabioj diskuris senombre, sen videbla ordo aŭ celo.

Jam de du tagoj la vetero ĉiam pli varmiĝis, spite la marventon. Eĉ mia familiareco kun Egiptujo en aŭgusto ne estis povinta forigi neracian esperon, ke estos malpli varme surtere. Sed, kiel ĉiam antaŭe, Port Said tuj seniluziigis min; kaj mi malgajiĝis, pensante pri la longa relveturo al Kairo.

La tempo inter la eniro de l' ŝipo en la havenon kaj la surteriĝo de la pasaĝeroj estas ĉiam tedega; oni sentas sin perdita inter du vivoj: oni ne plu estas unu el la pasaĝeraro, oni jam adiaŭis kvartagajn konatojn, kiuj pluiras al Hindujo; sed oni ankoraŭ ne havas la liberecon kaj amuzaĵojn de terano. Mi ekpromenis laŭ la ferdeko, esperante trovi alian perditan animon, kun kiu pasigi ĉi tiun unuhoran hadeson.

Baldaŭ mi vidis grupon bone konatan, por kiu evidente la atendo ne estis teda: s-ino Molard, la franca vidvino, Madeleno Molard, ŝia filino, kaj juna egipto, la fianĉo de Madeleno. Ili avide rigardis ĉiun detalon de la diskurado sur la kajo, la egipto ĉar li unuafoje

en kvar jaroj revidis sian patrujon, la francinoj por ion scii pri sia nova hejmo.

Mi estis rimarkinta tiun grupeton jam en la haveno de Marsejlo. Kiam oni (aŭ, eble pli ĝuste, kiam anglo) suriras ŝipon, oni tuj observas la aliajn pasaĝerojn por vidi, kiujn oni devos eviti, kaj kiujn oni povos alparoli sen danĝero de tedado. Ĉiam (por anglo) la dua klaso estas multe pli malgranda, ol la unua. Alsin Molard mi tuj altiriĝis; ŝi estis parizano, kun la spriteco, energiaj opinioj kaj inteligenteco de siaj samurbanoj. Ŝi havis, supozeble, kvindek jarojn, kaj ŝiaj haroj estis jam grizaj; sed ŝi estis konservinta sian, firman karnon, ŝiaj mamoj ankoraŭ ne platiĝis, kaj ŝi havis rondajn brakojn, kiujn oni preskaŭ povus nomi belaj. Ŝiaj grandaj okuloj estis palgrizaj, rapidaj kaj komprenemaj. Mia restado ĉe la parizaj esperantistoj instruis al mi aprezi la francan spiriton; kaj spite la oftajn provincanecon kaj obstinon de la franca menso, mi sentis la bezonon, ofte min trempi en la franca animo, tiu kuraĝa, realista acido kiu ĉion provas. Mi do kaptis la okazon por alparoli sinon Molard kiam mi trovis min apud ŝi ĉe la manĝotablo, kaj ŝi varme respondis, precipe tial ke ni estis sur angla ŝipo, kaj mi estis preskaŭ la sola persono kiu parolis la francan lingvon.

Ŝi havis ne tre precizajn, sed vastajn konojn, kaj ĉion priparolis kun refreŝiga skeptikeco. Kiel decas al bone edukita francino de ŝia aĝo, ŝi estis ateisto, pacifisto dum oni ne atakas Francujon, kaj politike radikala, preskaŭ socialista. Kaj, ankaŭ kiel decas al francino de ŝia aĝo, ŝi parolis tre multe, en tre klara, bonstila franca lingvo; niaj konversacioj estis por mi granda plezuro.

Mi malpli ofte vidis Madelenon; tiutempe ŝi kompreneble tre okupiĝis pri sia fianĉo. Ŝi estis delikate formita, kun nigraj haroj, brunaj okuloj kaj tre pala haŭto. Ŝia korpo estis gracila, sed tro maldika, kaj ŝi estis tre platbrusta; ŝi portis okulvitrojn. Ŝi tiam havis proksimume dek-naŭ jarojn, kaj tre romantike amis sian egipton.

Ci tiu nomiĝis Muhammad Abd er-Rahman, sed Madeleno kaj ŝia patrino ĉiam nomis lin *Moaméd*, kun tiu franca provinceco, kiu ĉiam misprononcas fremdajn nomojn, kaj firme kredas, ke la vera nomo de la itala pentristo estas Le Corrège, kaj nur malkleraj italoj nomas lin Correggio. Muhammad estis bela junulo, dudek-kvarjara, alta, gracila, kun la larĝaj malgrasaj ŝultroj de egipto, kiujn akcentis la tajlora stilo de la Latina Kvartalo. Li tre franciĝis en Parizo, kaj oni povus kredi lin marsejlano. Mi ĝuste divenis lian historion; cetere, tia historio estas ne malofta ĉe parizaj studentoj, sed kutime finiĝas en pli frua stadio. Studento pri juro aŭ medicino loĝas en Parizo ĉe franca familio, kiu devas akcepti pensione gaston por streĉi siajn enspezojn ĝis la fino de la monato. En la familio estas filino: parizanino, kiun la egiptoj imagas al si la fonto de ĉia volupta plezuro, kaj por kiu multaj interŝanĝus eĉ la huriojn de paradizo. Ili ekamas unu la alian; fianĉiĝas; post la studjaroj, la studento (egipta aŭ alia) reiras hejmen, por sciigi sian familion pri la edziĝo — kaj tie la afero finiĝas. Ke en tiu ĉi kazo ĝi iris ĝis la fino, tion mi atribuis al la forta karaktero de s-ino Molard.

Kiam mi rigardis Muhammad-on, kaj notis denove lian agrablan brunan vizaĝon, kun belegaj nigraj okuloj, blankegaj dentoj kaj iom mallonga mentono,

mi recertigis, ke nur la subtila insistado de Henrikinio, Molard povus doni al li la kuraĝon, prezenti fremdan, nemahometanan fianĉinon al siaj gepatroj. Certe, Madeleno ne havis sufiĉan forton por tio, kaj estus facile permesinta al sia kavaliro forkuri. Madeleno estis inteligenta; nure, ŝia patrino monopolis la energion de la familio.

Mi aliris al ili apud la pavezo, kaj salutis s-inon Molard arablingve por ŝin inciteti: ŝi neniam volis lerni tiun lingvon, eĉ por kunvivado kun egipta familio, kaj post kvarjara restado en Egiptujo ŝi ankoraŭ parolis nur tri vortojn, kun fortega franca akcento. Ĉu mi ne diris, ke ŝi estas vera francino?

»Saidah, ja sit! Inti mabsuta delüa'ti? Saluton, O virino, ĉu vi estas nun kontenta?«

»Se tio volas diri, ke mi ĝojos foriri de la ŝipo, mi jam ne estas certa. Sur la maro oni ĉiam povis esperi ŝtormon kun malvarma pluvo, sed tie ĉi eĉ glaso da hiero vaporigis inter tablo kaj buŝo. Vi ne povas imagi al vi, s-ro Mansell, kiom mi sopiras al la koto kaj pluvo de Parizo. Mi eĉ ŝatus vane atendi malplenan aŭtobuson *Al bis*, dum la gutoj ruliĝas de kolumo al kalsono.«

»Sed, *mamam!*«, diris Madeleno, »ĉu vi ne memoras viajn blasfemojn pri la malvarma kaj malseka vetero? Vi ĉiam diris, ke vi preferus iri inferen, ol sidi sur malsekaj nuboj en la ĉielo?«

»Opinioj, preferoj — ili estas nur geografiaj demandoj. Cetere, ne estas dece, ke filino malkaŝu la nekonsekvencecon de sia patrino.«

»Vi trovos la egiptajn domojn tre malvarmaj,« interrompis Muhammad. »Multaj havas tre dikajn mu-

rojn, kaj la fenestroj estas ĉiam fermataj dum la varma parto de la tago.«

Sencele, mi demandis al mi, kiel li diris »egiptaj domoj«, anstataŭ »mia — aŭ: nia — domo«. Mi supozis, ke li ne kuragis averti la familion, ke li revenos kun estonta edzino; kaj antaŭtimante malpacojn, li ne volis turni siajn pensojn al sia hejmo eĉ en tia banala frazo. La timema menso scias sin protekti de la turmentaj aludoj.

Je tiu momento mi vidis la portistojn grimpantaj sur la ŝipon, kaj mi aŭdiaŭis miajn kunulojn, promesante retrovi ilin sur la vagonaro ironta al Kairo. Mi ne proponis helpon, ĉar Muhammad ja kapablis pli efike kaj malpli kare laborigi egiptan portiston, ol mi.

Post la polva lukto de la doganejo, mi iris kun malsekaj vestoj al la vagonaro, kaj facile retrovis miajn amikojn, kiuj, dank' al la arablingvaj malbenoj de Muhammad, estis liberigintaj pli frue ol mi. S-ino Molard kaj Madeleno sentis varmegaj, kaj ŝvitis, sed kiam la vagonaro ekiris, ili rapide revivigis por vidi la novan, misteran landon.

Por tiu, kiu devos vivi longe en Egiptujo, ne estas bone eniri la landon tra Port Said. Pli bona estas Aleksandrio; de tie oni laŭiras la Nilan valon, kaj ĉie vidas verdegajn kampojn, gracie altajn palmojn, bubalojn, vilaĝojn romantikajn kaj sufiĉe malproksimajn por ke oni ne vidu la malriĉecon de la enloĝantoj; mal-longe, de tiu relvojo oni vidas nur tion, kion montras la turistaj poŝtkartoj.

Sed irante de Port Said, oni devas trapasi dezerton; senfinan, senkoloran, senvivan; oni ne vidas eĉ unu karavanon kun kameloj kaj tintantaj sonoriloj.

Sed oni vidas kelkajn urbojn de proksime, el kiuj la plej granda estas Zagazig. Mi konfesas, ke mi neniam vidis Zagazig-on krom de kupea fenestro; eble ĝi estas agrabla urbo. Sed vidate de vagonaro, ĝi estas timiga: kunpremiĝantaj domoj el kothrikaj, ĉio griza, fenestroj ofte senvitraj, apenaŭ unu palmo por variigi la monotonecon. Kaj muŝaro eniras la vagonon, egiptaj muŝoj, kiuj ne kutimas esti forpelataj, kaj tute simple rifuzas foriri de oniaj buŝo kaj okuloj. Eble sur la perono oni vidas la bebon de malriĉulino, kun dekoj da muŝoj algluitaj al ĝiaj okuloj, kiujn nek la patrino, nek la infano pensas forviŝi. Kaj oni estas surdigata de la kriegoj de portistoj, limonadvendistoj, knaboj, kiuj ŝajne utilas por nenio krom pliintensigi la bruon. Oni preskaŭ svenas en la senaera stacidomo, kaj oni subite konstatas, ke oni estas en tre, tre fremda lando, el kies lingvo oni komprenas eĉ ne unu vorton, kaj oni sentas sin senpova kaj tre vundebla antaŭ ĉiu eventuale danĝera konato. En tiu momento, oni sin demandas, ĉu valoras vojaĝi, kiam oni povus trankvile resti hejme.

Jen la unua impresio; tute falsa, aŭ pli ĝuste, tre unuflanka: Egiptujo estas vere bela kaj gastama lando, kie ekzilitoj kredeble povas vivi pli feliĉe, ol en tre multaj aliaj landoj. Sed kiel tion povas scii la noveveninto? Kiel li povas scii, ke li baldaŭ ekamos la landon, kaj ĝin forlasinte, ĉiam sopiros reveni? Li konscias nur varmon, kaj muŝojn, kaj polvon, kaj nekompreneblajn frazojn, kaj lia koro peziĝas.

Mi observis la francinojn, kaj povis vidi la kutiman efikon de tiu veturo; mi bone komprenis la sperton, ĝin trapasinte mem antaŭ kelkaj jaroj. Muhammad evidente ne komprenis tion, kion ili sentis; por li ĝi estis lando konata, hejmlando — kaj kiu konscias

la bonaĵojn kaj malbonaĵojn de sia propra lando, aŭ ties efikon sur la fremdulo?

Mi provis forigi la malgajon, parolante pri la belaj grandaj butikoj de Kairo, kie oni povas aĉeti parizajn robojn; pri la ŝikeco de la urbaninoj; pri la parkoj, kaj la belaj pejzaĝoj apud Nilo. Tiu gvidista parolado ne multe feliĉigis ilin, sed almenaŭ ĝi fortiris ilian atenton de la terura dezerto ĉiam forradanta preter la kupea fenestro.

Post unu-du horoj la suno subiris, kun ĉiuj koloroj nekredeblaj de la turista poŝtkarto, la giganta egipta luno argentis, kaj la aero malvarmetiĝis. Baldaŭ ni komencis trairi kampojn, kaj povis vidi la lumetojn, briletantajn en la kabanoj de la vilaĝoj. Tio estis por la ekzilitoj la plej bona medikamento: la mondo aspektis al ili pli familiara kaj pli komforta: ili komencis reordigi siajn harojn kaj forventumi la polvon de siaj vestoj. Madeleno reruĝigis siajn lipojn.

Mi adiaŭis ilin en la stacidomo de Kairo, sed zorgis havigi al mi ilian adreson, kaj ankaŭ la permeson de Muhammad, ke mi vizitu ilin. Mi sciis, ke ili konas nenium krom Muhammad, ke ĉi ties familio parolas nur la araban lingvon, kaj ke la francinoj urĝe bezonas paroli kun iu ajn eŭropano post kelkaj tagoj. Eĉ se oni estas feliĉa kun fremduloj, oni nepre devas paroli kelkfoje kun samlandanoj; kaj por ili, meze de egiptoĵ, franceparolanta anglo estis samlandano.

Revidante miajn amikojn, preparante mian laboron por la estontaj monatoj, mi forgesis ilin dum kelka tempo; sed post unu semajno, mi trovis min libera unu posttagmezon, kaj decidis utiligi la permeson de Muhammad. Mi serĉis ilian adreson en mia notlibreto, kaj rimarkis, ke la domo situas en la plej

malnova parto de la urbo, tio estas, la malplej eŭropanea. Tio jam maltrankviligis min, ĉar eĉ tiu, kiu konas kaj amas Egiptujon, se li estas eŭropano ne povas feliĉe vivi en tiuj mallargaj, dense enloĝataj kvartaloj. Mi ektimis, ke mi trovos ilin sur tiel malgajaj, sed la realo superis mian supozon.

Mi paŝis zorge tra la senaeraj, senpavimaj stratoj. Ĉiuflanke troviĝis butiketoj, sur kiuj sidis turke vendistoj, fumantaj senfinajn cigaredojn. De tempo al tempo mi devis paŝi en pordotruon por ne esti renversita de la korbegoj portataj de trotanta azeno aŭ kamelo. Mi preterpasis multajn moskeojn, pli bone zorgatajn ol la domoj, kun la plej delikataj arabaj desegnoj ĉizitaj sur siaj muroj.

Ju pli mi proksimiĝis al la domo de Muhammad, des pli mallargaj iĝis la stratoj, kaj des pli ofenda estis laodoro de la rubo ĵetita sur la vojon. La domoj havis kvar-kvin etaĝojn, kaj oni vidis la sunlumon alte superkape; sur la strato oni marŝis en eterna ombro.

La domo estis granda, kvaretaĝa kiel la aliaj; konstruita el brikoj kun stuko, sur kiu oni reprezentis brikojn per kradlinioj kaj la nigrajn kaj blankajn ŝtonojn de araba arkaĵo. Demandinte, mi trovis la apartamenton sur la dua etaĝo; la ŝtuparo kiun mi supereniris estis delonge nelavita, kaj multaj ŝtupoj estis rompigitaj.

Mi frapis sur la pordo du-trifoje, sen rezulto. Fine, venis kaj ĝin malfermis dek centimetrojn juna knabo, en galabijo malpura; li rigardis min senesprime kelkajn sekundojn, kaj refermis la pordon. Konante tiun kutimon, mi atendis pacience ankoraŭ kvin minutojn, kaj tiam la knabo revenis por diri, ke mi eniru. Li montrogestis min en saloneton, kaj min lasis tie. Tipa

ĉambro de la meza klaso egipta: senpolura trabplanko, tre pura, kun kelkaj persaj tapiŝoj; eŭropaj seĝoj, brakaj kaj senbrakaj, kaj unu kanapo, ĉiam kovritaj, per blankaj tolkovriloj, falantaj en rektaj linioj; muroj farbitaj blue, kun kelkaj familiaj fotoj, kaj du-tri sentimentalaj francaj poŝtkartoj, montrantaj geamantojn, kapon ĉe kapo, kun tre idiotaj esprimoj. Sur kadroj, rozkoloraj kaj blankaj bantoj; sur tablo kaj piano, multaj etaj brodaĵoj, tute senutilaj. Tiaj ĉambroj donas al eŭropano la impreson pri ekstrema malkomforto, malgraŭ la purecon kaj la multajn meblojn.

Mi ne atendis longe. Baldaŭ eniris junulo dekvinjara, videble frato de Muhammad. Li salutis min angle, kaj demandis, kion mi volas. Mi klarigis, ke mi deziras vidi s-ron Muhammad aŭ la francajn sinjorinojn.

»Jes, bone. Nu, mi ne scias, ĉu ili estas tie ĉi, mi iros vidi.«

Ci foje mi longe atendis, kaj mi baldaŭ komprenis la kialon. De malproksima ĉambro sonadis disputo kolera; mi aŭdis virajn voĉtonojn — verŝajne de Muhammad — kaj virinajn, rekoneble tiuj de s-ino Molard. De Madeleno mi nenion aŭdis. En mia ĉambro estis kompleta silento, eĉ la horloĝo sur la piano ne funkciis; nure, de tempo al tempo, la pordo malfermiĝis kelkajn centimetrojn, virina nazo enŝoviĝis dumono de sekundo, kaj tuj retiriĝis, kaj la pordo fermiĝis senbrue. La mahometanaj virinoj ja ne povas renkonti kaj alparoli la virajn vizitantojn, sed ili ne estas sen scivolemo pro tio.

Kaj mian scivolemon — ĝin mi malfacile mastris. Estas netolereble aŭskulti kverelon pri kiu oni eĉ ne scias la kaŭzon, kaj en kiun oni ne rajtas interveni.

Mi krucigis kaj rekrucigis miajn krurojn; volis fumi cigaredon, sed ne kuraĝis, ĉar en la ĉambro ne estis cindrujo. Tiel daŭris duonhoron.

Subite la bruo plilaŭtiĝis. Versajne oni malfermis pordon. Mi klare aŭdis la voĉon de s-ino Molard:

»*Monsieur Moaméd*, vi estas netolerebla. Estas hontinde! Vi trompis viajn gepatrojn, vi trompis min, vi trompis mian filinon. *Monsieur*, vi estas fripono!«

»Ha!« mi pensis, »Vi trompis *min*. La fianĉino ŝajne ne ludas gravan rolon.«

Paŝoj aŭdiĝis ekster la pordo, kaj envenis s-ino Molard, kun fajrerantaj okuloj kaj ruĝetaĵ vangoj. Ŝin sekvis Madeleno, kurbe, senbrue, kun ruĝaj okuloj. Oni apenaŭ rimarkis ŝin. Kaj post kelkaj sekundoj envenis ankaŭ Muhammad, kun pardonpeto kaj forglitemo esprimataj per ĉiu linio de lia korpo kaj ĉiu gesto.

S-ino Molard ne atendis por saluti. »S-ro Mansell, ĉu vi iam aŭdis pri afero simila! Tiu ĉi sinjoro (la senfunda malestimo en tiu *ce monsieur*!) tiu ĉi sinjoro amuzis sin per tre gaja ludo. Imagu al vi: li ne kredis necese, ke li informu siajn gepatrojn pri nia alveno. Fianĉino tute ne kalkuliĝas kiel gravaĵo!«

Ŝi marŝis tien kaj reen leone. Ŝi pugnigis siajn manojn, kaj momente mi ektimis pro Muhammad. Nekonsekvence mi rimarkis, ke eĉ en sia kolero ŝi parolis tre korektan, senslangan francan lingvon.

»S-ro Mansell, vi havas viajn sentojn pri la honoro. Eĉ post tiu fia ago, vi ne povas imagi al vi kion li faris al ni. Sinjoro, tiu bela sinjoro jam havas edzinon!«

Uf! Jen la afero; mi ja aŭdis pri similaj okazoj.

Mi ekrigardis Madelenon: ŝi sidis kun klinita kapo, sur la kanapo; ŝiaj manoj kuŝis renversitaj sur ŝiaj genuoj.

»Ĉu vi iam aŭdis similajn aferojn?« S-ino Molard sin turnis subite al Muhammad, kiu sin retiris. »Kaj vi, se vi kredas, ke vi povas fari tiajn mal-honestajojn, se vi kredas, ke tia konduto decas al bone edukita persono, permesu al mi vin informi, sinjoro, ke vi eraras!«

Muhammad suprenlevis la ŝultrojn kaj ridetis, laŭ la kutimo de egiptoj, kiuj volas sin senkulpigi, kaj diris »Ma'aliŝ!«

Inter siaj mil aliaj signifoj, tiu vorto *ma'aliŝ* signifas ankaŭ »ĝi ne gravas« aŭ »pardonu«; sed ĝia ĉiama efiko ĉe koleraj eŭropanoj estas tute senvortigi ilin pro kolero. Tiel ĝi efikis ĉe s-ino Molard; ŝi marŝis al la fenestro, levis la brakojn, kaj sufokate diris: »Mia Dio, mia Dio, mia Dio!«

Muhammad kaptis la okazon por diri al mi »Permesu!« kaj eliris el la ĉambro. Reveninte de la fenestro, s-ino Molard ŝajnis iom trankviliĝi; la ĉesto de Muhammad estis nur ĵetinta pluan karbon sur la fajron. Madeleno restis senmova; ŝi ŝajne ne rimarkis la foriron de Muhammad.

Iom post iom, el la vortoj de s-ino Molard, mi komprenis, kio okazis. La gepatroj de Muhammad ne sciis eĉ la tagon de lia alveno en Kairo, kaj kiam li kun la francinoj eniris la domon, ilin renkontis senkomprena silento, baldaŭ sekvata de senvorta malaprobo. La veturo tra la mallarĝaj stratoj, kaj la kreskanta malbonodoro, sufiĉe malgajigis la sinjorinojn; tia akcepto, kaj la konstato, ke eĉ ne estas por ili litoj en la domo, tute platigis ilin. Oni lasis ilin solaj en la saloneto, kaj ili pasigis du-tri malsatajn horojn, aŭs-

kultante la kvereladon en apuda ĉambro. Mallumiĝis; oni ne alportis lampon; ili ekdormis sur seĝoj. Fine, Muhammad alportis kelkajn egiptajn mangaĵojn kaj kafon; oni de ie trovis kelkajn lantukojn, kaj ili kuŝiĝis unu sur la kanapo, kaj la alia sur la planko. Ili estis tiom lacaj, ke ili ne povis postuli eksplikojn.

»Vi komprenas bone«, daŭrigis s-ino Molard, »ke la proksiman matenon mi volis scii pri kio temas. Nu, li diris, ke liaj gepatroj baldaŭ al kutimiĝos al la afero, kaj ni devas pacienciĝi. Mi bone varmigis liajn orelojn, sed kion vi volas? Ni devis akcepti. Li montris al ni du-tri ĉambrojn de la domo, sed gvidis tiel, ke en aliajn ni ne iru. Tiam mi ne suspektis la kialon. Li denove prezentis al ni sian patron, sed tio ne multe utilis; li ne komprenis la francan lingvon, kaj mi eĉ ne povis plendi al li.«

Ŝi silentis momenton, kolere revivante tiujn scenojn.

»Ni restis en tiu ĉi ĉambro preskaŭ la tutan tempon. Ni ne povis eliri la domon, ĉar ni ne konis la urbon kaj ne parolis la lingvon. Kaj ja ne temis pri promeno kun tiu honorindulo, sinjoro Muhammad! Mi diris al Madeleno, ke ŝi ne plu povas ami tiun friponon, kaj ju malpli ni vidas lin, des pli bone!«

Sin interrompis timema frapeto ĉe la pordo, kaj la plej juna frato eniris, portante pleton kun tri tasetoj da kafo kaj tri glasoj da akvo. Eĉ meze de interna milito, egipta familio ne povas forgesi siajn gastamajn devojn. S-ino Molard senpense prenis sian, kaj ankaŭ Madeleno trinketis.

»Tiel daŭris ĝis hodiaŭ matene«, reparolis s-ino Molard. »Mi estis scivolinta, kial oni ne permesis al ni eniri la aliajn ĉambrojn, kaj kial oni kuris por

fermi pordojn, aŭ iun foraverti, ĉiufoje kiam ni ekpaŝis en la koridoron. Ĉi matene, post demandado, li iom post iom konfesis, ke li estas tute libera por edziĝi al Madeleno, sed ke estas ia ĝenetajo — neniel grava! — li jam havas edzinon egiptan. Li edziĝis antaŭ ol foriri al Francujo.»

Mi demandis, kiam ili intencas reiri al Parizo; evidente, ili ne plu povus konsideri edziĝon kun Muhammad.

»Al Parizo? Mi tion volus! Sed, sinjoro, mi elspezis miajn lastajn centimojn por la vojaĝo kaj la necesaj vestoj! Mi konservis sufiĉe por mia reiro, sed, kiel vi rimarkas, ni estas jam du por reiri. Se mi vidos Francujon denove, mi estos dankema!«

Mi demandis pri parencoj, amikoj, en Francujo; pri helpo flanke de la franca konsulo.

»Pardonu, sinjoro, sed ĉu mi estas almozulino? Ĉu mi akceptos helpon de homoj kiujn mi plejparte malestimas? Nu, ne! Ni devos mem eltiri nin el tiu ĉi afero. Sed mi plendos al mia konsulo, mi skribos al influaj homoj, oni faros bruon pri tiu ĉi skandalo! Jen la rezulto de tiu malsaĝaĵo, enpermesi ĉiajn barojn en Francujon!«

Mi provis mildigi ŝian koleron. Mi klarigis, ke Muhammad estas mahometano, kiu ja rajtas havi samtempe kvar edzinojn. Estas vere, ke la modernemaj, edukitaj egiptoj tre malofte havas pli ol unu, tamen, Muhammad, laŭ sia moralkodo, faris nenion prihontindan, nenion kontraŭlegan. Sed nenio povis mildigi ŝian indignon; cetere, mi ne tro multe insistis: la indigno estas tre bona bazo por la kuraĝo, kaj mi antaŭvidis, ke ŝi bezonos multe da kuraĝo. Tamen, mi ne menciis mian suspekton, ke ŝi mem grandparte

kulpas; mi imagis, ke estis ŝi, pli ol Muhammad, kiu persvadis Madelenon al edziĝo; ke nur pro timo al ŝi Muhammad daŭrigis la aferon ĝis vojaĝo al Egiptujo, kaj ne kuraĝis konfesi la veron pli frue.

Si informis min, ke ŝi intencas resti en tiu domo por ioma tempo, pagante luon de la ĉambro el sia malmulta havaĵo, kaj serĉi laboron kiel tajlorino por sinjorinoj; jam ŝia profesio en Parizo. Si ne plu estis ekscitita, sed mi vidis en ŝi brulantan kuraĝon kaj decidemon, kaj mi ne plu timis pro ŝi.

Pri Madeleno mi estis sufiĉe maltrankvila. Dum nia interparolado, s-ino Molard kaj mi forgesis pri ŝi — la persono plej koncernata en la afero: fakto signifoplena. Estis io, pli grava ol la nuna ŝoko, seniluziĝo, malfeliĉo: rigardante ŝin, mi sentis, ke la risorto en ŝi rompiĝis. Si kvazaŭ nevidebliĝis en la ombro de sia patrino: malsaneca stato por ĉia ajn fraŭlino.

Nu, mi nenion povis, krom viziti ilin de tempo al tempo, kaj diskrete flustri ion pri ili al miaj konatinoj, por ke ili mendu ĉe s-ino Molard siajn robojn. Tion ili efektive komencis fari, ĉar ŝi havis la bonan guston, la modecon de la parizanino; kaj ŝiaj roboj ne estis multkostaj.

Eĉ la parencinoj de Muhammad mendis ĉe ŝi robojn, post senfina marĉandado, ĉar ankaŭ la mahometana virino kiu neniam eliras sen vualo, scias pri la parizaj manieroj, kaj nur malofte havas la okazon fariĝi ilin ĉe ververa pariza modistino.

Inter la Molard-oj kaj la familio de Muhammad stariĝis ia militpaŭzo; ili neniam estis amikoj, sed ili tolere traktis unuj la aliajn. Unufoje, kiam mi iris al la domo, mi trovis kun ili egiptan kuraciston, kiu, studinte la medicinon en Parizo, parolis la francan

lingvon tre flue. Li estis onklo de Muhammad: viro altstatura, proksimume kvindek-kvinjara, kun grizaj haroj, maljunula voĉo, kiu tamen portis sin tre rekte. Li ĉiam surprizis min kiam li parolis: lia aspekto, kun fezo, estis la aspekto de egipto, sed la opinioj esprimataj estis la senreligiaj, skeptikaj opinioj de franco. Alian fojon mi tie renkontis egipto-judan advokaton, kies amatino aprezis la laboron de s-ino Molard; aŭ unu el tiuj virinoj, oftaj en Kairo, kiuj povus esti italaj, francaj, sirianaj, grekaj aŭ judaj, kiuj parolis la specialan francan lingvon de Kairo, kun tute speciala kaj abomeninda akcento.

Tamen, mi neniam renkontis ĉe s-ino Molard francojn; mi suspektas, ke ŝi intence evitis ilin, por eviti samtempe help-proponojn kaj kompaton.

Post kelkaj monatoj, kun la kunlaborado de Madeleno, kiu ankaŭ estis kompetenta kudristino, ŝi havis sufiĉe grandan klientaron por translokigi sin al la eŭropa kvartalo, kie la stratoj estas larĝaj kun multaj arboj, kaj kie loĝas la serĉindaj klientoj.

Ne ĉiam la aferoj marŝis bone; estis monatoj, laŭ mia scio, kiam ĉe la fino ne restis unu piastro por manĝaĵoj. Sed ili konstante rifuzis helpon, kaj dum la lastaj du-tri tagoj de la monato, kiam ili atendis la salajrotagon kiam klientoj povos pagi sian konton, ili tute simple ne invitis gastojn, kaj tute simple ne manĝis.

Mi fariĝis intima amiko al ili, kaj tre ofte iris al ilia eta apartamento por babili, kaj aŭskulti la opiniojn, juĝojn kaj memorojn de s-ino Molard. Mi ekkonis ŝian aventur-plenan vivon; instruistino, laboristino en fabrikejo, popeca faristino de mansakoj,

zonoj kaj aliaj desegnaj ledaĵoj; organizantino de franca hospitalo dum la milito kaj flegistino proksime de la fronto; instruistino pri vestotranĉo; sukcesa modistino en Parizo. Kiel ofte ĉe la rakontemuloj, ŝi plurfoje ripetis la saman historion, kaj Madeleno, kiu atente aŭskultis ĉiun rakonton eĉ la dekan fojon, ofte interrompis por diri, »Sed ne, *maman*, vi faris tiun ekskurson dum vi estis en Compiègne en 1917; en januaro 1918 vi estis jam en Parizo«, — aŭ similan korekton pri detalo. Ke Madeleno iam havis vivon propran, kun privataj interesoj, pensoj kaj aventuroj, tion mi neniam sukcesis eltrovi.

Madeleno refortiĝis grade, kaj, mi kredas, tute forgesis sian seniluziigon pri Muhammad. Post longa serĉado ŝi trovis laboron por iu efemera revuo; ŝi skizis desegnetojn por reklamoj. Tio iom kuraĝigis ŝin; ŝi korektis la rakontojn de sia patrino pli gaje, kaj eĉ kelkfoje eldiris rekte siajn proprajn opiniojn — ĉiam kun rigardo al la patrino ĉe la fino, kaj pardonpetema »Ĉu ne, *maman*?«

Sed tiu laboro ne daŭris longe; mi kredas, ke la direktoro de la revuo postulis tro intiman servon, krom la rutina desegnado; kaj Madeleno, serioza fraŭlino, estis senlabora. Ŝi longe serĉis alian okupon, sed ne trovis, kaj reiris al kudrado por la patrino. Rekompence, nelonge poste, s-ino Molard dungigis kiel sub-instruistino en iu franca lernejo por knabinoj: laboro malpli laciga ol kudrado, kun enspezo pli certa.

Bona afero, mi pensis; ili jam staras firme sur la piedoj. Tamen, mi ankaŭ rimarkis de tiu tempo subtilan ŝanĝon en la rilatoj inter patrino kaj filino. S-ino Molard laboris ekstere la tutan tagon; Madeleno, domestrino, restis hejme, kuiris, purigis, kudris robojn

kiam tiajn oni kelkfoje mendis: ili ne gajnis sufiĉe por dungi indigenan serviston, kiel ĉiuj aliaj eŭropanoj. S-ino Molard parolis pli tenere al Madeleno, provis paroligi ŝin, kiel karan malfortulinon kiun oni devas kuraĝigi; indulgis ŝin. Madeleno interesiĝis tute pri sia mastrumado, ŝajnis eĉ pli dependa de sia patrino. Mi ofte havis tiutempe antaŭ miaj mensaj okuloj la bildon: Madeleno sidanta kun klinita kapo, kudrante, dum ŝia patrino diskutas pri politiko, scienco, religio, kun la viraj vizitantoj.

Kun io simila al la malespero, mi subite konstatis, nome, ke la rilato inter tiuj du virinoj ŝanĝiĝis al la rilato de edzo kaj edzino. La forta karaktero, la energio, la protektemo de la patrino, pliemfazis la virinan rolon de ŝia filino, samtempe neniigante ŝian esencan virinecon. Mi tremis kiam mi pensis pri tiu hejmo.

Mi deziris, ke Madeleno edziniĝu, sed kion fari? Ilia ekzisto estis tia, ke ili neniam renkontis junulojn edzigeblajn. Kion fari? Mi ne povis altiri junulojn per la haroj, kaj ordoni, ke ili edziĝu al Madeleno Molard.

Tamen, estis io; kvazaŭ malespera espero. Preskaŭ ĉiufoje, kiam mi vizitis la Molard-ojn, mi trovis d-ron Sajed, la onklon de Muhammad, jam instalita en la malgranda saloneto, parolanta facile kaj amike al la du francinoj. Li havis kvindek kvin jarojn, kaj mi generale abomenas la edziĝojn de maljunuloj kun junulinoj; aliflanke, li estis fortika, inteligenta, mense eŭropana, kaj mi pensis, ke eĉ tia mezaĝulo estas preferinda kiel kunulo por Madeleno, ol ŝia patrino. Kaj ankaŭ miaj ŝato kaj respekto al li helpis modifii mian abomenon. Mi do aprobe observis la progreson de la novaĵ rilatoj, kaj esperis.

La rezulta ŝoko estis tiom pli granda. Post kel-
kaj monatoj, mi ricevis unu matenon leteron. Ĝi teke-
tis jene:

Mia kara amiko,

Mi nun skribas por anonci al vi mian fian-
ĉiniĝon al d-ro Sajed Ali, kiu estas malnova
amiko komuna al vi kaj al ni. Nia edziĝo okazos
post tri semajnoj, kaj estas al mi plezuro anonci
ĝin al vi antaŭ ĉiu alia, por ke vi partoprenu
mian feliĉon, ĉar vi ja estis nia unua amiko en
Egiptujo. Mi esperas, ke vi povos ĉeesti la cere-
monion, kaj mi poste sciigos vin pri la detaloj
pri loko, dato, k. t. p.

Ciam via amikino,

Henriette Molard.

Soko tio ja estis. Ĝi tute senspirigis min dum
kelka tempo. Kiel mi povis esti tiel blinda? Kiel mi
povis supozi, ke iu ajn rimarkos tiun mildan knabinon,
kiam ĉeestas tiu fonto de energio kaj forto, ŝia
patrino?

Nu, demandoj kaj supozoj neniel ŝanĝos aferojn;
mia devo estis iri kiel eble plej frue por gratuli la
feliĉan edziniĝontinon. Mi iris la saman vesperon, sed
trovis Madelenon sola en la domo; ŝia patrino estis
elirinta por anonci la novaĵon al aliaj amikoj.

Madeleno estis ŝanĝita. Ŝiaj okuloj brilis, ŝiaj
vangoj estis ruĝetaj pro ekscito.

»Ĉu ne belega afero, s-ro Mansell? Mi estas tiom
ekscitita. Mi restis hejme ĉi vespere por daŭrigi la
kudradon de la edziĝ-robo; kiel vi rimarkas, estas
jam tre malmulte da tempo. Rigardu ĝin! Ĉu ne

bela? Mi intencas brodi ornameton tie ĉi; ĝi estos aminda robo, kredu al mi!»

Mi iom babilis kun ŝi; ŝajnis entuziasmon; petis, ke ŝi esprimu al la patrino miajn gratulojn; kaj foris — resti longe kun ŝi estis ekster mia povo.

Sed dum sufiĉe longa tempo mi ne povis forgesi tiun knabinon tute ekscititan pri edziĝ-robo — de sia patrino.

RESPEKTINDA SINJORINO

Fatma Muhammad estis unu el tiuj knabinoj, kiuj teorie devus finiĝi malbone; sed kiuj, praktike, fariĝas tre respektataj kaj solidaj membroj de la socio.

Ŝi estis en mia klaso en la knabina lernejo, kie mi instruis la anglan lingvon; mi do havis okazon por studi ŝin tre zorge ĉiutage dum du jaroj. Tamen, mi ne povas diri, ke mi ĉion komprenis pri ŝi; ekzemple, eĉ ĝis la fino, mi ne povis diveni pri kio ŝi pensas — se efektive ŝi pensis.

Oni tuj rimarkis, ke ŝi estas tre bela, laŭ la egipta kriterio. Ŝi havis dek sep jarojn, kio egalas havi dudek tri aŭ dudek kvar ĉe eŭropanino. Ŝiaj haroj estis orbrunaj; okuloj preskaŭ sukcenkoloraj kaj tre grandaj — okuloj neordinaraj, sed tre belaj. Ĉiu trajto estis delikata kaj belforma, nazo rekta, oreloj, lipoj, mentono. Nure, estis averta kontrasto inter ŝiaj lipoj kaj ŝia korpo. La korpo estis gracile graseta, kun maturaj kurboj, sed la lipoj havis tre malmulte da volupto. Mi kelkfoje pensis, ke iu viro, edziĝinte al ŝi pro tiuj promesplenaj kurboj, akre elreviĝos kiam li hurtos la malmolan fakton, kiun simboligas tiuj ĉarmaj lipetoj.

Mi neniam estis certa, ĉu ŝi estas iom inteligenta, aŭ tute stulta. Ŝi tute simple ignoris la instruadon, kaj ŝvebis super rezultaj riproĉoj. Certe ŝi ne povis respondi la demandojn al ŝi faritajn en klaso; mi havis la impreson, ke ŝi eĉ ne deziras. Ŝi ja venis al la lernejo sufiĉe regule, eble propravole kun nur malmulta instigo de siaj gepatroj: estas la modo ĉe la modernemaj egiptaj viroj elekti edzinon almenaŭ parte edukitan; kaj la *kafa'a*, la unua parto de la Duagrada Diplomo, havas sian valoron. Ŝi do, teorie, edukigis; sed miakrede ŝi bone konsciis, ke en siaj okuloj, korpo, graseteco, ŝi havas diplomojn senkompare pli allogajn al la svatemuloj, kaj ŝi do ĝuste taksis kaj lokigis la lernejan instruadon. Tion oni ne povas nomi malinteligenta.

En la klasoj, kun la instruistoj — ĉiuj viroj — ŝi neniam provis profiti per sia seksa ĉarmo; eble ŝi sentis, ke nenio valora estas gajnebla el ni kretpolvuloj.

Kontraŭe, ŝi ne malofte kaŭzis al kelkaj instruistoj senpovan koleron. Ne al mi, feliĉe; tamen, mi komprenis ŝian efikon ĉe la aliaj.

Ekzemple, mi demandas al ŝi, »Kio estas la verba substantivo de *to depart*?« aŭ »Ŝanĝu en raportan paroladon ĉi tion...« (jes, tiel ni devis instrui la lingvojn en tiu tempo, por sukcesigi ĉe la ekzamenoj; feliĉe, aferoj nun ŝanĝiĝas).

Fatma stariĝas, junona figuro, kaj min rigardas per siaj grandaj okuloj, ĝentile, sed sen ia ajn intereso. La aliaj knabinoj ĉiam provas respondi, eĉ scie per eraro. Sed ne Fatma; la afero ne tiom interesas ŝin. Mi ripetis pacience la demandon; ankoraŭ ŝi rigardas min trankvile, dum tridek aliaj knabinoj ŝvingas la manon al ĉielo, kaj angore murmuris, »Sir,

Sir! I know!« Mia aspekto jam tedas Fatma; ŝi turnas la kapon, rigardas al la fenestro, trankvile, senembarase, konsciante, ke ŝin okupas pli gravaj aferoj. Kaj fine mi devas diri, ke ŝi residu, — nepovinte eligi el ŝi eĉ unu vorton.

Kiu povas diri, ke ŝi malpravis? Mi ja ne. Tamen, estis kelkfoje kolerige. Mi memoras unu fojon, kiam mi estis instruanta en alia klaso. Mi aŭdis bruon sur la korto, kaj — ĉar miaj klasanoj estis skribantaj eseon — povis elrigardi.

Mi vidis Farag Effendi, la instruiston pri matematiko, kondukata de la lernejestro kaj kelkaj servistoj al la lavejo. Li estis tute blankvizaĝa, preskaŭ svenanta, kaj de lia brako kaj mano fluis rapide sango.

Poste mi aŭdis la historion. Ne ricevinte de Fatma respondon al sia demando, Farag estis ordoninta, ke ŝi staru antaŭ la klaso; li volis, verŝajne, embarasi ŝin, eĉ timigi, por fine rompi tiun superecan silenton. Nu, li tute malsukcesis, kaj, eluzinte sian paciencon, ordonis, ke ŝi eliru la ĉambron. Kaj ĉar ŝi iris iom tro malrapide, li provis kapti ŝin ĉe la ŝultro por puŝi ŝin tra la pordo. Sed lia mano glitis (ŝi estis sufiĉe peza) kaj ŝoviĝis tra la pordovetro, kaj ĝi kaj lia brako multe vundiĝis.

Post tio Fatma restis hejme du-tri semajnojn; ne pro honto aŭ embaraso, mi kredas, sed por ne malŝpari almenaŭ tioman tempon pri bagatelaĵoj.

Mi diris, ke ŝi ne provis profiti sian seksan allogon. Tamen, tiu allogo tre forte efikis, precipe ĉe la knaboj de la lernejo.

La knaba lernejo estis apud la knabina; ilin dividis alta muro kun fera pordo. La plimulton el miaj

lecionoj mi faris en la knaba lernejo; mi ĉu havis tablon kaj seĝon tie en la instruista ripozejo, kaj tien portis ĉiujn kajerojn por korektado.

La knaboj — de dek du ĝis dudek du jaroj (mi havis barbulojn sidantajn flanke de dek-kvarjaruloj) — baldaŭ rimarkis, ke en la knabina lernejo troviĝas belegulino, kaj ĉe la fino de la tago, ili kuris dekoj por vidi Fatma-n eliri la lernejon; ili provis alparoli ŝin (tamen, ŝi estis prudenta, kaj ĉiam irigis alian knabinon kun si), kaj sekvis ŝin eĉ ĝis ŝia domo.

La afero estis fariĝonta skandalo: la knaboj komencis babili kaj ludi ankaŭ kun la aliaj lernejaninoj — afero nepermesebla en Egiptujo. Fine estis necese ŝanĝi la horojn de la lecionoj; la knabinoj komencis kaj finis la lecionojn dek minutojn antaŭ ol la knaboj, do irante hejmen povis tute eviti ilin.

Sed la admiro, aŭ amo, aŭ kio ajn, kiu ŝprucis en la koroj de la knaboj tiel facile ne venkiĝis. Ili sendis al ŝi amleterojn per la poŝto, aŭ al la lernejo aŭ al ŝia hejmo. Unu senhontulo eĉ aŭdacis demandi al mi inter du lecionoj, »Sinjoro, kio estas la nomo de la bela knabino en la alia lernejo?« Tio senspirigis min tiom, ke mi forgesis puni lin per duhora malliberigo.

Aliaj subaĉetis la lernejajn servistojn, ke ili transportu mesaĝojn — kiujn, mi kredas, Fatma neniam respondis, kvankam ŝi supozeble legis ilin avide, eble ridante kun iu kunulino.

Sed la plej aŭdacan ruzon elpensis iu friponeto, kiu ŝajne havis monon nek por la poŝto nek por subaĉeto de la servistoj.

Unu tagon mi prenis kajeraron el la knaba lernejo, kaj ĝin disdonis al la knabinoj. Post du-tri

minutoj, Fatma levis la manon kaj kriis, »Sinjoro, sinjoro!«

Mi aliris al ŝia skribtableto, kaj demandis kion ŝi volas.

»Edi?« ŝi diris arablingve. »Kio estas tio ĉi?« Ŝi montris al mi la lastan paĝon de sia kajero, sur kiu oni estis skribinta dek liniojn arabe.

»Kiel mi scias?« mi respondis. »Ĉu mi scias la araban lingvon? Kion vi skribis tie?«

»Mi ne skribis ĝin«, ŝi respondis. »Kiam mi donis al vi la kajeron, ne estis skribo tie«.

»Bone, traduku ĝin, por ke mi sciu pri kio temas.«

Ce tio ŝi komencis kaŝridi, klinante la kapon antaŭen, kaj kovrante la buŝon per la mano. Kaj pluan vorton el ŝi mi ne povis ricevi.

Mi portis la kajeron al alia knabino, kun la sama rezulto. Tiam mi elŝiris la paĝon por forporti ĝin, por ke egipta kolego traduku ĝin al mi. Kiam li legis ĝin, ankaŭ li ridetis, kaj klarigis, ke ĝi estas tre entuziasma amletero, multe parolanta pri la belaj okuloj de Fatma, kaj proponanta rendevuon por la proksima tago.

Sendube, la skribinto meritis punon pro tio, sed lia ruzo tiom amuzis min, ke mi eĉ ne provis eltrovi kiu li estas.

Nu, venis junio, la monato de la publikaj ekzamenoj. Fatma iris kun la aliaj, por provi la unuan ekzamenon. Estis ŝia dua jaro kun mi; ŝi estis provinta la saman ekzamenon la antaŭan jaron, kaj tute ne sukcesis. Mi povis imagi ŝin, sidanta en la tendego.

de la ekzameno, rigardante kun trankvila malestimo la demandojn, kiujn ŝi ne povas respondi.

Tamen, se ŝi ne povis brili en la ekzamenoj, ŝi famiĝis alimaniere. Unu tagon, ĉe la fino de ekzamenkunsido, ĵurnalisto de iu arablingva ĵurnalo atendis ekster la tendego kun sia fotografilo. Li deziris aktualaĵojn pri la ekzamenoj, kaj estis decidante fotografi la lernantinojn. Hazarde, li elektis Fatma-n, kaj la proksiman matenon tuta Egiptujo vidis ŝin sur la ĵurnalo, kun la subskribo: »La Egipta Virino de la Eston-teco; la Plej Bela Ekzamenatino de la Jaro Triumfe Iras el la Ekzamenejo«. Oni skribis ankaŭ ŝian nomon, kaj la nomon de la lernejo, kie ŝi estis studinta.

Jam tiun tagon mi devis aŭskulti la ŝercojn senfinajn de miaj egiptaj kolegoj; ne nur tiun tagon, sed ankaŭ dum multaj postaj tagoj, ĉar la egipto povas ĝui la saman ŝercon multe pli longe ol la eŭropano. Oni proponis fari por mi miajn lecionojn senpage, oni proponis eĉ fari miajn lecionojn kaj min pagi por la privilegio; kaj oni faris sennombrajn demandojn pri mia metodo instrui la anglan lingvon.

Nu, kia ajn mia metodo instrui, Fatma denove malsukcesis en la ekzameno, eĉ pli malglorre ol la antaŭan fojon. Tiel finiĝis ŝia senutila edukado, kaj ŝi neniam revenis al la lernejo.

Tamen, ne tiom senutila. Tiu malestimata eduko levis ŝin alten en la socio. Ĉar iu paŝao, tre riĉa kaj ne tro maljuna, vidis ŝian foton en la ĵurnalo; kaj supozis, ke ŝi sendube estas tre brila, se tiel elektita, kaj tre admiris ŝian belecon (hazarde la foto estis klara kaj bona): la bela virino fama estas ĉiam pli bela, ol la bela virino nekonata — eĉ se ŝi estus fama nur pro murdaĉo.

Nu, mallonge, li komunikis kun la patro de Fatma, faris konvenajn proponojn pri doto, kaj tiel plu, kaj ili geedziĝis post nur du monatoj.

De tiam mi neniam denove vidis Fatma-n, sed mi kelkfoje imagis al mi, per kia rigardo de trankvila supereco ŝi regalus min, se hazarde la vivo kunĵetus nin denove.

LA ĴURO DE PIULO

La egipta vilaĝo staris sur altaĵeto tiom malalta, ke oni apenaŭ rimarkis ĝin; tamen sufiĉe alta por protekti la domojn kontraŭ la inundoj de Nilo. La kotajn domojn kaj kolombo-turojn origis la preskaŭ horizontaltaj radioj de la suno. Revidiĝis la koloroj, kiujn paligis la tagmeza suno: precipe la smeralda verdo de la kampoj kaj palmoj, kaj la oro de la mezdistancaj sablodunoj; ĉe la horizonto, la montetoj surmetis delikatajn purpurojn, malvojn, brunojn.

Abdallah Abd er-Rihim, sidante kaŝe en la sukerkanoj, ne rimarkis la belecon de la vespero; li fiksas anstataŭe siajn okulojn sur la vilaĝo por vidi, ĉu iu venas en lia direkto. Certiginte, ke de tie li ne estas observata, li turnis sian rigardon al la bordoj de la kanalo, kelkcent metrojn for, samtempe karesante la tubon de sia fusilo senscie. Sur la vojeto laŭlonge de la kanalo, paŝis pezaj bubaloj kun kriemaj knabinetoj sur ĝiaj ĝiboj, kaj sekretemaj azenoj rajdataj de nigre vestitaj virinoj. Aliaj virinoj trempis vazojn en la akvon; poste ili metis la pezegajn vazojn sur la kapon, kaj kun tiu majesta, ebena paŝado, kiu estas la plej gracia marŝmaniero en la mondo, kun rektaj dorsoj kaj elstarantaj

mamoj, iris al la vilaĝo por prepari la vesperan manĝon.

Ankaŭ de tiu flanko, nenia danĝero; ĉiu pensas nur pri reiro al la vespera preĝo kaj la familia manĝo. Abdallah tiam turnis sian rigardon al la vojo, apud kiu li atendas, kaj kiu kondukas al la kampoj de Abd el-Aziz Mahmud, la plej riĉa terposedanto de la vilaĝo. Li tamen ne atendis Abd el-Aziz, kiu en sia aĝo jam ne iras al la kampoj por labori, sed ties plej aĝan filon, Husejn Abd el-Aziz. Post dudek minutoj ĉiu fidela mahometano devos nepre genui por diri la vesperan preĝon, kaj Husejn kutimas tion fari hejme, anstataŭ sur la kampo kun siaj laboristoj.

Abdallah atendis sen ia malpacienco; ĉi tiun momenton li atendis jam de kvar monatoj, jam de la tago, kiam oni metis lin en la malliberejon. Oni akuzis, ke li seksatencis la dek-dujaran filinon de Abd el-Aziz en kotonkampo; kiam homoj alkuris responde al la krioj de la knabino, Abdallah forkuris, kaj poste en la policejo ĵuris, ke li estis en sia propra kampo dum la tuta mateno. Sed frato de la knabino estis vidinta lin kaŝkuri el la kotonkampo, kaj Abdallah ne povis trovi sufiĉajn atestantojn por ĵuri, ke li ja ne estus povinta tie troviĝi. La juĝisto kondamnis lin je trimonata mallibero, kun punlaboro. Ĉiutage en sia karceri, ĉiutage kiam li ŝvitegis sur la vojo, kiun li ripar- is, Abdallah ĵuris, ke li vengos sin, kaj nun la momento estis veninta.

Li aŭskultis; li aŭdis malproksimajn kriojn de knabinoj, foran blekadon de azeno, sed ne la frapet- adon de azenhufoj sur la apuda vojeto. Li komencis timi, ke ĉi tiun tagon Husejn ne venos, aŭ escepte estas irinta hejmen pli frue. »Ho Dio,« diris en si Ab-

dallah, »ke li venu hodiaŭ, ke mi ne maltrafu; mi promesas marŝi preĝante, proksiman vendredon, trifoje ĉirkaŭ la tombo de ŝejho Suliman, kromi fari la vendredajn preĝojn en la moskeo.« Li reekzamenis sian fusilon; ĉio pura kaj en ordo, kun kartoĉo en la tubo.

Subite li ekĝojis; ŝajne Dio aŭdis lian preĝon. Sonis huffrapetoj sur la vojeto, kaj baldaŭ aperis Husejn, pense rajdanta, kaj portanta ankoraŭ sian sunombreton super sia turbano. Li tenis en la mano sian rozarion, senĉese murmurante »Allah, Allah, Allah,« ĉe ĉiu globeto.

Abdallah kaŭris pli malalte en la kanoj, levis sian fusilon, kaj kun ankoraŭ unu preĝo al Dio, ke li ne maltrafu, tiris la ĉanon. La figuro sur la azeno etendis la brakojn, kvazaŭ bene, falis antaŭen sur la kolon de la azeno, kaj senbrue glitis teren, kie ĝi kuŝis, senforma amaso. La azeno trankvile deiris la vojeton, kaj komencis manĝeti la herbojn en la apuda kampo.

Momente Abdallah atente rigardis la figuron sur la tero; ĉu ĝi moviĝas? Ne; ĉio bona; Dio ja aŭdis lian preĝon. Li aŭskultis: neniam bruoj; eĉ la akraĵoj knabinetoj estas jam hejme en la vilaĝo, de kiu leviĝas spiraletoj el plua fumo. Kun longaj paŝoj, kurba dorso, Abdallah ŝtele kuris tra la kampoj al la vilaĝo, ĉiam ŝirmante sin malantaŭ la altaj kreskaĵoj. Li eniris la vilaĝon ne per la vojo, sed tra fendo inter sia domo kaj la najbara, kaj silente, fantome glitis tra la pordo en la mallumon de la ununura ĉambreto. En unu angulo estis hela trueto en la obskuro, kie virino kaŭris super sterka fajro kaj odoranta poto. Ŝi sentis lian ĉeeston kaj sin turnis.

»Kie vi estis, O Abdallah?« ŝi diris. »Estas jam la preĝo.«

Efektive de la vilaĝa minareto sonis la paca voĉo de la muezino, vokanta ĉiun mahometanon al la preĝo. Kun grunto Abdallah piede silentigis la virinon, kaj levis la akvovazon por lavi la kapon, manojn kaj piedojn, laŭ la preĝorito. Poste li sternis pajlomaton sur la tero, kaj komencis sian vesperan preĝon, starante, genuante, per frunto tuŝante la teron, kaj murmurante rapide sed senerare la eternajn vortojn. Dum li preĝis, ĉia ekscito, ĉia zorgo malaperis el lia vizaĝo; li estis nur sekvanto de Muhammad, parolanta kun sia Dio; kaj sur lian animon pezis nenia ĝeno.

Fininte la preĝon, li silenteme manĝis, kaj poste trankvile kuŝigis apud la virino sur la tero, ambaŭ volvitaj en lantukoj. Kaj dormis, kiel decas al justulo, kiu plenumis ĉiun sian devon.

Kial li estu maltrankvila? Vengo pro ofendo aŭ insulto estas la leĝeca moro de la felaho; la sento pri honoro estas tre delikata kaj flamiĝema, kaj tiu, kiu ne kuraĝas ataki siajn malamikojn, baldaŭ nomigas virino — la plej ofenda el ĉiuj insultoj. Mortigo, remortigo, familia milito, kiu daŭros ofte tri-kvar generaciojn, ĉio ĉi estas tute natura afero; kaj la felaho ne komprenas, kial la Egipta Registaro tiel severe punas la vengintojn; kvankam li filozofece elportas la punon, kiam ĝi lin trafas.

Abdallah do dormis pace; tiom pli tial, ke li kredis sin nesuspektebla: lin vidis ja neniun, kaj kiu povos pruvi, ke li ne pasigis la tutan posttagmezon en sia kampo ĝis la vespera preĝo?

Tamen, lian dormon oni ne lasis longe trankvila. Post du horoj fusil-tenilo frakase malfermis la pordon de lia domo, kaj enpaŝis du *ghaffir*, policaj nokto-gardistoj. La edzino hurlis timege, Abdallah levigis salte

kun blafemo, kaj palpebrumis kolere en la lumo de lanterno.

»Bone, jen vi estas, O Abdallah,« diris unu el la gardistoj. »Vi venos kun ni ĉi nokte,« kaj li etendis la manon por kapti la ŝultron de Abdallah.

»Kion vi volas?« respondis Abdallah, forpuŝante la manon de la gardisto kun malestima gesto. »Vi ne havas aferon kun mi.«

»Ĉu tiel? Kaj la kadavro de Husejn Abd el-Aziz, kiel ĝi okazis?«

»Uallahi, je Dio! Ĉu mi scias? Ĉu mi estas via ekzekutisto de hundoj?«

»Balaŝ kalam, ĉesigu vortadon,« kaj la gardisto denove etendis la manon.

»Lasu!« kriis Abdallah kolere, ripete forpuŝante la manon kun la malestima, obstina pacienco de eĉ kolera egipto.

Nun ambaŭ gardistoj etendis la brakojn, kaj komenciĝis furioza sed mallonga lukto. Lerte unu el la gardistoj frapis per sia fusilo la ventron de Abdallah; li rigidiĝis senspire, kaj ili surmetis al li la mankatendon.

Tiam ili trenmarŝigis lin al la subpolicejo, kiu situis meze de la kampoj, duonkilometron ekster la vilaĝo. La procesieton sekvis lia edzino, hurlante, blasfemante, kaj per ĉiaj fivortoj insultante la gardistojn. Alvenis ankaŭ vilaĝanoj, kun membroj de la familio de la murdito; ili provis bati, alkraĉi, ponardi Abdallah, kaj la gardistoj devis eĉ pli lukti kaj sin riski por protekti sian arestiton, ol por lin aresti.

Fine, meze de bruego kaj konfuza luktado en la mallumo, ili sukcesis lin logigi en karcero sur la

policeja korto, kaj frapbalai la homamason ekster la policejon. Grade la amaso foriris al siaj domoj, sed la edzino de Abdallah longe kriegis ekster la pordego, skuante la kradon; fine eĉ ŝi sidis, poste kuŝis sur la tero, por dormi ĝis la mateno.

En la mateno alvenis la polica leŭtenanto, junulo tre bela kaj vireca en sia kakia uniformo, kun gaje klinita fezo kaj blankaj gantoj. Li sidis en sia oficejo, blanka kaj senornama, mendis kafon, bruligis cigaredon, kaj tedite kamencis legi la raporton de la serĝento pri la trovo de la kadavro, plendo kaj akuzo de la familio de la murdito, kaj la aresto de Abdallah.

»Venigu lin,« li diris lace al la atendanta policano.

Oni enmarsigis Abdallah, duone luktantan, kun vundoj kaj sekiginta sango ĉie sur siaj vizaĝo, brakoj, ŝultroj, kaj kun ŝirita galabijo.

Li komencis paroli torente, preskaŭ antaŭ ol trapasi la pordon.

»*Ja bej, Allah ĵitaŭil omrak!* O bejo, Dio longigu vian vivon! Diru al ĉi tiuj hundidoj, ke...«

»*Ua omrak!* Kaj vian!« respondis la leŭtenanto.

»Silentigu lin.«

Policano pugnofrapis la buŝon de Abdallah, kaj Abdallah ĵetis al la policano murdeman rigardon.

»Vi estas Abdallah Abd er-Rihim Hasan?«

»Jes, O bejo.«

»Vi loĝas en Uadi Sial?«

»Jes, O bejo.«

»Bone. Abd el-Aziz Mahmud el-Bedaŭi akuzas, ke hieraŭ vespere vi pafmortigis lian filon, Husejn Abd el-Aziz Mahmud. Li kaj kvin aliaj atestantoj deklaras, ke vi plurfoje kaj publike ĵuris vengon kontraŭ la familio de Abd el-Aziz pro via malliberigo.«

»O honorinda mosto! Ĉu klera sinjoro, kia vi, kredas tiajn hundojn? *Uallah!* mi...«

»Silentigu lin,« lakone ordonis la leŭtenanto. La policano ripetis la pugnofrapon, kaj Abdallah la rigardon.

»Vi estas arestita, kaj restos tie ĉi por la magistrata enketo. O soldato, remetu lin en la karceron. Vi povas forigi la katenon.«

La policanoj, nomataj en Egiptujo soldatoj, forigis Abdallah, luktantan kaj kriantan al la leŭtenanto komplimentojn kaj plendojn; baldaŭ fermigis la pordo de lia karcerro, kaj denove li estis sola. La leŭtenanto mendis pluan kafon, bruligis pluan cigaredon, kaj oscedis. En tiaj subpolicejoj ja nenio okazas.

En sia karcerro Abdallah longe furiozis, kaj laŭtvoĉe recitis la maljustaĵojn, kiujn li suferas. Sian monologon li variigis jen per malbenoj kaj venĝojuroj kontraŭ siaj falsaj akuzantoj, jen per prova parolado, konvinkonta eĉ la plej »malfacilan« juĝiston, ke li estas denaska senkulpulo. Sed la tago pli kaj pli varmigiĝis, kaj fine liaj vortoj fariĝis nur murmuro, kaj eniris la silenton de la tagmeza dormo.

Oni vekis lin je la kvara kaj duono, por konduki lin antaŭ la reprezentanton de la urba magistrato. Li stumblis el la helega lumo sur la korto en la obskuron de la oficejo, kaj staris palpebrumanta antaŭ la tablo, kie sidis tri viroj. Malantaŭe, en la centro, estis la reprezentanto de la magistrato, sendata por fari la leĝan enketon: li estis grasa hometo, ŝvitanta en siaj fezo kaj eŭropanaj vestoj; dum la tuta intervjuo li svingetadis unu piedon kaj frapadis la tablon laŭtakte per sia kraĵono, krom dum la momentoj, kiam li parolis. Ĉe lia dekstra mano sidis lia skribisto, ombra homo, kiu

estis tiom miopa, ke li pasigis la tutan tempon aŭ kun la nazo tri centrimetrojn for de sia skribpapero, aŭ kun ĝi antaŭenpuŝata agle por iom vidi la parolantojn. Maldekstre sidis la leŭtenanto, kun tedita es-
primo ankoraŭ sur sia vireca vizaĝo.

La reprezentanto ne donis al Abdallah okazon por komenci la konversacion; li tuj komencis sian formalan demandadon.

»Abdallah Abd er-Rihim Hasan?«

»Jes, via honora moŝto.«

Kaj tiel plu. La skribisto ĉion knaris sur paperon, ŝajne skribante per la nazo. Fininte tiun scenon, la reprezentanto mendis kafon, bruligis cigaredon, kaj sin turnis por preparoli la Kabineton de Sedki Paŝao kun la leŭtenanto. Ili parolis tute malkaŝe antaŭ Abdallah kaj la policianoj; kiel tiuj brutuloj povus kompreni la parolojn de la *efendija*, de la edukataro? Dume, Abdallah staris senmove, kaj pensis iom angore pri la venonta intervjuo.

Kritikinte la Kabineton de Sedki Paŝao el ĉiuj vidpunktoj, la reprezentanto oscedis, kaj ordonis al la policano venigi »la aliajn.«

Post du-tri minutoj eniris deko da homoj, ĉiuj vestitaj en la ceremonia kaftano kaj blanka turbano de la iom riĉa kamparano. Ili basvoĉe salutis la *efendiojn*, kaj tuj kaŭris en linio, kun postaĵo sur kalkanoj, kaj etenditaj brakoj apogataj sur genuoj. Dum unu-du minutoj ili fiksas la okulojn sur Abdallah, kun medita esprimo, kiu trankvile promesis, ke post la nepra puno de la leĝo, venos ankaŭ la saldo de kontoj laŭ la kamparana moro. Tiam ili turnis la kapon al la tablo kaj aŭskultis. Malantaŭ ili staris kvar policianoj; ankaŭ

akuzantoj kaj atestantoj ekscitiĝas, kaj kelkfoje estas necese trankviligi ankaŭ ilin per kelkhora restado en karcero.

»Abd el-Aziz Mahmud!« diris la reprezentanto.

»Effendim!« respondis fortika maljunulo, kun faltaj vangoj kaj barbo sub la mentono.

»Kiam vi lastfoje vidis vian filon Husejn?«

»Effendim, je tagmezo; li venis por doni monon, kiun li estis kolektinta de terluanto.«

»Kiam li foriris al via domo?«

»Je la kvara. Li iris rigardi miajn laboristojn en la kampo apud la kanalo.«

»Kaj li ne revenis laŭ kutimo je la vespera preĝo. Kiam vi komencis serĉi lin?«

»Ni atendis du trionojn de horo sen manĝi. Mi tiam sendis mian filon Fuad al la kampo.«

»Fuad Abd el-Aziz!«

»Effendim!« respondis Fuad.

»Vi iris survoje al la kampo apud la kanalo. Kie vi trovis la kadavron de via frato?«

»Sur la vojeto, kiu iras al nia kampo, sep minutojn for de la vilaĝo. Li kuŝis sur la ventro. Mi kriis lian nomon, sed li ne respondis. Tiam mi vidis, ke li mortis.«

»Kion vi faris tiam?«

»Mi kaptis lian azenon, kiu estis en la apuda kampo, kaj rajdis hejmen por informi mian patron. Li iris al la policejo por informi, ke tiu hundo Abdallah, kiu ĉiam estis malpura kaj fava, mortigis nian Husejn.«

Ĉe tio Abdallah, kiu ĝis nun estis starinta senmova, kvazaŭ la afero lin neniel koncernus, eksaltis, kvazaŭ oni estus lin vipinta.

»Vi mensogas! Oni pafmortigas hundon de via familio, kaj vi venas tien ĉi por azenbleki pri honestaj homoj!« Li volis daŭrigi per kelkaj rimarkoj pri la bonoro de la virinoj de tiu familio, kiam la reprezentanto donis la malnovan ordonon, »Silentigu lin.«

Necesis du policanoj ĉi foje por ŝtopi tiun buŝon, kaj, eĉ kiam silenta, li spiris forte kaj okule minacis siajn senhontajn akuzantojn. La lukton rigardis la reprezentanto, kiel oni rigardas muŝojn sur fenestrovitro.

Nun la demandoj direktigis al Abdallah.

»Kaj kial vi mortigis Husejn?«

»Kial mi mortigus tiun sesdekidon? Mi atentis miajn aferojn. Ĉu mi havas tempon por fari la laboron de la pendigisto?«

»Bone. Vi diras, ke vi ne mortigis lin. Nu, rigardu tion ĉi.« La reprezentanto gestis al policano, kiu donis al li fusilon. »Kio estas tio?«

Abdallah silentis.

»Via fusilo, ĉu ne? Ni trovis ĝin en via domo. Eble spirito ĝin metis tien? Kies ĝi estas?«

»Gi estas mia,« respondis Abdallah, atente observante la reprezentanton.

»Kaj per ĝi vi pafis Husejn, ĉu ne? Vi atendis en la kanoj, kaj pafis lin, kiam li alproksimigis?«

»Ne, je la profeto Muhammad, li estu feliĉa! Mi ne uzas mian pafilon jam de semajnoj.«

»Vi ne uzas ĝin jam de semajnoj. Bone. Mi komprenas. Kaj kiel estas, ke jen en la tubo estas tute freŝe bruligita pulvo? Eble via edzino iras ĉasi?«

Abdallah interne malbenis sian stultecon, ke li ne purigis la fusilon; sed sur lia vizaĝo aperis esprimo de kompleta nekompreneo.

»Freŝa pulvo? Via moŝto, Dio protektu vin! Vi eraras. Kiel povus esti freŝa pulvo, se mi ne pafas jam de monatoj?»

»Ĉu tiel? Sendube la diabletoj. Eble la juĝisto kredos vin, kaj ne min.«

»*Ja baŝo*, O paŝao, kiel mi povus memori? Eble mi iris hieraŭ kaj pafis unu el la hundoj, kiuj difektas miajn kreskaĵojn.« Indigne: »Ĉu mi memorus ĉiun hundaĉon, kiun mi pafas?»

La reprezentanto ridetis grase, kaj kapjesis. »Mi ja komprenas. Dum semajnoj en la vilaĝo, vespere en la kafejo, vi laŭte ĵuras, ke vi venĝos vin pro tiu afereto, pro kiu vi pasigis tri monatojn en malliberejo. Vi informas la mondon, ke la maljunulo Abd el-Aziz bedaŭros siajn mensogojn. Kaj tiam, por pruvi viajn vortojn, vi prenas vian fusilon unu vesperon, kaj iras pafmortigi — hundaĉon en via kampo. Tiel, ĉu ne?»

»Ĉu mi atentus tiajn friponojn?» La malestimo sur lia vizaĝo estis admirinda. »Ili ne indas alkraĉon. O noblulo, mi estas konata en la vilaĝo. Neniu eĉ unufoje aŭdis min minaci tiun familiaĉon: neniu diras tion. Ĉu Dio permesus al tia mensoganto vivi?»

La reprezentanto sin turnis al la linio el kaŭrantaj viroj. »Muhammad, Ali, Nasr, Abd el-Hamid. Nur, ĉu vi aŭdis aŭ ne aŭdis Abdallah deklari, ke li scias protekti sian honoron, kaj ke li mortigos la tutan familion de Abd el-Aziz?»

Konfuze horo jesis emfaze, kun multaj ĵuroj je la nomo de Allah.

Ce tia malnobleco, Abdallah tute furiozis. »Idoj de publikulinoj!« li kriegis. »Malbenojn sur viaj patroj! De kie vi havas viajn filojn, O Abd el-Aziz? Ĉu kalvulo, kia vi, povas fari idojn al siaj edzinoj?»

Ce tiu eksplodo estis haoso en la oficejo. La viroj leviĝis kune kaj ekkuris por dispecigi Abdallah. Ĉiu samtempe kriegis, malbenante kaj blasfemante, kaj meze de la bruego la policianoj batalis por restarigi kvieton. Fine el la konfuzo apartiĝis tri grupoj: la akuzantoj, la policianoj, kaj Abdallah kun siaj gardistoj, ĉiuj anhelantaj, kun freŝa sango sur vizaĝoj kaj ŝultroj.

La leŭtenanto oscedis. »Sufiĉas, ĉu ne? Ni povas atendi la proceson.« La reprezentanto kapjesis, kaj ordonis al policano alporti kafon. Oni forpelis la akuzantojn kaj atestantojn, kiel ŝafojn, kaj remetis Abdallah en lian karceron. Kiel antaŭe, li laŭte informis la mondon pri siaj suferoj kaj afliktoj, dum la aliaj mal-liberuloj malbenis lian patron kaj faris malkomplimentojn pri lia patrino; en la sekvanta insulto-duelo, kriata de karcero al karcero, Abdallah resereniĝis.

Pasis du horoj. Subite li aŭdis novan, familieran sonon tra la ekstera fenestro de sia karcero, kiu malfermiĝis sur la kampvojeton kondukantan al la tombejo. De fore, aŭdiĝis basa kantado kun forta ritmo, sur fono de virina ululado: la egipta mortoveo tremanta kaj ripetata. Baldaŭ la konfuzaj sonoj pliklariĝis kaj plilaŭtiĝis, kaj la procesio aperis preteriranta la policejon. Ce l'antaŭo marŝis la viroj, blanke vestitaj, kun seriozaj, senĉagrenaj vizaĝoj. La plej proksimaj viraj parencoj subportis ŝultroportilon, sur kiu kuŝis la ĉerko. Tiuj, kiuj ne povis atingi unu el la teniloj, metis manon sur la portilon mem, kaj tiel marŝis kantante. La unua portanto estis Abd el-Aziz mem, kun okuloj fiksitaj sur la eterneco. Post la viroj iris la virinoj, nigre vestitaj. Ili kriis, ploris, jen rektigante la dorson kaj ŝvingante la brakojn al la ĉielo; jen

kurbigante sin kaj prenante polvon de la tero por verŝi sur la kapon. Ĉiu-kelkpaŝe ili haltis, ŝiretis siajn vestojn ĉe la brusto, kaj levis la kapon por ululi kun blinda malespero.

La procesio forpasis, kiel dancistoj trans scenojon, kaj la ĉantado kaj hurlado fariĝis nura murmuro en la malproksimo.

Abdallah daŭris rigardi tra la fenestro, kontente ridetante. Fine, kvita kun tiu hundaro. Tamen, ne. Estas ĉi tiu akuzo, ĉi tiu mallibereco; tion oni devas pagigi. Abdallah grincigis siajn dentojn. Denove lia kolero plenigis lian koron, ĝis ĝi eksplodis en subita ekkrio: »Allah!« Li ekpaŝis tien kaj reen furioze.

Tiam frapis lin alia penso: morgaŭ estos vendredo, kiam li devus plenumi sian ĵuron, marŝi trifoje preĝante ĉirkaŭ la tombo de la sanktulo, ŝeĥo Suliman. Tio ĝenis lin; se oni ne plenumas ĵuron, teruraj aferoj povas okazi: oni falas en puton, aŭ renkontas homon kun malbona okulo, kaj forgesas forgesti la malbonon; aŭ venas en la nokto diabletoj por turmenti kaj malebligi la dormon. Teruraj aferoj, precipe tiuj diabletoj, kiuj povas tute mizerigi la vivon al la homo.

Li ja devos iri morgaŭ al la tombejo por fari tiujn preĝojn; sed kiel — en malliberejo? Kiel, kiel — en malliberejo? Horon, du horojn li cerbumadis, jen paŝante, jen kaŭrante kun etenditaj brakoj. Ĉu mortigi la gardiston? Sed denove, kiel? Pri la puno sekvonta tian pluan murdon li ne pensis: la egipta kamparano ne kutimas antaŭpensi la rezultojn de siaj agoj.

Subite li haltis, kaj staris kvin minutojn senmove meze de la karcero. Li ridetis; li havis sian planon. Li iris al la kradpordo de la karcero kaj el-

rigardis. Estis mallume ekstere. En la oficejo, nenia lumo: la leŭtenanto ne dejoras. Apud la pordego de la korto, nur unu sola figuro kun fusilo — la gardisto; ankaŭ la serĝento foriris por siaj aferoj. Abdallah tre singarde provis altiri la atenton de la gardisto; eĉ la aliaj malliberuloj devos ne scii pri la plano.

»Tsss! O soldato, aŭdu!«

Je la tria provo, la gardisto aŭdis, kaj base grumblante, venis al la karcer-pordo.

»O azeno, kion vi volas? Ĉu mi estas tie ĉi por vin atenti?«

»Aŭdu: kion oni faros al mi?«

»Ĉu mi scias? Kredeble pendigo.«

»Pendigo? Allah-Allah-Allah! Mizero! Kial mi naskiĝis?«

»Allah fi! Ekzistas tamen Dio!« diris komplete la gardisto.

»Sed vi ne komprenas! Mi faris ĵuron, pro... pro ia grava afero, ke morgaŭ mi marŝos preĝante trifoje ĉirkaŭ la tombo de Suliman. Nun mi ne povas. Ĉu vi komprenas, kiel mi turmentiĝos?«

La gardisto estis tre religia homo, kaj ankaŭ bonkora, kaj li bone perceptis la malfacilan situacion, en kiu troviĝis Abdallah.

»Tamen,« li diris konsole, »la diabletoj ne povos longe vin turmenti.«

»Sed ĉu mi povos morti, ne plenuminte tian promeson?« Abdallah flustris ankoraŭ pli sekrete.

»Aŭdu: vi estas bona homo; vi helpos min, kaj Dio rekompencos vin per riĉeco kaj multaj filoj. Nur malgranda afero: vi malŝlosos mian pordon, mi foriros por unu horo, kaj revenos rapide, nevidate, kaj neniuj scios pri la afero. O soldato, mi ĵuras per la Profeto,

ke mi ne perfidos vin; mi ĵuras, ke mi revenos je la ĝusta tempo.«

»Cu vi estas frenezulo? Cetere,« aldonis la gardisto, »mi ne dejoras dum la nokto. Mi finos post duon-horo, kaj revenos nur tagmeze morgaŭ. Neeble.«

»*Rabuna ĵigazik!* Dio vin rekompencos! Ne estas necese iri nokte. Lasu min eliri post la tagmezo morgaŭ; ĉiu en la mondo estos dormanta; neniu min vidos; estos pli sendanĝere, ol dum la nokto. O homo, kion vi volus fari? Cu vi ne plenumus ĵuron?»

Tiu petego, kaj tia rezonado, ŝancelis la decidon de la gardisto; li estis pia homo. Abdallah vidis sian avantaĝon, kaj tuj almetis la finkonvinkan argumenton.

»Mi havas du pundojn kaŝitajn. Mia edzino scias, kie ili estas. Mi diros al ŝi, ke ŝi donu al vi la monon, kiam mi estos farinta miajn preĝojn. Du pundoj!»

Du pundoj preskaŭ egalas la salajron por tuta monato, kaj estas argumento nerezistebla.

»Du pundojn kaj duonon,« diris la gardisto.

»*Ja salám! Ana meŝkin!* O Paco! Mi estas malriĉega!« diris Abdallah. »Du pundojn kaj dek piastrojn.«

»Du pundojn kaj tridek piastrojn,« firme respondis la gardisto.

»Mi malsatos, tamen, bone. Estu tiel.«

»Tamen, vi ja ĵuras reveni, ĉu ne? Se vi malaperus, mi perdus mian oficon, mian pension, kaj krome pasigus kelkajn jarojn en malliberejo,« diris la gardisto, kun ektimo.

»Cu mi estas mensogema kristano?» lin trankviligis Abdallah. »Vi meme apenaŭ rimarkos, ke mi forrestis etan tempon.«

La gardisto reiris al la pordego por saluti la serĝenton revenintan de siaj privataj aferoj, kaj Abdallah kuŝiĝis sur la nuda planko, kaj dolĉe dormis. Sur liaj lipoj estis rideto.

Fariĝis laŭ la plano. Je tagmezo, oni ŝanĝis la gardistojn. La leŭtenanto foriris por siaj tagmango kaj siesto. La serĝento kaj la gardisto, la sama gardisto, sidis sur benko apud la pordego.

La mondo estis silenta. Blankega sunlumo torente falis senbrue; ĉio paliĝis en la varmo. Baldaŭ la kapo de la serĝento kliniĝis; li ronkis. Similaj dormosonoj aŭdiĝis el la apudaj karceroj.

La gardisto zorgeme leviĝis, kaj piedpintis al la pordo de la karcero, kaj ĝin malslosis per la ŝlosilo, kiu pendis ĉe lia zono. Abdallah silente eliris nudpiede, kaj gestante al la ĉielo por ripeti sian juron, glitis tra la korto, sur la eksteran vojeton.

Tagmeza silento kaj soleco. En domoj, sur kampoj, la homoj ĉie kuŝis dormantaj post la peza laboro de la mateno. Abdallah sin turnis en la direkto de la tombejo, kaj komencis kuri. Necesis tio, spite la varmon, ĉar estis multo farenda en lia malgranda horo.

En ses-sep minutoj li atingis la tombejon, kaj irinte rekte al la tombo de la sankta ŝejho, ĉirkaŭiris ĝin trifoje, preĝante.

Nun, kun trankvila konscienco, li sin turnis al la dua afero. Ankoraŭ kurante, sed tre zorge, por ne eesti vidata, se troviĝus iu maldormemulo, li ekiris en la direkto de unu el la kampoj, kie probable li trovos la filojn kaj laboristojn de Abd el-Aziz. Ankoraŭ dek minutojn da vojo, kaj li alvenis. Dio estu laŭdata, jen ili. Sur la rando de la kampo kuŝis ses viroj: Fuad

Abd el-Aziz, liaj du pli junaj fratoj Ali kaj Salah ed-Din, kaj tri laboristoj. Ĉiuj profunde dormis.

Abdallah ĉirkaŭrigardis, kaj tuj rimarkis longan tranĉilon uzatan por dehaki la sukerkanojn. Li prenis ĝin, pesis, kaj klinante sin, pikfrapis ĝin en la koron de Fuad. La mortigato ĝemegis, malfermis la okulojn larĝe, kurbigis siajn fingrojn, kaj kuŝis senmove.

Abdallah rigardis la aliajn; ili ne vekigis. Tiam li aliris al Ali, kaj zorgeme sed peze piedfrapis lian nazon tiel, ke la sango elŝprucis. Ali ruliĝis sur la tero, kaj saltis staren. Li rekonis Abdallah, kaj momente turnis sian rigardon al Fuad. Guste kiam lia buŝo malfermiĝis por krii, Abdallah pugnofrapis lian okulon; Ali falis teren, kolizianta kun Salah ed-Din, kiu leviĝis siden, surprizita kaj ankoraŭ duondorma. Abdallah sin turnis, kaj forkuregis. Du-tri momentojn li aŭdis la kriojn de la nun vekigintaj laboristoj, poste, nenion; oni prizorgis, senutile, Fuad.

Dek minutojn poste, li estis jam ĉe la pordego de la policejo. Silento; ĉiu, krom la gardisto, ankoraŭ dormis. Senparole, ili iris al la karcero, Abdallah eniris ĝin, la gardisto reŝlosis la pordon, kaj reiris al sia benko. Li iom puŝis la serĝenton, por ke tiu vekigu; la gardisto opinias, ke estas jam lia vico por dormi.

Pasis unu horo; la leŭtenanto estis ĵus reveninta de sia siesto, kiam alvenis Abd el-Aziz, Ali, Salah ed-Din kaj aliaj familianoj, kriegante, ĵurante venĝon, postulante la tujan mortigon de Abdallah. Estis por ĉi tiu bonŝance, ke li estis fermita en karcero, alie la furiozantoj estus lin mortigintaj spite la policianojn.

La leŭtenanto devis alvoki pluan taĉmenton el apuda kazerneto, antaŭ ol li povis rekvietigi sian poli-

cejon. Tiam, li kolektis la familianojn en sia oficejo por atendi la reprezentanton de la magistrato, kiu, farinte alian enketon tiumatene en la sama distrikto, tiumomente pace dormis en la vilaĝo.

Post lia alveno kun sia skribisto, oni ordonis al ok policianoj stari kun la familianoj de Abd el-Aziz; nur tiam ili malslosis la karceron de Abdallah, kaj lin kondukis al la oficejo.

Abdallah rigardis Abd el-Aziz kun duone subpremita triumfo en siaj okuloj. Ĉi-foje, tamen, la familianoj ne rigardis lin mediteme kaj digne; kontraŭe, ili salte starigis kaj estis sur lin kurontaj; nur malfacile la policianoj sukcesis ilin rekaŭrigi sur siajn kalkanojn.

»Nun, kio estas? Kial ĉi tiu bruego? Ĉu vi estas frenezaj?« diris la reprezentanto.

Haoso; ĉiu volis paroli, krei samtempe. Silentigo flanke de la policianoj. La reprezentanto fingromontris al Ali.

»Tiu homo murdis mian fraton Fuad,« diris Ali. »Ni ĉiuj estis dormantaj sur la kampo. Subite mi sentis teruran frapon sur la vizaĝon — vi ankoraŭ vidas la sangon sur miaj vestoj — kaj mi vekigis. Antaŭ mi staris tiu malbenita hundo; mi ekstaris kaj vidis Fuad senviva sur la tero. Tiam tiu homaĉo frapis min teren kaj forkuris. Mi falis sur Salah ed-Din, kiu ankaŭ vidis lin forkuranta, kaj rekonis lin. Tiam ni vekis la laboristojn, kaj forportis Fuad al nia domo.«

»Frenezuloj!« kriis Abdallah. »O bejo, ĉu vi iam aŭdis tiajn mensogojn? Ĉu malliberulo promenas libere por mortigi eĉ tiajn hundojn?«

»Silentigu lin,« diris la reprezentanto. Oni faris sed ĉi tiun fojon Abdallah eĉ ne rigardis la pugnofrapinton.

»Kaj vi,« diris la reprezentanto al Ali, »kion vi respondas al tio? Ĉu vi frenezigiĝis, aŭ ĉu vi sonĝis?«

»Je Dio kaj je Lia Profeto mi ĵuras, ke lin mi vidis kaj nenium alian! Ĉu mi ne havas okulojn? Ĉu mi kaj mia frato sonĝus la saman sonĝon?«

La reprezentanto fermis siajn okulojn, kaj suspiris. Li kutimiĝis al la mensogado de akuzantoj kaj akuzatoj, sed estis en ĉio ĉi mensogo pli ol ordinara; estis teda afero. Li malfermis la okulojn, kaj ordonis venigi la serĝenton.

La serĝento, aŭskultinte ĉion ĉe la pordo, sciis, pri kio temas.

»O serĝento, ĉu io eksterordinara okazis hodiaŭ?«

»Kiel eksterordinara? Kion via moŝto volas diri?«

»Ĉu malliberulo eliris la policejon, aŭ eĉ sian karceron?«

»*Effendim!*« kriis la serĝento indigne. »Ĉu mi ne faras mian devon? Ĉu mi lasas promeni krimulojn kaj rabistojn?«

Li tamen rigardis, dum frakcio de sekundo, la gardiston, kun eksuspekto en sia okulo.

»Respondu klare: ĉu Abdallah aŭ iu alia eliris la karceron eĉ kelkajn minutojn hodiaŭ?«

»*Uallahi*, neniam!«

Nun ankaŭ la reprezentanto rigardis la gardiston kun ioma malfido. »Ja Muhammad!« li vokis.

»*Effendim!*« respondis la gardisto, kun timego en sia koro; li jam malbenis la impulson, kiu igis lin

riski siajn oficon kaj pension, kaj longari restadon en malliberejo. Tamen, li ekvidis esperon.

»Kaj vi, kion vi faris? Ĉu vi liberigis Abdallah ĉi posttagmeze?« lin demandis la reprezentanto.

»Kial mi farus tion? Ĉu mi estas freneza? Li estis enŝlosita, kaj kiel li forirus kiam la ŝlosilo pendas ĉe mia zono? Rigardu, jen ĝi!« li diris triumfe; evidente por li la ŝlosilo estis klara pruvo pri lia senkulpeco.

»Kaj,« li diris kun subita inspiro, »kiel Abdallah povus eliri la pordegon sen esti vidata de la serĝento?«

Kaj li sin retiris el la diskuto, sukcesinte ŝovi la respondecon sur la ŝultrojn de sia superulo, kiu ja ne povas konfesi, ke dum pli ol unu horo li dormis, tiel ke la tuta malliberularo estus povinta forkuri.

»Vi vidas, via moŝto,« diris Abdallah, preskaŭ ridante, »tiuj filoj de sesdek estas tre ruzaj. Kies sango estas sur la vesto de Ali? Kaj kial la laboristoj ne vidis min? Jen la vero, kaj mi provokas ilin malpruvi ĝin! Tiuj enviuloj Ali kaj Salah ed-Din ĵaluzis siajn pli agajn fratojn; ili volis mem heredi la tutan bienon de sia patro. Ili murdis jen unu, jen la alian, kaj por kovri sian diablan krimon, ili akuzas min — senkulpulon, kiu malutilis al aŭla neniam!«

»Filo de diabloj, vi mensogas! Dio sufoku vin!« kriis la familio de Abd el-Aziz, kaj ili denove saltis feroce al Abdallah. Ĉi tiun fojon eĉ la leŭtenanto devis partopreni la batalon por restarigi ordon. Kiam reestis iom da kvieto, Abdallah daŭrigis preskaŭ fanfarone, dum la reprezentanto rigardis de unu vizago al alia, kun kolera mistifikigo.

»Sed Dio,« daŭrigis Abdallah, »ne permesis tian krimon; Li protestas la senkulpajn kaj la piajn. Ili faris tro; ili volis akuzi homon, ke li faris krimon, dum li estis kilometron for en karcero, kun gardistoj kaj bone ŝlosita pordo. *El-Ĥamdulillah!* Dankon al Dio! Li frenezigis miajn malamikojn!«

La reprezentanto rigardis la leŭtenanton, la leŭtenanto rigardis la reprezentanton, kaj ili ambaŭ kapjesis.

»Forigu ĉiujn,« ordonis la leŭtenanto.

»Vi scias,« li aldonis poste, kiam li kaj la reprezentanto estis solaj, »mi ne surpriziĝus, se tiu Abdallah sin savus tute senpune. Mi estas certa, ke li faris la unuan murdon, sed se ŝajnas, ke Abd el-Aziz kaj liaj filoj mensogis la duan fojon, kial ne ankaŭ la unuan fojon?«

Kaj efektive Abdallah liberigis tute senpune, pro necerteco de atestaĵo kaj reciproka kontraŭdirado de atestantoj. Kaj li estis prudenta: li sciis, ke estos ĉiam danĝere resti en la sama distrikto kun Abd el-Aziz kaj liaj filoj; li translokigis sin kaj sian edzinon tuj al Kairo, kie homo, kiu havas malamikojn, povas malaperi.

Por atingi la perditan oazon Siŭa, oni devas trajne aŭ aŭtomobile veturi tricent kilometrojn okcidenten de Aleksandrio, tra la dezerto borde de la maro. Tiam oni atingas la vilaĝeton Mersah Matruh, al kiu oni alportas akvon ŝipe ĉiusemajne el Aleksandrio; oni sin turnas sud-okcidenten kaj veturas ankoraŭ tricent kilometrojn tra mortega dezerto, senvoja, senhoma, preskaŭ senputa.

Tiu nord-afrika dezerto estas plata preskaŭ preter imageblo. Se vi povas bildigi al vi, kiel aspektas la mondo al mikrobo sidanta meze de flavbruna bilardtablo, tiam vi havas palan ideon pri tiu senfina plataĵo, kiu ŝajnas tratanĉi la ĉielon. Direkto perdas signifon meze de tiu sensigna, sensanĝa etendaĵo, kaj oni sin gvidas laŭ la kompasoj nur pro religieca fido. Timiga, kiam oni pensas, ke ĉiuminute oni pli kaj pli malproksimiĝas de homoj, de arboj, de akvo, de ĉio formhavana kaj rekonebla. Terura, kiam jam frumatene la suno sternas ĉiuflanke fantomajn miraĝojn, kiuj diable sugestias pri akvo, ripozo, malvarmeto, neniam atingeblaj. Ĉio dronas en la flave senkolora lumo, sub kiu vidiĝas nenia ombro; via aŭtomobilo ŝajnas naĝi tra senfina universo el orflava varmego, albloviganta forne.

Tamen, homoj kuraĝas transiri tiun dezerton, por alporti leterojn al la egiptaj ŝtatservistoj en Siŭa; nun per aŭtomobilo, sed antaŭnelonge per kamelo. Oni rakontas, ke tiun laboron entreprenis du fratoj, kiuj ekiris sur siaj kameloj alterne. La vojaĝo daŭris dek tagojn, do revenante, la unua frato renkontis en la kvina tago la duan; tiel ili vidis unu la alian dufoje en tri semajnoj. Oni plue rakontas, ke ili eĉ ne haltis por konversi en la mezo de tiu dezerto; nun ŝvingis la manon, kaj pluiris.

Tamen, ne tute senviva estas tiu dezerto. Unu-dufoje dum la transiro, se vi havas bonajn okulojn, vi perceptas kelkajn ombretojn glitantajn proksime de la horizonto. Vi sulkigas la okulojn, kaj vidas, ke areto da gazeloj forkuras.

Kaj ne tute plata. Ĉar post duono de la vojo, oni alvenas al subita rompo en la tersurfaco; la dezerto haltas, kaj rekomenciĝas unu metron pli alte, formante klifeton longan je mi ne scias kiom da centoj da kilometroj. Tamen, eĉ tie ĉi ne estas ombro aŭ ripozejo, krom ĉe unu loko, kiun konas la dezertanoj. Ĝi estas kavaĵeto, kiu povas ŝirmi kvar homojn de la suno je tagmezo. Tio, kaj nenio alia; la sola ombro en senfina vasto.

Tie oni haltas unu horon por eligi la lumon el la okuloj, kaj manĝi. Tiam antaŭen, horon post horo, ĝis malfrue en la posttagmezo, kiam aperas la unua el la montetoj, kiuj gardas la vojon, kiu malsupreniras al Siŭa. Malsupreniras; ĉar la oazo kuŝas ducent metrojn sub la marnivelo, kaj — oni tion facile kompreneblas — estas varma loko. La montetoj plimultiĝas; ili ĉiuj havas la saman formon: longa piramido, kun

la supro fortranĉita horizontale je mezalto. La vento kaj sablo de jarmiloj skulptis ilin en formojn simetriajn, arkitekturajn; oni devas alvoki sian racion por ne kredi, ke tio estas la laboro de homaj manoj. Kaj inter tiuj kolosaj ŝajno-temploj de forgesita raso, la vojeto serpentumas ĉiam malsupren al la perdita oazo.

Perdita dum mil jaroj. La antikvaj egiptoj, grekoj kaj romanoj konis ĝin. Tie oni lokigis la plej faman orakolon de la antikveco: en la templo de Jupiter-Amono. Ĉi tien venis Aleksandro por konsulti pri sia sorto; oni profetis al li oni ne scias plu kian gloron, kaj de tiam komenciĝis tiu frenezo, kiu kondukis lin al sia morto milojn da kilometroj for.

Kaj tiam perdiĝis la oazo. Oni ne plu sciis, kie ĝi troviĝas, kvankam estis ĉiam legendoj pri ĝi, kaj oni trovis menciojn en la antikvaj libroj. La flamaĵ propagandistoj de Islamo ĝin retrovis, enradikigis la novan fidon kaj reperdis ĝin. Ĝis la fino de la dek-oka jarcento, kiam iu freneza germano aŭ anglo sukcesis ĝin atingi — kaj reveni viva. Reveni viva estis maloftaĵo; la berberaj indiĝenoj feroce forpelis fremdulojn, kaj krome estis pli ol ordinare fanatikaj mahometanoj; kaj ili tuj mortigis *el-kelb el-nasrani*, la kristanan hundon, se ili kaptis lin en sia urbo. Eĉ ĵus antaŭ la milito de 1914, estis ankoraŭ danĝere por eŭropano, kaj tre malmultaj tien iris.

Fine ni vidis, etenditan sub ni, la oazon mem. Ĝi estis vasta, proksimume kvardek kilometrojn larĝa; ĉe la horizonto ni vidis grandan salan lagon, kaj preter ĝi, la dunojn de la vera Saharo. Kaj tuj antaŭ niaj piedoj estis tio, kion ni apenaŭ esperis vidi denove: verdo — verdaj palmaroj, verdaj olivarboj, verdaj ĝardenoj, kaj ni eĉ vidis la putojn, de kiuj dependas

la vivo de la trimil enloĝantoj, ĉar neniam pluvas en Siŭa.

Kaj tiam nia gvidanto donis al ni nian unuan surprizon. Li kondukis nin al strangforma monteto — ĝi aspektis kiel litkovrilo sub kiu oni sternis multajn orangojn — sur kies flanko estis hotelo, tute reala hotelo. Vere, ke ĝi estis konstruita el salo kaj koto, kiel ĉiuj siŭaj domoj, kaj la tegmento el palmotrunkoj; sed interne estis perfekta kombino el la barbara oaza komforto kaj la civilizita komforto; kaj la fenestrojn kovris drat-gazo por protekti kontraŭ la dangeŝaraj malariaj moskitoj.

Nur la proksiman matenon ni rimarkis, ke tiu monteto, taŭge nomita Monteto de la Mortintoj, konsistas nur el egiptaj tombejoj de la faraona epoko; apud ĉiu sulko sur la surfaco oni trovas la pordetojn de la elĉizitaj kavoj, kaj ĉie sur la tero kuŝas miloj da homaj ostoj kaj kranioj. Ni tamen dormis bone ĉiunokte.

Enirinte la hotelon, mi rimarkis, kun plua surprizo, serviston, kun la aspekto de la bone edukita egipta *sofragi* — la tipa tabloservisto, en longa blanka robo, larĝa ruĝa zono, kaj fezo. Li estis alta kaj svelte digna; lia vizaĝo estis malgrasa kaj tre bruna, preskaŭ nigra, sed tute ne havis negrajn karakterizaĵojn.

Mi alparolis lin arablingve, kaj li ĝentile respondis.

»Saidah, ja sidi! Mfodlak, ŝil eŝ-ŝantah guŭa, ŭa gibha andi. Saluton, o sinjoro! Bonvolu porti la valizon internen, kaj donu ĝin al mi.«

»Hader, ja hadritak! Volonte, o honora moŝto!«

li respondis, kaj rapide, silente li eliris al la aŭtomobilo, kaj enportis niajn pakaĵojn.

Ni falsidis sur kanapon, suspirante, kaj komencis admiri la pajlomatojn kaj aliajn oazajn fabrikaĵojn, per kiuj la hotelo estis gaje ornamita. Subite oni alparolis min en perfekta angla lingvo.

»*Excuse me, Sir, but would you like to go up and wash now, or would you prefer me to bring you a cup of tea here first?* Pardonu min, sinjoro, sed ĉu vi deziras iri al via ĉambro por vin lavi nun, aŭ ĉu vi preferas, ke mi unue alportu tason da teo ĉi tien?»

La voĉo kaj la stilo de la frazo estis tiaj, kiajn oni atendus de kultura anglo. Mi ĉirkaŭrigardis la ĉambron suprizite, ĉar la voĉo malsimilis tiun de nia gvidanto. Sed estis neniu tie krom la *sofragi*. Mi do returnis al li la okulojn nekredome. Li sin klinis, kaj ripetis »*I was just saying, Sir, that perhaps you would prefer a cup of tea before washing.* Mi ĵus diris, sinjoro, ke eble vi preferos trinki teon antaŭ ol lavi vin.»

Mi malfermis la buŝon fiŝe du-trifoje, kaj subite hontis, ke mi estas parolinta al li komence per mia fuŝa egipta dialekto; samtempe, mi aprezis la takton, kiu igis lin unue respondi arablingve, anstataŭ tuj angle.

»*Er — yes, perhaps I would. Thanks.* Eble jes. Dankon.« mi balbutis; kaj mi ne estas tute preta ĵuri, ke mi ne iomete ruĝiĝis. Tian efikon havis lia kultura voĉo kaj la nuanco de la universitato Oxford. Tamen, nenio estis impertinenta aŭ riproĉa en lia rigardo; tute respektema, kiel ĉe perfekta angla servisto.

Jen estis problemo, kiu tre interesis min. Mi sciis, ke en Siŭa troviĝas nur berberoj, parolantaj berberan

dialekton tre antikvan, ĉie alie formortintan, kaj ĉe la viroj, ankaŭ iom la araban lingvon. Sed preskaŭ nenian kontakton ili havis kun eŭropanoj, kaj mi ne ekspektis trovi eĉ la fuŝ-anglaĵon de la drogmanoj. Mi estus ŝatinta demandi rekte al la *sofragi* mem, sed al tia digna homo anglo ne kuraĝas fari personajn demandojn. Mi decidis postuli klarigon de nia gvidanto, kiu estis ankaŭ la posedanto de la hotelo, kaj konis ĉiun en la Okcidenta Dezerto jam de tridek jaroj.

Tamen, atendis min ankoraŭ alia surprizo. Kiam ni estis trinkantaj nian teon, la *sofragi* revenis, kaj diris kun sinklino, »*Your rooms are ready, Sir. Would-jer like to 'ave a look at 'em?* Viaj ĉambroj estas pretaj, sinjoro. Ĉu vi ŝatus ilin rigardi?« Certe tute ordinara frazo ĉe servisto; sed jen la surprizo: la unua frazo estis belakcenta, la dua en la trenvoĉo, kun la malbona gramatiko, de la needukita londonano. Mi dankis lin, kaj sekvis al la supera etago, tute mistifikita de tiu nigra berbero, loĝanta meze de la Saharo, kiu parolas jen kiel angla klerulo, jen kiel londona stratvendisto.

Post la vespermango, nia gvidanto klarigis la aferon. Ali, la *sofragi*, estis knabo sesjara en 1915, kiam la anglaj soldatoj, batalantaj kontraŭ la militema sekto *Senusija*, alvenis en Siŭa. Guste tiam la gepatroj de Ali mortis. La soldatoj rimarkis iun tagon la malpuregan, malsatan bubon, kaj donis al li mang-aĵojn. Post tio, estis jam neeble forigi lin. Li revenis ĉiutage por peti mang-aĵon, kaj fine la soldatoj tiom ekŝatis lin, ke ili decidis lin adopti talismano de la bataliono. Ili sciis jam, ke liaj gepatroj estas mortintaj, do estis neniam malfacilaĵo.

Ili vestis lin per ĉifita soldat-jako, kiu varmigis

ankaŭ liajn maleolojn. Ili banis lin, kaj instruis al li belecon de la sinlavado. La soldatoj apartenis al sekcio de kirasitaj aŭtomobiloj, kaj la knabeto tre ĝuis la veturojn en tiuj ferocaspektaj drednaŭtoj de la tero.

Li eĉ iris en batalon kun ili. La *Senusija* estas mahometana sekto, tre puritana kaj militema, kiu jam delonge volis konkeri Egiptujon. Ili loĝas malproksime de la civilizacio, meze de la dezerto, kaj kutime rifuzas ĉiun kontakton kun kristanoj. La priokupoj de Anglujo dum la milito de 1914 ŝajnis doni al ili bonegan okazon por ataki la okcidentan bordon de la Nila valo, kaj oni devis sendi en la Okcidentan Dezerton milojn da soldatoj, egiptaj kaj anglaj, por ilin repeli. Ali do havis tre ofte okazojn por vidi la kurantajn dezertajn batalojn, kaj dufoje li eĉ vundigis, malgrave, per fusilkuglo. La soldatoj ameme kuracis lin, kaj kudris al la maniko de lia jakto du orajn galonetojn, la signojn, kiujn rajtas porti vunditaj soldatoj.

Dume, li lernis la anglan lingvon, kaj ankaŭ la gvidadon kaj riparadon de la kirasitaj aŭtomobiloj. La duan aferon li tre bone ellernis; tiel bone, ke oni nomis lin Ali Ford, honore al la granda usonano, nomo kiun li ankoraŭ portas, forgesinte ŝajne la nomon de sia patro. Sed la unuan aferon, la anglan lingvon, li ne tiom bone sciis: liaj soldataj kamaradoj estis nekleraj londonanoj, kaj iliajn akcenton kaj gramatikon li alprenis.

Post ioma tempo, la sekcio estis forordonita al Egiptujo, poste al Palestino, fine al Irako. Cien iris Ali Ford, talismano de la tuta bataliono. Li kreskis, plifortigis; la soldatoj havis specialan metodon por doni al li korpan ekzercon. Ili elmetis lin el la aŭto-

mobilo meze de la dezerto, adiaŭis lin, kaj foriris, ne tro rapide. Kriante, plorante, blasfemante, Ali Ford kuregis post la aŭtomobilo; kaj kiam laŭ la opinio de la soldatoj, li havis sufiĉan ekzercon por hodiaŭ, oni haltigis la aŭtomobilon, kaj lin reprenis en ĝin.

Tiam oni avancis lin: li fariĝis servisto de oficiro, kaj forpasis el la vivo de la ordinaraj soldatoj. Kun la oficiroj li lernis tute novan vortaron, novajn voĉnuancojn, pli korektan gramatikon; fine, li plejofte parolis kiel lingve purema universitatano. Tamen, de tempo al tempo, la lingvo de sia plej frua juneco reinfluis lin, kaj tiam li parolis per tre komika miksaĵo, tiu kiu estis min surprizinta. Sed ambaŭ dialektojn — la londonan kaj la Oxford-an — li parolis perfekte, kiel vera anglo.

La oficiroj, kiujn li servis, restis aŭ en Palestino aŭ en Egiptujo, ĝis 1920. Tiam oni maldungis Ali Ford, bedaŭre; por li ne estis loko en Anglujo.

Unue li serĉis laboron kiel servisto al aliaj oficiroj; kaj dum ioma tempo li tiel sukcesis. Sed estis en li io tro nekutima: la kombino el nigra haŭto kaj egipta vestaro, kun tiu kultura angla parolado, ŝokis, embarasis la oficirojn, kiujn li servis: ja neniu malŝatas neatenditaĵojn pli ol profesia oficiro. Ali drivis de unu posteno al alia; kaj lia lasta dunganto estis kolonelo, ruĝvizaĝa, kun longaj grizaj lipharoj, kiu estis akirinta neniun novan ideon jam de la Hinda Ribelo. Ĉe li Ali restis unu tagon kaj kvaronon. Estis en Aleksandrio, kaj dum la unua tago de lia servado, la kolonelo ekdeziris rigardi la ŝipojn enirantajn la havenon. Li do ordonis al Ali, en tiu angla-araba jar-gono, kiun parolas britoj en Egiptujo, »*Hat ezaz!*

Donu vitraĵon! « *Ezaz* aŭ vitraĵo, en tiu dialekto, povas signifi: vitro, glaso, botelo aŭ io ajn el vitro. La kompatinda kolonelo preskaŭ saltis el la haŭto, kiam sonis el tiu indiĝeno (ĉiu brunulo aŭ nigrulo estas »indiĝeno«, laŭ brita oficiro, eĉ en Anglujo!) delikate modulita frazo: »*Certainly, Sir. Telescope or binoculars? Volonte, sinjoro. Teleskopon aŭ binoklon?*«

La proksiman matenon, Ali nur malfrue alportis la matenmanĝon de al kolonelo, kiu kriis kaj blasfemis, laŭ la kutimo de koloneloj. Ali Ford respekteme sin klinis, kaj diris digne: »*I'm extremely sorry, Sir; I was taking my morning tub. Mi tre bedaŭras, sinjoro; mi estis prenanta mian ĉiumatenan banon.*« La frazo, *to take one's morning tub*, estas karakteriza frazo de la aristokrata kaj burĝa klasoj; la laboristoj esprimus la ideon alie. Kiam la kolonelo retrankviligis (li estis en granda danĝero de apopleksio), li tuj maldungis Ali Ford: »indiĝeno« kiu parolas la anglan lingvon klare kaj estas tiom pura, ke li sin banas ĉiumatene, estas anomalio, kiun ne povis toleri lia ne tre elasta mondrigardo.

Post tio Ali malesperis pri taŭga laboro ĉe la britaj oficiroj, kaj decidis reiri al sia oazo kaj tie loĝi. Mia informanto, la posedanto de la hotelo, tie trovis lin, kaj tuj dungis, ĉar sperta servisto estis tie altvalora, kie troviĝis nur berberoj. Ĉar venis turistoj maksimume unu fojon en monato, Ali Ford ne havis multe da laboro, kaj nur malaltan salajron, sed lia patrino laboris por subteni lin, farante lanajn galabiojn; kaj baldaŭ li edziĝis, kaj ankaŭ lia edzino laboris por plenigi la poton. Tamen, verŝajne, la lasta eksperimento ne tre bone sukcesis; nia gvidanto informis nin, ke Ali eksedziĝis antaŭ du-tri semajnoj.

Nu, post tia historio mi ĉpenaŭ kuraĝis ordoni al Ali, ke li alportu teon aŭ purigu miajn ŝuojn; mi ja diris, ke li aspektis kiel perfekta angla servisto, kaj tio sufiĉe priskribas lian sintenadon. Sed baldaŭ mi povis pli facile interrilati kun li; la hotelestro estis ofte okupita pri siaj aferoj, kaj ne povis nin gvidi tra la oazo, kaj Ali anstataŭis lin. Tiam ni povis alparoli unu la alian kiel egaluloj, kaj mi estis multe pli feliĉa. Cetere, li estis perfekta gvidisto: la siŭanoj ja estis lia popolo, kvankam li rigardis ilin de alte.

»Ili estas bonaj homoj, sinjoro«, li diris, »sed tre mankas al ili la eduko. Ili estas necivilizitaj personoj. Ekzemple, rigardu tiun virinon, kiu eĉ ne kuraĝas rigardi vin eŭropanojn; ŝi, kiel ĉiuj aliaj virinoj, eĉ ne parolas la araban lingvon. Eĉ la viroj parolas ĝin tre malbone.« Aŭ alian fojon: »Rigardu tiun kranion de azeno, kaj tiun noktovazon, fiksitajn sur la muro de la domo. Ĉu vi kredus, ke oni metis ilin tien por protekti la domojn kontraŭ la diabletoj? Kaj kion vi pensas pri tiuj infanoj, kiuj forkuras, kriante kaj svingante la manojn, kiam vi aperas?«

»Nu,« mi respondis, »ili ŝajnas al mi tre gentilaj; rigardu, kiel ili mansalutas al ni ĉiam.«

»Jes,« diris Ali, »tiel ŝajnas al vi, sed efektive ili kredas, ke ĉiuj 'kristanaj hundoj' havas la malbonan okulon, kaj ili direktas al vi la fingrojn por forgesi la malbonŝancon, kiun vi kaŭzos al ili. Ili estas terure malkleraj homoj, sinjoro.«

Li kondukis nin tra la tunelaj stratoj de la urbo Siŭa, kaj la forlasita urbo Aghurmi, kiu enhavas la ruinojn de la templo, kiun Aleksandro vizitis, kaj kiu estas enloĝata de fantomoj jarmilaj. Ali sciis multe pri sia oazo, kaj ĉion klarigis elegante. Ni feliĉe

havis intimajn spertojn pri la vivo de la oazanoj, kiajn alie ni ne estus povintaj havi.

Spite sian malestimon pri la berberoj de Siŭa, Ali tute ne estis humila pri si mem. »Rigardu,« li unufoje diris, »kiel nigraj estas multaj el la oazanoj. Ili« (li ĉiam diris »ili«, neniam »ni«) »kutimis enporti negrajn sklavojn, kaj interedzigis kun ili. Nun tre malmultaj estas pursangaj. Mi tre dubas, ĉu oni iam povos civilizati ilin.«

Iom post iom ni fariĝis pli intimaj, kaj mi kuraĝis demandi, kial li eksedzigis. Li parolis tute mal-kaŝe pri la afero; milde, kompreneme, juĝe.

»Si estas tre bonkora virino, sinjoro, mia eks-edzino. Sed bedaŭrinde ŝi nenion scias. Kiel ŝi povus? Si ja neniam eliris la oazon; ŝi ne vojaĝis. Baldaŭ ŝia babilado tedis min; ŝi parolis sensencajn aferojn. Kion mi faru? Viro ja bezonas inteligentulinon kiel edzinon.«

»Kion ŝi faras nun?«

»Si reiris al siaj gepatroj; sed,« li aldonis bedaŭreme, kun la rigardo sur la tero, »ŝi estas tre malfeliĉa.«

Nu, post tre mallonga tempo, nia vizito finiĝis, kaj estis tempo reiri al Mersah Matruh. Sed antaŭ ol foriri, mi havis unu pluan revelacion pri Ali Ford.

En la mateno, dum ni estis pakantaj niajn valizojn, mi aŭdis virinajn ploron kaj singultadon sur la korto. Mi metis la kapon ekster la fenestron, kaj vidis virinon, junan, belan, en la uniforma vesto de Siŭa: vindaĵo kun largaj, malpale bluaj kaj grizaj strioj. Ŝi estis parolanta al Ali Ford, kiu rigardis ŝin kun pensema, senemocia vizaĝo. Mi nenion komprenis el ŝiaj paroloj, ĉar ŝi parolis berbere; sed evidente ŝi

petegis lin pri io. Baldaŭ la sonoj ĉesis, kaj versaĵne ŝi foriris.

Kiam Ali estis portinta niajn valizojn en la aŭtomobilon, mi kuraĝis demandi al li, ĉu tiu virino estas lia edzino.

»Jes, sinjoro,« li respondis, »tiu sinjorino estas mia eksedzino. Ŝi petadis, ke mi reprenu ŝin. Estas terura malhonoro, esti resendata al siaj gepatroj.«

»Kaj kion — se vi permesas la demandon — kion vi intencas fari?«

»Nu, kion mi povas? Mi ne povas vidi ŝin tiel malfeliĉa. Mi promesis reedziĝi al ŝi; mi esperas, ke ŝi estos trankvila. Kion povas fari viro, se virino tiel petas?«

Efektive; aŭ, pli ĝuste, kion povas fari ĝentilhomo, kiu klare parolas la anglan lingvon kvazaŭ angla ĝentilhomo, se virino petegas lian amon? *Noblesse oblige*, eĉ en Siŭa.

Tiam ni ekiris el la oazo, kaj dum senfinaj horoj soife veturadis tra ŝtona kaj sabla flavejo, kie pecoj de la tero flotas miraĝe en la ĉielo, kaj la ĉielo eniĝas en la teron, aspektante kiel allogaj, malvarmetaj lagoj; ĝis kiam, en la sunsubira lumo, ni subite rondiris la ŝultron de monteto, kaj vidis antaŭ ni la bluegan Mediteraneon.

L A S V A T A N T O

En Eŭropo oni plej nature kaj facile amikiĝas al fraŭlino se oni estas fraŭlo; la honestaj knabinoj ne kutimas altiri la atenton de la edzoj. Kontraŭe, en Egiptujo, mi konatiĝis kun Nigma ĝuste tial, ke mi ne estis fraŭlo, sed respektinda kaj sendangera edzo. Se oni vidus ŝin parolanta al mi (diskrete, kompreneble, sen troa ridado), tamen ne povus esti skandalo; se oni estus vidinta ŝin babilanta kun juna senedzina viro, ŝia reputacio estus ruinigita por ĉiam, kun, por egiptino, teruraj sekvoj.

Iam mi instruis en knabina lernejo, kaj tie, en la porinfana fako, instruis ankaŭ Nigma Jusef. Mi tuj rimarkis ŝin, ĉar inter siaj taskoj, ŝi devis ankaŭ prizorgi la tabelon de la lecionoj por la duagradaĵ klasoj, kaj mi devis aranĝi mian laboron konsulte kun ŝi.

Si tiam havis proksimume dudek-kvin jarojn, kaj estis mezalta, kun korpo svelta kaj tre gracila; kaj kiam ŝi forgesis, ke ŝi devas imiti la eŭropajn sinjorinojn, ŝi sin movis sufiĉe bele. Kion plu? Tre nigraj haroj — longaj, kompreneble; grandaj nigraj okuloj, blankegaj dentoj, lipoj iomete tro largaj, haŭto malpale bruna. Si ofte ridis, kaj ŝia esprimo estas afable mokema. La voĉo estis iom raŭka, sed ne malagrabla; ŝi estis helpema, kaj ŝajnis bonkora.

Kun mi ŝi evidente volis amikiĝi, pro du kialoj: unue, ŝi ŝatis ĉion eŭropan, kaj kompanse malŝatis preskaŭ ĉion egiptan; due, mi flue parolis la francan lingvon, kaj ŝi tute ne parolis la anglan lingvon. Simile al tre multaj egiptinoj el la »respektindaj« familioj, ĉu mahometanaj, ĉu kristanaj, ŝi estis edukita en franca lernejo — ĉu laika, ĉu religia, mi ne plu memoras. Kredeble religia, ĉar Nigma estas koptino, kaj la koptoj preferas la kristanajn lernejojn.

Ce nia unua intervjuo, la franca lingvo tuj faris ligon inter ni; mi ĝojis, ĉar mi povis paroli al ŝi senpene, anstataŭ paroli malrapide kun iu, kiu apenaŭ komprenas la anglan lingvon; ŝi ĝojis, ĉar ŝi povis rilati kun eŭropano.

Tamen, la unua interparolado ne estis sen danĝero. Kiam ŝi estis aranĝinta la horojn de miaj lecionoj, ŝi diris al mi, kun la surfaca rideto de tiu, kiu estas preta ofendiĝi: »Vi ne ŝatas akcepti ordonojn de virino, ĉu? Kaj precipe de brunulino kia mi?«

Evidente komplimento estis necesa, kaj mi faris mian eblon.

»Kontraŭe,« mi respondis, »ĝi faras nuran laboron efektiva plezuro. Kaj, se vi scius kiom mi suferis por brunigi mian haŭton! Gi estas la koloro, kiun mi plej admiras.«

Cetere, en tiu komplimento troviĝis apenaŭ mensoĝeto. Ŝi nomis min flatemulo, sed ridetis kontente; kaj mi rimarkis, ke mi ne estas farinta al mi malamikon. Ŝi diris jam de la komenco la familiarajn *tu* kaj *toi*, kiel tre multaj egiptoj france parolantaj.

Tio estis mia unua percepto pri ŝia preskaŭ malsana sento pri la propra senindeco, ŝia timo pri malrespekto aŭ malestimo; ŝi deziregis esti eŭropanino, kaj

dolore konsciis, ke ŝi estas »nur« (la vorto estas ŝia, ne mia), nur egiptino brunhaŭta. Ŝi mem proponis, ke mi malestimu ŝin, ĉar ŝi bezonis aŭdi mian aserton, ke mi tute ne malestimas ŝin.

Poste, ŝi tre ofte kaptis la okazon alparoli min, kiam mi eliris klasejon post leciono; ŝi kvazaŭ embuskis min, kaj alpafis al mi torenton da francaj frazoj. Tamen, mi ne tro lasis mian viran memestimon fieriĝi; mi sciis, ke ŝi ne persekutas min, ĉar mi estas mi, Noel Mansell; eĉ ne tial, ke mi estas virseksulo; sed nur tial, ke mi estas tre blonda membro de la angla raso; kaj ĉar tio estis honoro, kiun mi partoprenis kun kvindek milionoj da aliaj homoj, mi ne tro vantis mian allogon.

Ŝi parolis pri diversaj aferoj, ne tre interesaj: pri la klimato, pri la lernejaĵ ferioj, pri la karaktero de miaj instruistinoj kaj similaĵoj. Tamen, nia rilato progresis ĝis la punkto, kiam mi povis inviti ŝin tetrinki kun mia edzino kaj mi en nia hejmo.

Ŝi levis la kapon kun rapida rideto, kiam mi diris tion; konfirmante mian suspekton, ke ŝi estas esperinta tiun inviton jam de longe. Tamen, ŝi devis antaŭeviti repuŝon al ŝia fervoro, kaj diris: »Vi estas tre afabla. Sed kial via edzino interesigas pri egipta instruistino? Ŝi ne vere deziras renkonti min.«

Mi estis alkutimiĝinta al ŝi, kaj havis mian respondon preta. »Sed, fraŭlino, mi multe parolis al ŝi pri vi, kaj ŝi senpacience atendas la okazon vin vidi. Ĉu proksiman jaŭdon?«

»Mi ne scias, ĉu mi povos. Petu, ke ŝi sendu al mi invitleteron, kaj tiam mi sciigos vin pri la afero.«

Tion mi ne estis atendinta; sed post momento mi divenis la veron, kiun ŝi ne volis konfesi. Respektinda egipta fraŭlino ne povas viziti amikojn sen la permeso

de siaj gepatroj; kaj Nigma bezonis la leteron por montri al ili kaj por havi la permeson.

Nu, ni sendis la leteron, kaj ŝi respondis, ke ŝi volonte venos, se ŝi povos kunvenigi sian fraton, »ĉar ŝi timas trairi la urbon sola.« Kio signifas, ke ŝi ne estas permesata viziti amikojn sen dueno, ĉu patro, patrino aŭ frato.

Ili alvenis; Nigma estis sin vestinta honore al la okazo. Ŝi portis helan robon, tre modan laŭ la gusto de Egiptujo, kiu estas sufiĉe simila al la gusto de Parizo: altajn kalkanumojn, kiuj iom malbonigis sian belan marŝon, ĉar ŝi ne tute kutimis al ili; kaj en tiu varmega klimato, ŝi portis longajn ĝiskubutajn gantojn. Kaj — kompatindulino! — por impresi mian edzinon, ŝi estis teginta sian vizagon per blanka pudro. Tion ŝi faris por kaŝi sian brunecon, sed ĝi nur donis malsanecon aspekton al ŝia velura haŭto. Mi suspektis, ke ŝi portis la gantojn samkiale.

Post la salutoj, ŝi sidis silente, singardeme rigardante mian edzinon por vidi, ĉu necesas sin prepari kontraŭ rikanoj. Iom post iom ŝi trankviligis, kaj komencis babili, laŭ la kutimo de virinoj en ĉiu lando, pri roboj kaj modoj kaj similaj virinaj aferoj. Dume, mi konversis kun la frato, junulo dudekjara, kiu estis provonta la *Bachot*, kaj estis edukata en franca religia kolegio. Mi miris, kiom la francoj sukcesas stampi la egiptojn per franca aspekto; li parolis kaj gestis kiel franca junulo, kiu kombinas necertecon pri sia valoro kaj pri sia impresado ĉe aliaj, kun la opinio, ke li ĉion scias pri la mondo. Ni parolis pri la literaturo. »Jes« li informis min, »en la angla literaturo estas bonaĵoj, sed entute ĝi ne multe valoras kompare kun la franca. Mankas al la angloj formo, stilo; ili havas geniulojn,

sed barbarajn geniulojn.« Li rigardis min por vidi, kian impreson li faras; mi faris la taŭgan respondon.

»Sed Shakespeare, Milton? Cu estas poezio pli bela, ol ilia?«

Kaj tiel plu: la kutima konkurado kiam franco renkontas anglon.

Nin ne aŭskultis Nigma; ŝi havis pratikan menson, kiu ne malŝparas tempon pri la literaturo. Si estis tiam parolanta pri filmoj kaj la beleco de la aktorinoj.

»Cu vi iam vidis Greta Garbo? Mi pensas, ke ŝi estas bela. Kia blanka haŭto! Ne kia mi, brunulino! Kion mi farus, se nur mi povus esti blonda, kiel ŝi!«

»Sed kial, fraŭlino? Vi sinjorinoj ja estas amuzaj: jen en Eŭropo preskaŭ ĉiuj virinoj volas esti brunaj, kaj sidadas multajn horojn sub la suno por bakiĝi. Ili eĉ pagas grandajn sumojn por kosmetikoj brunigaj. Kaj jen vi kaj aliaj egiptinoj, kiuj volas la kontraŭon! Laŭ mia opinio, la bruna haŭto estas pli bela, ofte, ol la blanka.«

»Ah, sed ne estas la sama afero«, ŝi diris. »Ili estas eŭropaninoj, do ili bone povas brunigi sin, mi estas egiptino.«

Frazo certe neklara, tamen mi ĝin komprenis, ĉar mi estis jam renkontinta la egiptan snobismon pri haŭtkoloro. Ekzistas multaj egiptoj blankaj aŭ preskaŭ blankaj; ili estas la plej feliĉaj kaj malestimas ĉiujn aliajn. Poste, estas tiuj, kies haŭto havas la koloron de kafolakto; ilin ridigas la brunuloj de meza kaj suda Egiptujo. Ĉi tiuj siavice povas moki nur la nubianojn kaj sudananojn nigrajn. Kiujn la sudananoj malestimas, tion mi ankoraŭ ne eltrovis, sed certe iujn. Mi ne surpriziĝus, konstatante, ke tiu

ĉena malestimo trairas tutan Afrikon ĝis Cape Town.

Mi ankaŭ sciis, ke tiu snobismo estas pli forta ĉe la virinoj, ol ĉe la viroj: egipto konsentus edzinigi virinon pli brunan, ol li, sed egiptino ne volas edziniĝi al viro pli bruna, ol ŝi; ŝi tro sentas sian superecon.

»Nu,« mi diris al Nigma, »arangu kun kuracisto, ke li donu al ni vian haŭton, kaj al vi nian, kaj ĉiu estos kontenta!«

Tiu ideo amuzis ŝin, kaj ŝi komencis paroli ankoraŭ pli hejmece. Ŝi naive interesiĝis pri la mebloj, bildoj kaj drapoj de angla hejmo, kaj volis rigardi ankaŭ la subvestojn de mia edzino. La du virinoj foriris en la litĉambron, kaj mi aŭdis viglan konversadon kaj ridojn. La plimulton ŝi admiris, sed ne povis kompreni la simplecon, senornamecon de kovriloj, vestoj kaj similaj aferoj. Ŝi ĉion rigardis, admiris, sed ŝi ne notis por poste imiti; spite ŝian ŝaton pri ĉio eŭropa, mankis al ŝi la risorto, kiu instigus al ŝi eŭropanigi sin.

Entute, la vizito estis sukcesa; Nigma tiom sentis sin senembarasa, ke ni eĉ persvadis al ŝi instrui al ni araban kanton de la felahoj. La penso, ke ni volas lerni kamparanan kanton, longe ridigis ŝin: vere komika ideo; sed fine ŝi ekkantis, iom ruĝigante, ĉar ŝi kantas laŭ la maniero de la neinstruitaj kamparanoj, anstataŭ laŭ la maniero de Badia' Mesabni, la plej moda kantistino en Egiptujo.

Post tio, ŝi pli ofte parolis al mi en la lernejo, sed zorgis ne paroli pri la vizito, se alia instruisto troviĝis en aŭdodistanco. Baldaŭ temis pri revizito, ĉar necesis prezenti siajn eŭropajn amikojn al la familio. Estis aranĝite, ke je unu el la festotagoj ni iru al la domo de ŝia patro.

La egiptoj estas gregemaj homoj, kaj plej feliĉe laboras multope, kune babilante kaj ridante. Ili ŝatas la kunpremon de siaj kunuloj; ekzemple, unu taksio aŭ fiakro ofte devas enteni dek aŭ dek-du homojn samtempe. Same pri la hejmo; la familianoj ŝatas kune vivi, kaj ĉar la egiptaj familioj estas grandaj, ili kunloĝigas nekredeblan nombron da homoj en unu malgranda apartamento.

Tial, kiam oni eniras egiptan hejmon, oni estas prezentata al tiom da familianoj, ke estas neeble memori ĉiujn. Mi do havas nur malklaran memoron pri la personoj, kiujn ni renkontis dum nia unua vizito en la familio de Nigma Jusef, krom pri Nigma mem, ŝia frato, kiun ni jam konis, kaj — plej granda surprizo — angla soldato, serĝento en la regimento tiam deĵoranta en la urbo. La anglaj soldatoj en Egiptujo estas la plej solecaj homoj en la mondo, kaj mi tre miris pri la ĉeesto de ĉi tiu.

Komence la konversado estis malfacila, kiel ĉiam ĉe tiaj internaciaj kunsidoj. La soldato parolis la francan lingvon kun aĉa akcento, sed sufiĉe flue; tamen, ni devis atenti, ke li, mia edzino kaj mi ne komencu privatan konservadon en la angla lingvo pro facileco. La virinoj baldaŭ trovis temon por si: fanfaronado kaŝita pri siaj kudraĵoj, brodaĵoj, trikaĵoj. Mi rigardis longan serion da vestoj, kovriloj, tablotukoj kaj similaĵoj, paciencege broditaj kaj ornamitaj de Nigma kaj ŝia fratino, kaj zorge konservataj en ŝranko, por ke ili ne difektiĝu per la uzado. Mi rimarkis, ke la prudeco de la egiptinoj tamen permesas, ke ili montru tiel siajn kalsonojn kaj similajn intimaĵojn.

Poste, mi sukcesis ne malĝentile paroli kun la

soldato. Li estis juna kaj tre blonda, proksimume dudekokjara, kun brosjaj lipharoj; unu el tiuj angloj, kiuj aspektas ĉiam, kvazaŭ ili ĵus sin banis. Liaj grizaj okuloj estis seriozaj kaj malkaŝaj, kaj mi baldaŭ rimarkis, ke ili sekvas la formon de Nigma pli ofte, ol la aliajn.

»Jes,« li diris, responde al demando mia, »mi konas la familion jam de sep-ok monatoj. La plej aĝa frato estas kontlibristo en la kantino, kiun mi estras, kaj iam li invitis min. Mi estis sufiĉe kontenta akcepti, ĉar ni ne konatiĝas kun multaj homoj en tiu ĉi lando... La franca lingvo? Nu, mi iomete lernis en la duagrada lernejo en Anglujo; kaj mi studis el libro tie ĉi; mi pensis, ke se mi vizitas la familion, mi devus almenaŭ iom paroli kun ili, kaj nur la plej aĝa parolas la anglan lingvon.« Mi suspektis, ke precipe kun Nigma li volis paroli; li estis tiom fremda en tiu medio, ke nur tia kialo igus lin lerni la francan lingvon kaj vizitadi la familion.

Tiam Nigma interrompis nian interparoladon, proponante, ke ni rigardu la familian foto-albumon. Tiu rito estas plenumata de ĉiu gasto ankaŭ en Egiptujo; kaj same kiel en Eŭropo, ĝi tre utilas por ŝtopi truon en la konversado. Tiun celon ĝi trafis, kvankam estis unu momenta embaraso. En la albumo staris foto de egipta oficiro, kun agla vizaĝo preskaŭ nigra; li aspektis tre vireca, efektive bela tipo. Ni tion diris: »Kia bela viro!«

Nigma rigardis nin momente, tute senkomprene. Ni rimarkis, ke ni faris eraron. Sed feliĉe nia eraro amuzis ŝin, kaj ŝi ridegis. »Sed... sed,« ŝi balbutis, »li estas *nigra*! Aŭskultu, patro, ili opinias la nigrulon bela!« Kaj sub la ŝirmo de ŝia ridado, ni ekparolis

pri io alia. Ni petis, ke ŝi ludu iun muzikaĵon per la piano, kiu staris en la sidĉambro.

»Ne, vi ne deziras aŭdi min ludi, ĉu? Kiel egipta muziko povas interesi vin?«

Ni sciis la respondon al tia demando, kaj baldaŭ ŝi ekludis. Ŝi prezentis al ni la plej lastan ĵazaĵon, por montri, ke ŝi scias ion alian, ol la mizera popolkanto, pri kiu ni estis petintaj dum ŝia vizito al ni. Ni aplaudis, kaj ne kuraĝis peti, laŭ nia prefero, pluajn felahajn kantojn.

Post longa vespermango, kaj babilado pri la klimato, pri la lernejaj ferioj, pri la karaktero de ŝiaj kaj miaj instruistinoj, ni foriris samtempe kun la soldato, kiu nomiĝis Felton. Kun li mia edzino kaj mi marŝis al la centro de la urbo, por trafi aŭtobusojn. Kaj dum ni zigzakis tra la mallumaj stratoj, evitante koton kaj azenrajdantojn, ni ĉiuj havis tiun jukon en la animo, kiun oni havas, kiam kunveno ne marŝis bone, kiam la intima fluo de la parolado mankis, kiam oni montris sin malsprita.

Mi singardeme parolis al Felton pri Nigma. »Eksterordinare agrabla junulino, tiu Nigma. Ŝi havas grandan kuraĝon, ĉar ŝi sukcesis venki la antaŭjuĝojn de la familio, kaj laboras ekstere. Maloftaĵo, tio.«

»Je-es,« li parolis malrapide, »ŝi estas alloga knabino. Jes, mi tre ŝatas ŝin. Efektive, —« li haltis, kaj rigardis min serĉe por recertiĝi, ke mi estas tia homo, al kia oni povas paroli sen timi mokon. La anglo ĉiam timas mokon pri siaj amaferoj.

»Efektive,« li daŭrigis, post momento, »mi kelkfoje pensis, ke mi ŝatus promeni kun ŝi.« Li uzis la anglan popolan esprimon por la antaŭfianĉeca interkonigo, kunpromenado, reciproka provado. »Ŝi estas

honesta knabino, kaj serioza.« Subite li konsciis, pri kia temo li parolas, kaj ruĝiĝis; kaj marŝis kelkajn minutojn senparole.

»Nu«, li daŭrigis, kun tiu bezono pri malkaŝa parolado, kiun ĉiu el ni kelkfoje sentas ĉe nekonatoj, »mi ne scias, kion pensus mia familio. Ĉi ja ne estas blonda, tion vi vidis. Tamen, kiel gravas la koloro? Se ŝi estus bona edzino?«

Mi kapklinis konsente; efektive, mi pensis, ke spite la diferencojn pri raso, vivspertoj, medioj, tia edziĝo povus ruliĝadi trankvile. La afero tre interesis min, ĉar edziĝo inter anglo kaj egiptino estas tre malofta; precipe tial, ke ili neniam havas okazon renkontiĝi. Felton kaj Nigma ŝajnis reciproke taŭgaj, ĉar ŝi estis inteligenta kaj pli bone edukita, ol la plimulto el la egiptinoj; kaj li evidente ne havis antaŭjuĝojn pri raso, koloro aŭ lingvo; ili faris, efektive, tre interesan kompromison inter la ideoj, pensmanieroj kaj kutimoj de la du rasoj. Estis videble, ke li ŝatas, preskaŭ amas ŝin, pli ol li vorte konfesis. Mi ne sciis, ĉu ŝi amas lin, sed ŝi tiom admiris ĉion eŭropan, kaj tiom deziris eskapi el ĉio egipta, ke ŝi nepre farus sian eblon por feliĉigi lin.

»Tamen, mi ne deziras nun paroli al ŝi pri la ideo,« Felton daŭrigis; »mi ankoraŭ ne sufiĉe konas ŝin. Mi neniam havas okazon paroli al ŝi sola. Ĉiam estas kun ni aŭ fratino aŭ frato, aŭ alia familiano. Ŝi ŝajne ne komprenas, ke mi deziras paroli al ŝi sola kelkfoje. Mi plurfoje invitis ŝin iri kun mi al kino; ŝi akceptis nur unufoje, kaj tiam venis ankaŭ la patro kaj patrino.«

Nun mi komprenis la malfacilaĵon: spite sian restadon en Egiptujo, Felton ankoraŭ sciis tre mal-

multe pri la moroj de la egiptoj. Fraŭlino neniam povas esti sola kun viro, eĉ en sia hejmo, ĝis kiam li estas jam petinta pri ŝia mano al ŝia patro, kaj paginta al ĉi tiu la doton. Tiam, kelkfoje, li estas permesata pasigi duonhoron sola kun sia fianĉino en la sidĉambro, sed eĉ tiam li ne povas promeni kun ŝi sola, aŭ iri al kino. Mi demandis al mi, ĉu tion mi devus klarigi al Felton; farante tion, mi riskus tute senkuragigi lin; ne farante tion, mi lasus lin en senbaza espero, kaj kaŭzus al li eventuale pli grandan elreviĝon. Nu, mi nenion diris; dum mi estis ankoraŭ pesanta la aferon, ni atingis la haltejon de la aŭtobusoj, kaj disiĝis.

Nu, post tiu tago, Nigma kaj mi havis tute novan temon por konversado, kiam ni renkontiĝis en la lernejo. Pli ĝuste, ni havis nur unu. Ŝi konstante parolis pri Felton, pri lia honesta karaktero, lia blondeco, lia vasta scio kaj kompreno pri la mondo, liaj grandaj kapablaj manoj, lia fortikeco. Mi rimarkis, ke interesas ŝin ne nur la anglo, sed ankaŭ la viro; mi kredas, ke ŝi estis enamiginta al li. Ankaŭ ŝia karaktero ŝajnis ŝanĝiĝi; ŝi ne perdis la iom mallargan elrigardon de la egiptino, sed tamen ŝi estis pli komprenema, pli vivoplena, pli virineca, malpli knabineca; kaj super ĉio, ŝia memfido multe kreskis; ŝi ne plu antaŭvidis rikanojn.

Tiel daŭris du monatojn; tiam finiĝis la lerneja jaro; mi foriris kun la edzino al Aleksandrio por unumonata libertempo, kaj ne renkontis Nigma dum tri monatoj. Kaj kiam mi vidis ŝin en la lernejo, ŝi estis tiom okupita pri la reorganizo de la klasoj, ke tute ne estis tempo por konversado.

Baldaŭ ni invitis, ke ŝi tetrinku kun ni, kaj sen-

dis la kutiman invitleteron. Ĉi tiun fojon venis kun ŝi ŝia edziniĝinta onklino, bela virino, pli juna ol Nigma.

Post la salutoj kaj demandoj pri libertempo, ni komencis paroli pri pasintaj aventuroj, ridi pri komunaj memoroj. Nigma parolis al ni sufiĉe facile, sen embarase, sed ŝi ridis malpli ofte, ol antaŭe. Ŝi diris sarkasmajn frazojn de tempo al tempo; tion mi neniam aŭdis ĉe ŝi antaŭe. Mi rimarkis en ŝia voĉo amaran tonon. Kaj al frazoj pri la varmeco, la belaj ĝardenoj kaj promenejoj de Aleksandrio, la novaj lernantinoj en la lernejo, kaj tiel plu, ŝi respondis sen sia kutima entuziasmo.

Fine, mia edzino turnis la konversadon al temoj pli intimaj. »Kiel do,« ŝi diris al Nigma, »ĉu vi ankoraŭ ne estas edziniĝinta?«

»Kiu volus edzinigi min?« ŝi respondis, kun stranga rideto, kiu ŝajnis al mi kolereta. »La viroj preferas la blankajn virinojn; oni ne deziras negrinon, kia mi.«

Denove tiu obsedo pri la koloro; ĝi estus jam tedinta min, se mi ne estus diveninta suban tragedion. Evidente la aferoj iris malbone.

En Egiptujo ne estas maldelikate demandi pri la aferoj, eĉ la amaferoj, de aliaj; ni do kuraĝigis ŝin, ke ŝi rakontu al ni, kio okazis.

»Sed tiu anglo — ni ja vidis, ke li interesigas pri vi?«

»Ĉu mi scias? Li sendube edziĝis al iu angla fraŭlino, kiu estas pli bela, ol mi. Sed kiel tio gravas al mi?« Ŝi provis rideti, kaj altigis sian belforman nazon kvazaŭ malestime. »Mi estas instruistino, dank' al Dio, kaj tiel mi restos libera ĝis la morto. Mi ne estos la sklavino de iu ajn viro.«

»Sed ĉu vi ne renkontadas lin — ĉu li ne plu venas al via domo?»

»Ne, li ne plu venas; li ĉesigis siajn vizitojn jam antaŭ tri monatoj.« Pro sia manko de memfido, Nigma vidis en tio tediĝon pri ŝi; la anglo trovis ŝin neinteresa, »tro indiĝena«, tro nigra. En la tonoj de ŝia voĉo mi aŭdis doloron kaŝitan, la doloron de virino, kiu senespere deziras viron, kaj maltrafis sian okazon. Kompatinda Nigma; ŝi volis, pli ol iam antaŭe, esti eŭropana, esti edzino, kaj pli ol iam antaŭe, ŝi malesperis pri eskapo el sia teda familia vivo.

Ni provis klarigi al ŝi, ke ne pro malestimo Felton ĉesigis siajn vizitojn, sed pro tute aliaj kaŭzoj.

»Li ja ŝatis vin, Nigma. Sed li deziris koni vin pli bone, lasi, ke vi konu lin pli bone, antaŭ ol proponi la edziĝon. Kaj malfeliĉe tio estis neebla.«

»Sed kiel neebla? Li ja venis al ni ĉiusemajne, ni ofte vidis unu la alian, ni ofte babilis kune. Li estus povinta paroli pri la afero al mia patro — li ne estus postulinta tre altan doton.«

Certe Nigma estis leginta francajn romanojn; certe ŝi sciis, ke eŭropanoj admiras la romantikan amon, volas edziĝon de animoj — kio postulas longan konadon sen la ĉeesto de aliaj. Eble ŝi pensis, ke tio estas nur en romanoj.

»Ne estas eble koni unu la alian profunde, se ĉiam ĉeestas la gepatroj,« mi diris. »Li volis promeni kun vi sola, iri kun vi al kino, paroli libere sen la embaraso de la ĉeesto de aliaj. Kaj supozeble, kiam li trovis tion neebla, li opiniis, ke estas nur unu afero farebla: ne plu vidi vin.«

Surprizis min, ke Nigma ne divenis tion antaŭe, ĉar estas ankaŭ egiptaj junuloj, kiuj rifuzas edziĝi.

samkiale; sed ŝia menso estis irinta en alian direkton. Kiam ŝi aŭdis nian opinion, ŝia vizaĝo esprimis unue nekredemon; poste ĝi aspektis kolera, kaj ŝi ruĝiĝis. Mi supozis, ke ŝi riproĉos al Felton, ke li tion ne diris malkaŝe; sed ne.

»Ĉu tiel? Ĉu tiel?« ŝi fine diris. Miksita kun ŝia kolero estis ankaŭ ia sento pri malŝarĝo; rekuraĝiĝis ŝia memestimo. »Estas ĉiam same ĉe ni. Ni egiptinoj aŭ devas edziniĝi al viroj, kiujn ni apenaŭ konas, aŭ ni tute ne edzinigas, ĉar la viroj ne volas edzinigi virinon, kiun ili ne konas. Tiuj malmodernaj egiptoj! Kial ni ne povas esti liberaj, kiel la eŭropaninoj?«

»Sed, Nigma, kial vi ne insistis iom liberigi? Kial vi ne reinvitas lin nun? Vi povus poste fari tion, kion li petus. Vi ja laboras, vi subtenas vin mem, vi rajtas fari tion, kio plaĉas al vi. Diru al la frato, ke li reinvitu Felton, kaj tiam promenu kaj vin amuzu sola kun li, spite la gepatrojn.«

»Tio estas neebbla.«

»Sed kial neebbla?«

»Ĉar — ĉar ĝi estas neebbla. Ili ne permesus. Kaj kion dirus la najbaroj? Oni dirus terurajn aferojn pri mi, kaj en la tuta vivo neniuj viro volus edziniĝi min.«

Mi komprenis, ke la ribelemo de Nigma eluziĝis; ŝi estis tiom luktinta por labori ekster la hejmo, ke ne plu restis morala forto por la nun necesa batalo. Cetero, se ŝi ja ribelus, kaj spitus la opinion de la familianoj kaj najbaroj, ŝi eĉ ne povus plu okupi sian postenon: en knabina lernejo oni ne volas fraŭlinojn kun malbona reputacio.

»Kion mi povus fari?« ŝi diris malespere. »Mi ne povas akcepti egipton, kiun mi vidis nur dum inter-

paroloj kun la gepatroj, kaj anglo same ne volos akcepti min.»

Ni provis ŝin gajigi, dirante, ke eble Felton revenos, ke estas tre multaj viroj, kiuj volonte edziĝus al ŝi: ni parolis laŭ la hipokrita maniero de la homoj en tiaj okazoj — ni ja sciis, ke apenaŭ estas espero por kompatinda Nigma...

Ŝi ankoraŭ estas en mia lernejo. Preskaŭ ĉiutage ni konversas kaj ŝercas pri la lernejaninoj, la ferioj, kaj similaj temoj. De tempo al tempo ŝi vizitas nin, aŭ ni ŝin; kaj ni tiom intimiĝis, ke ni povas ŝerce nomi ŝin la nigrulino, sudanino, kaj tiel plu. Sed ni ne plu aŭdas pri svatantoj; viroj ne venas serĉi ŝin. Nigma antaŭvidas plurajn jarojn da laboro en la lernejo, ĝis kiam ŝi tediĝos pri tia sencela laboro; kaj tiam ŝi reiros al la stato el kiu ŝi luktis: ŝi estos denove perfekte honesta kaj respektinda fraŭlino, kiu tute dependas de sia familio kaj ne havas fantaziajn ideojn pri la moderna virino, amo kaj edziĝo, kaj promenoj sola kun viro.

E K Z I L I T O

La vagonaro al Medina el-Sughajarah senfine ruliĝadis tra la varmego. Ĝi estis trapasanta dezerton, ĉar Medina el-Sughajarah kuŝas for de la Nila valo, en la nordorienta angulo de Egiptujo; tamen, tiu dezerto ne estas la dunhava, ora dezerto de la romantikaj verkistoj, kiun oni malofte renkontas; sed roka, kruela, grize mortega infero, kiu rebatas la lumon kaj varmon al la okuloj, kaj sendas nubojn el polvo tra la fenestroj de la vagono.

Mi forĵetis tedite la *Bourse Egyptienne* kaj la *Egyptian Gazette*, kiujn mi estis aĉetinta en Kairo, kaj rigardis enue miajn malpurajn manojn kaj vestojn: sur ĉio polvo karba kaj polvo dezerta; eĉ inter la dentoj grincis gruzeretoj. Mi malespere ŝvitadis, kaj deziregis, ke mi ne estu promesinta viziti la esperantistojn en Medina el-Sughajarah. Kelkfoje oni ja tro oferas por la movado. Pli utile sidi hejme kaj verki entuziasmigajn artikolojn, ol fari entuziasmigajn paroladojn en apenaŭ konataj urbetoj. Mi antaŭsuferis de la nervostreĉo kaj laceco, terure oftaj en Egiptujo, kiujn kaŭzas konversado en lingvo, kiun la kunparolanto nur duone komprenas.

La dua horo, la tria; kaj mi soifegas, sed ne kuraĝas mendi la dolĉegan gasakvon, kiun oni ĉie vendas en Egiptujo. La kvara, kaj ankoraŭ ni ruladas, senfine, seninter-

ORA =
Niĉa
John involved

rompe, tra tiu griza forno. Je la kvina, subite, ni ekvidas grizan urbon, super kies tegmentoj kelkaj palmoj senespere sin klinas. Polvoza urbeto, kun domoj duetaĝaj el grizaj kotbrikaj, kun stratoj mallargaj kaj, unuavide, senbutikaj. La urbeto aspektas nefinita: ofte la dua etaĝo de la domo estas nekompleta, ĉar eluziĝis la mono antaŭ kompletigo, kaj ankaŭ la traboj elstarantaj el la plataj tegmentoj kaj muroj ŝajnigas domojn ankoraŭ konstruatajn.

Sur la perono, kie fine ekhaltis la vagonaro, troviĝis nur du homoj portantaj eŭropajn vestojn kun la fezo; mi prave supozis, ke ili estas miaj samideanoj. Unu estis granda viro, iom dika ĉe l' talio, kun ridetanta vizaĝo, grizaj haroj, kaj malgrandaj, melankoliaj okuloj. La alia estis malgranda, kun hakila vizaĝo, blinda en unu okulo pro oftalmio, kiel teruraj miloj da egiptoj.

714
offhandito
long
John involved

La grandulo sin prezentis: Ghobrial Nesim, prezidanto de la grupo. »Ni havas granda honoro de vin akcepti en nia urbo, sinjoro. Vi estas tre ĝentila.« La dua salutis min arablingve, kaj mi respondis per la konvencia »Saidah! Ezajak?... El-Hamdulillah! Saluton! Kiel vi?... Dank' al Dio!«

Laŭ la kutimo de tiaj okazoj, mi tramarŝis la stratojn kun ili, provante samtempe aŭskulti ilin, konvene respondi, diveni laŭ kiu vojo ni devas nin turni, kaj eviti la kamelojn kaj azenojn senĝene paŝantajn meze del' homamaso. La stratoj estas senpavimaj, faritaj el polvo kaj sablo, kaj ĉiu domano kutimas ĵeti siajn rubaĵojn kaj malpurajn akvojn sur la vojon. Plej bone estas marŝi meze de l' vojo, ĉar tie estas malpli da koto, kaj oni malpli riskas ricevi likvaĵon sur la kapon.

Fine ni atingis la domon de s-ro Ghobrial; granda domo, estinta luksa laŭ egipta gusto, kun muroj blue kaj

rozkolore farbitaj. Interne estis malvarmete, kaj kun longa suspiro, ĝentile kaŝita, mi eksidis sur blanka kanapo.

Nun mi ekvidis denove, kaj kiel ĉiam, ĝuis la egiptan gastamon. Vokinte servistojn, mia gastiganto insistis mem doni al mi kafon, limonadon, kukojn kaj biskvitojn. Li ripetis plurfoje la ĝentilajn salutojn, sen kiuj neniu — eĉ ne plej intimaj amikoj — renkontiĝas en Egiptujo: Kiel vi? Dank' al Dio! Vi honoras nin. Estu bonvena! Ĉu vi sanas? Ĉi tiu estas ĝojega tago por mi. Dank' al Dio!

Li parolis en ne tre korekta, sed flua Esperanto; kio mirigis min, ĉar Esperanto estas lingvo tre fremda por la arablingvanoj, kaj Ghobrial ne tre bone komprenis la anglan kaj francan lingvojn. Mi eksciis poste, ke nur lia emocia alkroĉo al Esperanto ebligis tiun fluecon.

Dum ni surface paroladis, mi povis lin pli bone ekkoni. Li havis proksimume kvindek jarojn, sed estis energia kaj juneca. De liaj trajtoj radiis bonhumoro, digno, bonvolo al la homoj; li parolis kun la kvieta sagaco de tiu, kiu vidis malmulton, sed sian malmulton vidis klare. Mi sentis min komforta kun li, senembarasa; nure, de tempo al tempo, min maltrankviligis ia distreco, ia malgaja ombro, kiu forviŝis la rideton de lia vizaĝo.

Mi sciis per lia nomo, ke li estas kopto — unu el tiuj kristanoj flosantaj sur maro mahometana. Krome, oni estis dirinta al mi en Kairo, ke antaŭ kelkaj jaroj li estis riĉulo, kiu subite malriĉiĝis pro la senvaloriĝo de kotono. Ĉion li perdis, kampojn, kotonon, domon; lian domon, en kiu ni sidis, aĉetis lia frato, kaj permesis al li ankoraŭ okupi ĝin. Li laboris en publik-serva kompanio por salajro negranda. Da tiaj historioj oni aŭdas milojn en Egiptujo post la komenco de la krizo.

Li parolis al mi kun granda respekto, kvazaŭ al superulo. Kiam mi unue rilatis kun egiptoj, tiu respekto ŝokis

mĥm, kaj mi volis ĝin eviti. Ĝi ĉiam metis baron inter mi kaj ili. Ĝin forigi estis tamen neeble, kaj al ĝi mi al-kutimigis, kiel al neevitebla ĝenaĵo. Ĝin montras la egiptoj al ĉiuj eŭropanoj, kaj speciale al instruistoj, kia mi, ĉar ĉie en la oriento la klereco estas tre honorata. Tiun emon plifortigis ĉi-okaze la faktoj, ke mi estas konata esperantisto, kaj ke Ghobrial estas kopto, kies esperoj dependas parte de la angloj en Egiptujo.

Tiu sinteno de la egiptoj ĉiam ŝajnis al mi iom patosa; necesa flatado de malfortuloj al venkinta raso. Ĉe Ghobrial, tiu granda, digna, simpla homo, ĝi ŝajnis al mi pli ol ordinare — kion mi diru? »Kompatiga« estas insulta vorto. Ĉu »malfieriga«?

Baldaŭ li prezentis min al sia familio: edzino ankoraŭ bela, kiu parolas la francan lingvon flue, kiel ĉiuj egiptinoj de bona familio; filino dudekjara, forta, bela kaj ridema; kaj dekkvinjara filo, tro grasa sed inteligenta lerneĵano. Ghobrial havis ankoraŭ du filojn, unu en Londono, kiu studas la medicinon, kaj unu en Kairo, kiu studas la juron.

La du virinoj estis interesaj; en malgranda urbo, perdita meze de la polvaj kampoj kaj la dezerto, ili parolis gracie la francan lingvon, interesiĝis pri la franca literaturo, eŭropa muziko, poezio; ili neniam havis okazon priparoli sian intereson kun aliaj, sed tamen ili tenis vivan, kion ili lernis, patrino kaj filino, en la jezuita lernejo de Aleksandrio. Tiaj virinoj troviĝas ankaŭ en mahometanaj hejmoj, sed la fremdulo neniam povas ilin alparoli; nur la koptaj virinoj renkontas aliajn virojn ol la edzo, fratoj, patro.

Baldaŭ estis tempo iri al la grupo, por renkonti la esperantistojn. Kolektiĝis, en tute senornama ĉambro, proksimume deko da viroj (tiajn aferojn neniam parto-

prenas la virinoj), inter kiuj oni prezentis al mi la redaktoron de la loka ĵurnalo. Mi tuj sentis, ke mi pli utile parolus en la angla lingvo, ĉar ili ĉiuj murmure respondis al mia Esperanta saluto, aŭ diris ion rekte en la araba lingvo. Preskaŭ ĉiu edukita egipto pli-malpli komprenas la anglan lingvon, kvankam malmultaj kapablas flue paroli. Tamen, konata esperantisto estas ja konata esperantisto, kaj li devas pruvi, ke la lingvo estas parolebla. Mi sekrete dankis al la Cseh-kursoj, ke ili instruis al mi paroli malrapide kaj simplege.

Per la ruzoj, kiujn scias ĉiu propagandisto, mi sukcesis fari paroladon, kiun ĉiu komprenis — eĉ la ne-esperantistoj; mi manpremis ĉiujn, rezistis per la helpo de Ghobrial ĉiun inviton al la hejmo de la ĉeestintoj, kaj reiris kun li al lia hejmo, kie nin atendis la vespermanĝo.

Ha, tiuj egiptaj manĝoj, sub kiuj la tablo preskaŭ krevas! Mi estis nenion manĝinta jam de la mateno, kaj mi ne malhonoris min eĉ antaŭ la bankedo, kiun s-ino Nesim preparis por mi; ĉiam escepte de moloheja, glutena supajo el speco de alteo (mi kredas), kiun eĉ pro ĝentileco mi ne povis manĝi. Ghobrial, kiel familipatro kaj gastiganto, elektis la plej bonajn pecojn de ĉio por ilin meti sur mian teleron; kaj se hazarde li trovis bonan viandopecon sur sia propra telero, li tuj ĝin forkis kaj donis sur mian.

Post la manĝo, ni iris sur la tegmenton, por ĝui la freŝan venteton, kiu nepre beligas la egiptan nokton kaj por babili komforte. Tie ĉi, per trankvila voĉo, kun manoj falditaj sur la ventro, li komencis paroli pri egipta politiko, transiris al la sorto de la koptoj sub mahometana registaro, de tio ĉi al la araba literaturo, kaj al Esperanto. Dum li parolis, mi komencis kompreni la kaŭzon de tiuj ombroj, kiujn pli frue mi rimarkis sur lia vizaĝo.

van gram
glutena
kegtoj
glutena
heemste
plant
ork
malve

»Aŭskultu, kara sinjoro Mansell, ni havas kaj ĉiam havos mahometanan registaron. Ili neniam amis nin. En la komenco ili promesis respekti nian religion, sed samtempe punfrapis ĉiun, kiu ne ŝanĝis sian religion. Tiam ili kutimis havi plurajn edzinojn, ni — nur unu; kaj nun estas dekkvin mahometanoj por ĉiu kopto. Nun estas pli bone; antaŭ la leĝo ni estas egalaj; sed ĉu iam kopto atingas la plej altajn oficojn?»

»Nu, vere; sed tio ŝanĝigos, kiam la Nacia Partio formos la registaron; finfine, ĝi bezonas la apogon de la kristanoj, kaj la vic-ĉefo de la Partio ja estas kopto, ĉu ne?»

»Sinjoro Mansell, mi marŝas ĉiutage sur la strato, kaj ĉiu salutas min ĝentile, ĉar ĉiu min konas en tiu ĉi urbo. Salutas ĝentile ankaŭ la mahometanoj. Sed en siaj koroj ili pensas, »*El-kelb el-nasrani!* Kristana hundo!« Eble, ili respektos nin estonte, sed ĉu mi povos forgesi, ke ili forprenis nian landon? Ni, la koptoj, estas la filoj de la antikvaj egiptoj, kaj ni estas ekzilitoj en nia propra patrujo.»

Mi rimarkis, ke li parolas kun ia subpremita amareco, sen ekscito, pri temo longe primedita. Kvazaŭ li serĉis longe iun, neŭtralulon, al kiu li povos rakonti la suferon de sia popolo. Devige la koptoj estas suspektemaj homoj, kiuj malofte kuraĝas paroli malkaŝe.

»Sinjoro,« li daŭrigis, »ĉu vi komprenas, ke mi eĉ ne havas lingvon? Ili devigis nin paroli ilian lingvon, kaj ni forgesis la koptan lingvon. Ĉu mi estas arabo? Kial mi parolu fremdan lingvon altruditan? Ĉu vi komprenas, ke mi ne volas paroli la lingvon de niaj subpremantoj? Sed kian alian lingvon mi havas? Iam mi pensis lerni la koptan lingvon, sed al kiu mi povus paroli? Eĉ multaj

el niaj pastroj komprenas ĝin nur sufiĉe por legi la Bibliion.»

Li silentis momente, sidante en la mallumo senmove. Super ni brilis la sennombraj steloj de egipta nokto; de apuda strato aŭdiĝis el kafeja radioaparato araba muziko, en gamoj, al kiuj mia eŭropa orelo ankoraŭ ne tute alkutimiĝis... Mi ekkomprenis la konvertiĝon de Ghobrial al Esperanto, kaj denove miris pri la diverseco de la kialoj, kiuj varbas al ni adeptojn.

»Vi estas la unua alilanda esperantisto, al kiu mi iam parolis. Vi donis al mi tre grandan ĝojon, ĉar mi vidas, ke la esperantistoj ne estas samaj, kiel la aliaj. Vi ne malestimas nin. Vi aŭskultas min; vi komprenas miajn ĝenojn. Vi ne estas fiera. Vi komprenos, kiom kore kaj profunde mi dankis al mia Dio, ke li kondukis min al Esperanto. Sinjoro, Esperanto estas la lingvo de ĉiuj homoj, ĝi ne estas la lingvo de subpremantoj. Sinjoro Mansell, mi volas paroli ĉiam nur Esperanton, mi volas forgesi ĉiujn aliajn lingvojn. Mi havas korespondantojn en multaj landoj, ili skribas al mi regule, kaj mi konservis ĉiujn iliajn respondojn. Ili estas miaj fratoj, pli ol miaj samlandanoj.»

Kion mi povus respondi? Kiel anglo, kiel esperantisto, mi ne volis aprobi plendojn kontraŭ la registaro; mia rolo devis resti severe neŭtrala. Aliflanke, ĉu mi povus piedpremi liajn karajn iluziojn? Egipto ne povas koncepti la ŝtormojn facile vekitajn de patriotismo, de ekonomia konkurenco, de nacia honoro, de blinda rasa fiereco, ŝtormojn, kiuj povas detrui la pacan laboron de la esperantistoj en unu sola nokto.

Nu, mi gurdis la kutimajn banalaĵojn de propagandistoj pri progreso, internacia amikeco, registara subteno, universalaj kongresoj. Sajne li estis kontenta; eble io en

mia voĉo sciigis al li, ke mi trovas lin simpatia, ke mi kunsentas kun li.

Kaj efektive mi kunsentis kun li, spite mian scion, ke li troigas, ke lerni Esperanton por ne paroli sian gepatran lingvon (la araba lingvo estas jam vere la gepatra lingvo de ĉiu kopto), tio estas fantaziaĵo, kihota absurdaĵo. Vere, ke en Egiptujo ankoraŭ estas restaĵoj de religia fanatikeco, ke la mahometanoj ankoraŭ malestimas la koptojn kaj malofte difinas al ili bonajn postenojn en oficejoj, ministrioj, laborejoj. Tamen, sub la konstanta premo de okcidentaj kulturo, inventaĵoj, scienco, la fanatikuloj perdas grade sian influon; kaj mi sciis, ke miaj mahometanaj amikoj estas tiom pacamaj kaj bonvolaj, kiom la koptaj.

Sed mi sciis ankaŭ, ke estus neeble komprenigi al Ghobrial la absurdecon de lia deziro; ke se mi rezonadus kun li, provus pliraciigi lian vidpunkton, mi nur vundus lin profunde — kaj senutile; kaj eble perdis ŝatatan amikon.

Anstataŭe, mi diris, ke per Esperanto mi trovis miajn plej bonajn amikojn en fremdaj landoj; ke mi estas feliĉa, parolante nian lingvon, ĉar mi sentas min egala kun ĉiu homo; ke Esperanto instruas respekti egale la homojn de ĉiu raso kaj ĉiu religio; ke esperantistoj estas ĉie fratoj. Banalaĵoj nur parte veraj; sed kion alian mi povus diri?

Li dankis min, kvazaŭ mi estus montrinta al li grandan favoron; kaj ni iris al niaj litoj, ĉar li disponigis al mi la liton de la filo, kiu studis en Kairo.

La proksiman matenon li promenis min »por saluti kelkajn amikojn, kaj por viziti la redaktejon de la loka gazeto«. Marŝante laŭ la strato, li ĉiumomente svingis la manon al la fezo, kun basvoĉa »Saidah!« aŭ »Sa-

lam' alejku!», kaj mi konstatis, ke malgraŭ sia malriĉiĝo, li ankoraŭ estas unu el la plej konataj enloĝantoj de la urbeto, kaj respektata. Tamen, ni devis viziti strange grandan nombron da oficejoj, butiketoj, domoj, sen tre klara celo. Mi baldaŭ komprenis la kialon. Ghobrial sentis la bezonon, pruvi al si kaj al la mondo, ke spite sian ruiniĝon, spite sian rason aŭ religion, li ankoraŭ estas influhava, grava. Nu, angla instruisto, kiu multe vojaĝis, kiu faras publikajn paroladojn kaj eĉ publikigas artikolojn en gazetoj, estas grava persono en tia vilaĝeca urbeto, kaj liaj amikoj partoprenas lian gravecon. Mi do faris mian eblon por aspekti grava, dignoplena eminentulo, por komplezi al Ghobrial. Sed mi ĝojis, ke ne ĉeestas alia anglo por priridi min.

Tiun posttagmezon mi foriris al Kairo. Ghobrial kaj lia filino akompanis min al la stacidomo, kaj en la lasta momento lia servisto alkuris kun korbo plena je figoj kaj mangoj, »ĉar la fruktoj en Kairo ne egalas la fruktojn en Medina el-Sughajarah, kaj estas terure multkostaj, kaj se vi prenas ĉi tiujn, vi ne bezonos aĉeti dum kelkaj tagoj.«

De tiam mi regule vidis Ghobrial du-tri foje en ĉiu jaro, kiam la aferoj de lia kompanio venigis lin al Kairo. Ĉiam ĝentila, ĉiam fiero pri siaj korespondantoj, ĉiam plorige dankema, ĉar mi traktis lin, kiel unu eminentulo traktas alian. Li preparolis kun mi la aferojn de sia grupo, demandis konsilojn pri legaĵoj, preparolis politikajn aferojn; mi rimarkis, ke lia Esperanta parolado pliboniĝas.

Mi do estis tre interesita, kiam li anoncis, ke li aniĝis al la universala kongreso. Ĝi okazis tiun jaron en unu el la nordaj ĉefurboj; Stokholmo probable. Mi gratulis lin pri lia longa vojaĝo, la unua ekster la limoj de Egiptujo, kaj diris, ke de nun li estos eĉ pli granda vo-

jaĝanto, ol lia filo, kiu studas en Londono. Mi ĝojis, ke li iros al kongreso; finfine, mi pensis, li estos en senrasa mondo, kie ĉiuj homoj ŝajnos egalaj; ĝi estos la plej mirinda, feliĉa sperto de lia vivo. Tamen, mi konstatis en mia dubon: Ghobrial estas tiom sensperta, senprotektata, fidema; malsimila al niaj gajaj, senzorgaj junuloj, aferemaj laborantoj, aŭ durkonkaj vegetaranoj, kontraŭtabakuloj, poŝtmarkemuloj. Mi neklare timis pro li kontuzojn.

El la Kongreso li sendis al mi salutan poŝtkarton, entuziasman, sed sen detaloj. Sekve, mi ĝojis, kiam poŝtkarto el Medina el-Sughajarah anoncis, pli frue ol mi estis supozinta, ke li vizitos min post du-tri tagoj por priparoli la Kongreson.

Certe, kiam li alvenis, li estis plena je entuziasmo; tamen, mi kredis rimarki denove tiun melankolion en liaj okuloj. Sed pri tio li nenion konfesis.

»Sinjoro, mi dankas Dion pro mia sukcesa vojaĝo, kaj mi tre bedaŭras, ke vi ne povis min akompani. Mi parolis kun personoj el multaj landoj, kaj ili ĉiuj estis tre ĝentilaj. Mi havas dek novajn korespondantojn, el sep landoj. Unufoje, mi eĉ parolis kelkajn vortojn en publika kunveno, kaj ĉiuj aŭskultis min tre atente. La esperantistoj estas tre ĝentilaj homoj. Jes, nun mi revenis hejmen, kaj mi estas tre kontenta.«

»Sed kial vi revenis hejmen tiel frue? Mi pensis, ke vi intencas viziti Germanujon kaj Francujon dum unu-du semajnoj, antaŭ ol ekvojaĝi al Egiptujo?»

»Nu, jes, tion mi intencis, sed kion fari? Post la Kongreso mi vagadis sola kelkajn tagojn, sed baldaŭ mi ne plu povis elporti la solecon, mi terure soifis al mia hejmo, do mi revenis tuj.«

»Mi bedaŭras. Tamen, vi faris belan vojaĝon, kaj ekkonis multajn homojn, kaj vi kontaktis kun multaj

nacioj. Ĉu vi bone komprenis ilin? Ĉu vi havas multajn novajn amikojn?»

»Jes, multajn,« li respondis, sed kun ia necerteco en sia voĉo. »Hungaroj, svedoj, francoj, germanoj, multaj. Nure, la angloj ne havis tempon por paroli, mi ne povis amikiĝi kun ili.«

Mi aŭdis senkuraĝan tonon en lia voĉo; evidente lin trafis ia seniluziigo. Ĉu li malbonŝance provis paroli al iuj gejunuloj rapidantaj al kabaredo aŭ dancejo? Ĉu li malprudente haltigis iun komitatanon aŭ oficiston, kiu tute ne havis tempon por amuza babilado? Mi ne sciis, kaj ne utilis demandi: pro nenio ajn li volus konfesi al mi malĝentilaĵon, aŭ realan aŭ imagitan, flanke de anglo; li timus min insulti. Li kutimis en Egiptujo suprenrigardi al la angloj (miaj samnacionoj estas postulemaj pri tio), kun la rezulto, ke Ghobrial pli alte taksis la amikecon de angloj, ol tiun de ĉiu alia nacio.

Mi ankoraŭ renkontas lin ofte; li ĉiam laboras pri sia grupo, korespondas kun alilandanoj, esperas iri al alia kongreso; sed mi scias, ke li devas dolore blindigi sin pri la fakto, ke eĉ en la Esperantismo estas mankoj, ke eĉ la »kara lingvo« ne ĉiam, ne tute, fratigas la homojn.

T R A G E D I O

La unua sunradio de la mateno estis ĵus enfluginta la ĉambron, kiam Abd el-Hamid vekigis. Rimarkinte la orluman trabon kaj ĝian desegnon sur la nuda planko, li tuj leviĝis kaj fermis la kradsirmilon de la fenestro: somere en Egiptujo estas necese konservi malvarmeta la aeron en la domoj, forŝlosante sunlumon kaj la varmegan aeron de ekstere.

Vestita en noktoĉemizo, kaj sen sia fezo, Abd el-Hamid aspektis pli maljuna, ol dum la tago en siaj belaj eŭropanaj vestoj kaj kun la fezo kiu kaŝis lian kalvecon. Vidiĝis ankaŭ pli klare la senkarnaj kruroj kaj la osteca brusto; kaj ĉi hore liaj grizaj lipharoj estis iom senordaj, kaj tio akcentis la perpleksitan esprimon sur lia bruna vizaĝo. Tamen, liaj okuloj estis brilaj, kaj vidigis lian emon sin kroĉi al la vivo tiom, kiom al siaj moneroj.

Li movis sin vikle, lavante sin kaj sternante maton por la matenaj preĝoj. Li sentis sin tre forta hodiaŭ, ĉar li dormis tre bone dum la tuta nokto: maloftaĵo. Li kutime dormis malbone, jam de la tempo antaŭ kvar jaroj, kiam li ekŝiĝis el sia ofico en la Financa Ministerio kaj fariĝis pensiulo; eble la manko de laboro dum la tago, aŭ tute simple la mal-

juneco, sendormigis liajn noktojn. Tio tamen malpli ĝenis lin, ol eŭropanon; kiel ĉiuj egiptoj, li havis senfinan paciencon, kaj povis trankvile revii dum pluraj horoj.

Preĝinte, li demetis la noktoĉemizon, kaj surmetis belan piĝamon, kun ruĝaj kaj flavaj strioj. Tiel vestite por la strato, li malfermis la pordon, kaj piedpinte trairis la centran ĉambron de la apartamento al la ĉefpordo. Ĉio estis silenta; la egiptoj kutimas leviĝi tre frue, sed Abd el-Hamid ĉiam antaŭis la aliajn familianojn, eĉ la nubian serviston.

Li trapasis malsupren kvar etaĝojn, kaj suriris la straton. Estis lia kutimo aĉeti la *ful*, egiptajn fabetojn, por la matenmanĝo, el apuda butikoj, kie oni kuiris ilin dum la tuta nokto. Tre bona estas la *ful*; ĝi beligas, fortigas kaj donas virecon; la egiptoj atribuas al ĝi sian kuraĝon kaj furiozon en batalo.

En la strato la aero estis dolĉe freŝa, kvankam la heleco de la sunlumo preskaŭ horizontala promesis varmegon post unu-du horoj, kaj la venteto ankoraŭ ne estis levinta la ĉiean polvon kaj malpuraĵon de urbo proksima de la dezerto. La strato estis senhoma, escepte de kelkaj sudanaj pordistoj, kiuj estis frotantaj la okulojn aŭ dormeme portantaj en la domojn siajn litojn. Kelkaj almozuloj ankoraŭ dormis pace en la defluejoj.

Sed la *ful*-vendejo jam komercis; Abd el-Hamid aĉetis por piaŝtro kaj duono, kaj reiris al la apartamento. La nubia knabo estis jam lavanta la kahelojn de la centra ĉambro, ĵetante sitelojn da akvo sur ilin, kaj frotante ilin per tolvolvita piedo. Abd el-Hamid metis la fabetojn sur la tablon, la sola meblo en la ĉambro, kaj iris en flankĉambreton por serĉi sian

nepon kvarjaran. Li aŭdis sian filon kaj lian edzinon moviĝantaj en la ĉambro apud lia.

Abd el-Hamid vestis la knabon Helmi, karesante lin kaj parolante pri la bela donaco, kiun li alportos hejmen — ĉar hodiaŭ estis vendredo, kiam la maljunulo kutimis aĉeti ian bagatelon por amuzi la knabon, post sia vizito al la moskeo kaj la kafejo. Lia pensio estis ses pundoj monate, kaj kun tia rento oni povas permesi al si la lukson, aĉeti por unu piaŝtro ludilon por sia nepo; eĉ por piaŝtro kaj duono.

»Aŭskultu, O Helmi: ĉu vi scias kion mi alportos hodiaŭ?«

»Mi volas ion bonan,« respondis Helmi, kiu ankoraŭ frotis la okulojn. »Mi ne volas aĵon kiun vi prenos kaj uzos la tutan tagon.«

Li aludis pupeton el lado, kiun la avo estis aĉetinta antaŭ du semajnoj. La risortaj saltoj de la pupeto tiom interesis lin, ke Helmi povis amuzi sin per ĝi nur dum la foresto de la maljunulo.

»Vidu la hundidon!« diris Abd el-Hamid admire. »Ĉu tiel vi parolas al la avo? Vi finiĝos malbone, O knabo! Malbo-one, malbone!« Kondukante lin per unu mano kaj per la alia karesante lian hirtan kapon, li iris kun Helmi al la tablo en la centra ĉambro, kie la bofilino estis jam disdonanta sur telerojn la fabetojn.

La servisto alportis seĝojn, kaj la familio komencis la matenmanĝon. La filo, Aziz, estis vestita en pijamoj, kiel lia patro. Lia edzino portis robon eŭropanan: Aziz ja estis modernema, kaj ne ŝatis, ke ŝi portu vualon sur la stratoj. Tiun kutimon Abd el-Hamid tute ne aprobis; ĝis sia morto, lia edzino ĉiam portis la vualon ekstere, kaj neniam malkovris la vizaĝon krom al parencoj kaj kelkaj tre intimaj

amikoj de la edzo. Abd el-Hamid ofte plendis pri la moderna dekadenco al sia amiko Hasan, sed li ne priparolis la temon en la hejmo: lia filo tro lerte mokis lin kiel malmodulon, kiu havas la menson ankoraŭ en la lasta jarcento.

»Ĉu vi iros al la kafejo post la moskeo?« diris la bofilino.

»Ĉu mi scias? Ĉu mi diras al virino pri ĉiuj miaj agoj?« Li ne tre ŝatis la edzinon de Aziz: ŝi parolis pli multe, ol virino devus en la ĉeesto de viroj; sed li ne kuraĝis tion diri rekte, ĉar lia filo emis koleri se oni kritikis la kutimojn de lia edzino.

»*Ma'aliŝ*, ne gravas,« respondis la virino. »Nure, vi povos reporti kun vi akvomelonon por la vespera manĝo.«

»Ne, mi ne povos; ĉu mi pasigos la tutan tagon aĉetante?« Li tamen sciis, ke li aĉetos la akvomelonon. Sed por konservi sian dignon estis necese protesti. »Donu la monon; tio kostos du piaŝtrojn.«

Li pagadis al la filo sian manĝaĵon kaj ankaŭ iom por la luo de la apartamento; sed paginte tion, li avide rigardis ĉiun miliemon. El lia pensio ĉiumonate, restis multo, el kiu li facile povis pagi al si ĉiutagan viziton al kafejo, kelkfoje sukerkanojn, kaj eĉ glaciaĵon unu-dufoje en monato. La ceteron li metis en bankon; li ne estus povinta diri kial: »Estas necese havi monon; kion oni faras sen mono?« Lia pensio ja daŭros ĝis lia morto, kaj lia filo oficis en ministrio kaj ne bezonis monhelpon.

Li turnis sin al Aziz.

»Ĉu vi venos al la moskeo?« Li antaŭsciis la respondon. Aziz tute ne kuraĝis ataki la religion, eĉ ne kuraĝis diri, ke li ne estas kredanto. Sufiĉe de la

okcidenta skeptikeco estis penetrinta en lian animon, por ke li ne iru plu al la moskeo, sed ne sufiĉe por fari el li agnostikulon; li simple provis eviti decidon pri la demando. Tiu ĉi sinteno tre ŝokis Abd el-Hamid-on; ĉiu ja scias, ke la senreligiulo tuj fariĝas ŝtelisto, murdas, fariĝas malriĉa kaj tute mizera. Oni ne povas esti respektinda se oni ne diras la preĝojn ĉiutage, kaj ne iras al la moskeo vendrede.

»Ne,« respondis Aziz, »hodiaŭ mi ne iros,« — kvazaŭ estus hodiaŭ escepto.

La maljunulo skuis la kapon, kaj ion nekomplimentan murmuris pri la nunaj knaboj, kaj eniris en sian ĉambron por surmeti siajn eŭropanajn vestojn.

Kiam li eliris poste, li aspektis multe pli solida kaj gaja. Liaj vestoj havis verdajn kaj grizajn stristojn, liaj ŝuoj havis apenaŭ tolereblan brilon, kaj lia fezo sidis sur la malantaŭa parto de lia kapo kun gaje svingiĝanta kvasto. En unu mano li portis marŝbastonon kun arĝenta tenilo, kaj sur la alia manradiko pendis rozario el sukceso. Li estis broŝinta siajn lipharojn, kaj lia vizaĝo, kun la agla nazo sur kiu vidiĝis centoj da ruĝaj vejnetoj, aspektis pli juna.

Li malsupreniris al la strato, kaj marŝis gravmienne. Nun ĝi estis plenplena je homoj aferemaj, kelkaj en eŭropanaj vestoj, sed la plimulto en egipta galabijo, kun nudaj piedoj. Ne mankis, tamen, aliaj kiuj kombinis la du stilojn: galabijo kun ĵako. Kamparanoj sur azenoj kaj kameloj iris laŭ la vojo kun figoj, legomoj, akvomelonoj por la vendejo. Nudpiedaj biciklistoj, kiuj preferis rajdi sen uzi la manojn, svingiĝis de unu flanko de la vojo al la alia, kaŭzante ĉie torentojn da blasfemoj kaj malbenoj. Vendistoj kun grandaj korboj sin puŝis tra la multkolora hom-

amaso, vendante sukeraĵojn, fruktojn, panojn, kuiritajn viandojn, maizon; kaj sur ĉion falis senprefere la polvo de la strato kaj rubejoj. Se hazarde pano aŭ frukto falis en la koton, la vendisto senkaŝe reprenis ĝin, surspiris zorge, kaj ĝin poluris per la maniko de sia galabijo.

Abd el-Hamid sekvis sian vojon, ĝuante la bruon, la moviĝadon, la odorojn diversspecajn de la homamaso. Kelkfoje li haltis por rigardi disputon kiam piediranto paŝis sur la vojon, kiel kutime, tute sen rigardi ĉu venas veturilo, kaj aŭ renversiĝis, aŭ igis la veturilon karamboli kun alia. Kelkfoje li haltis por aŭskulti la marĉandadon de iu virino kun vendisto, kaj aprobe ridetis se ŝi sukcesis malgrandigi la unuan prezon je naŭdek procentoj. Kaj la tutan tempon liaj fingroj okupiĝis pri la rozario, kaj li murmuris al si konstante la nomon de Allah.

Baldaŭ li atingis la moskeon, demetis siajn ŝuojn ĉe la pordego, kaj eniris la misteran mallumon de la interno. Estis frue, do ankoraŭ estis loko por li sur la pajlaj matoj ĉie sternitaj; kutime, kiam li venis unu horon malpli frue je vendredo, estis necese genui kaj preĝi sur la strato mem, tiom plenplena estis la moskeo. Kun kelkaj dekoj da aliaj piuloj, ĉiuj turnitaj al la oriento, li preĝis; kaj poste iris sidi apud la muro por ripozi, kaj por vidi, ĉu Hasan estas jam veninta. Estis malvarmete tie, en la moskeo, kaj komforte oni sidis apud la muro; sed ia malkontento, preskaŭ kolero plenigis la koron de Abd el-Hamid. Kial tiu stultulo Hasan malfruas? Li atendis tiun ĉi momenton jam de sia levigo; kaj jen ĝi estis fuŝita. Kiel infano kiu ne povas havi tion, kion ĝi deziras, Abd el-Hamid subite sentis sin malbone traktata, soleca.

Hasan estis laborinta kun li en la Financa Ministerio, kaj fariĝis pensiulo preskaŭ samtempe. Jam antaŭ sia eksigo, ili kutimis iri kune al la kafejo, preskaŭ ĉiutage, por babili, kartludi aŭ triktraki. Kaj la kutimo fariĝis tiom pli necesa, kiam ili ne plu havis laboron por okupi la tempon.

La sunlumo ŝajnis iom malpli hela, kaj la varmo pli peza, kiam li eliris el la moskeo, kaj ekiris al la konata kafejo proksime de la stacidomo. Ĉi foje, remaĉante sian malkontenton, li ne atentis la mil interesajn okazetojn de la strata vivo; nur la almozulojn li permesis al si vidi, ĉar bona mahometano laŭregule devus doni unu kvardekonon de sia enspezo kiel almozon, kaj post vizito al la moskeo li disdonas minimume kelkajn miliemojn. Lin sekvis pluvo da benoj, kiel alparoloj kvazaŭ por paŝao; ĉi tio iom retransviligis lin.

Kiam li eniris la kafejon, li trovis Hasan-on jam sidanta ĉe tablo, kun kafo antaŭ si, leganta ĵurnalon. Vidinte lin, Abd el-Hamid sentis pli feliĉa; finfine, li ne estos sola, li povos kartludi kiel kutime. Sed la kolero ne malaperis el lia voĉo, kaj li kriis trans la kafejon, *»E da, ja ibni kelb! Kio ĉi ĉio, O filo de hundo! Ĉu vi ne povas levigi sufiĉe frue por iri al la moskeo, antaŭ ol veni en kafejon?«*

Ĉi tiuj ĝentilajoj neniel ĝenis Hasan-on. Li estis solida grasa homo, kun bruna haŭto, kaj vizaĝo tre senesprima. Li ne levis siajn elstarajn okulojn kaj kurban nazon de la ĵurnalo, sed respondis egale laŭte, *»Vi kie estis? Ĉu la lito estis tro alta ĉi matene? Vi ne povis atingi la plankon? Mi estis en la moskeo antaŭ unu horo, kaj jen malŝparas mian tempon, atendente vin«.*

Abd el-Hamid eksidis kontraŭ li, kaj dum kvaron-horo ili disputis kaj argumentis, kun multaj ĵuroj kaj reciprokaj insultoj, kiel konvenas ĉe malnovaj kunuloj. Fine ilian atenton fortiris la greka kelnero, kiu petis mendon.

Abd el-Hamid mendis kafon, kaj la kelnero elvokis sian eternan krion greklingve, »Unu sukeran!« Preskaŭ ĉiu kafejo kaj spicistejo en Egiptujo estas posedata de greko; ĝis tia grado, ke kelkaj ŝerculoj pretendas, ke nur grekoj estas leĝe permesitaj establi tiajn vendejojn.

Tiam komenciĝis por Abd el-Hamid la plej bona parto de la tago. Li ne estis sola; li sidis meze de bruo kaj okazaĵoj; baldaŭ li kartludos kaj certe venkos tiun stultulon Hasan. Li alparolis la stratvendistojn kiuj senĉese trapasis la kafejon, ekzamenante zorge iliajn vendaĵojn, kaj disputante pri la prezo. Unufoje envenis migranta tapiŝ-vendisto, kun dudeko da turkaj, persaj kaj egiptaj tapiŝoj sur la ŝultroj. Abd el-Hamid alvokis lin, kaj komencis mallaŭdi la tapiŝojn, kritikante la tekson kaj kolorojn, kvazaŭ li intencus aĉeti. La vendisto defendis kaj kontraŭlaŭdis siajn tapiŝojn, kvazaŭ li esperus vendi unu el ili. Estis tamen nur ludo; Abd el-Hamid ne intencis aĉeti; la vendisto sciis, ke li ne intencas aĉeti; kaj Abd el-Hamid sciis, ke li tion scias: tamen, ili disputis kun tioma energio, ke oni pensus, ke temas pri milpunda aĉeto.

»Rigardu ĝin nur!« kriis Abd el-Hamid. »Malriĉaĵo! Ĉu tion vi nomas tapiŝo?«

»Ĝin mi alportis de Persujo, O bejo! Neniam mi vidis pli belan tapiŝon. Kaj ĉu vi scias kiom? Nur kvin pundoj!«

»Allah!« diris Abd el-Hamid en tiu abrupta, ek-kria tono, kiu povas esprimi surprizon, indignon, kole-ron aŭ doloron; »kia ŝtelisto vi estas! Ĝi valoras dudek piaŝtrojn.«

»Oni ne povas trompi vian honoran moŝton; vi estas ŝpertulo. Vidu, kiom belaj estas la koloroj. Kvar pundoj kaj duono.«

»Ĉu vi volas rabi min? Por helpi tian mizerulon, kia vi, kvardek piaŝtroj.«

»*Rabuna jihalik!* Dio vin benu! Se mi vendus por unu miliemo malpli ol kvar pundoj, miaj infanoj mal-satus. Sed mi ne estas avara. Prezo nur por vi, ĉar mi konas vin: tricent naŭdek piaŝtroj!«

Kaj tiel ili marĉandadis, ĝis kiam ili atingis cent kvindek piaŝtrojn, kaj tie la cifero restis longtempe. Abd el-Hamid estis feliĉa; ĉi tio estas unu el la inter-esajoj de la vivo. Tamen, sian feliĉon li ne montris; la vizagon li konservis ĉiam enua, seninteresa; la entuzi-asma marĉandisto estas ŝperta aktoro, kun fiero pri sia arto. Kaj la marĉandista fiero ne permesis, ke Abd el-Hamid kontentiĝu per nura sepdek-procenta malpliigo. Li paciencige, obstine daŭrigis ĝis la vend-isto konsentis, kun senfinaj krioj pri sia malriĉeco kaj la malsato de sia familio, la prezon cent dek pias-troj. Tiam, kun vasta oscedo, Abd el-Hamid, tute kon-tenta, forgestis lin

»*Uallahi!* Je Dio! Ĝi estas tro kara. Mi ĝin ne deziras. *Jallah, ja sidi,* foriru, O sinjoro!«

Kompreninte, ke la ludo finiĝis, la vendisto kun-metis siajn tapiŝojn, ridetante, kaj ilin ŝvingis sur la ŝultron.

»*Salam alejkum!* Pacon sur vin!« li diris basvoĉe, kaj foriris.

Nun Abd el-Hamid sin turnis al Hasan, preta por la kartludado; kaj unu horon, du horojn, multajn horojn, ili faris senfinajn ludojn je *kunkan*, mendante al la kelnero glason post glaso da akvo. Ili ambaŭ ĝemis kiam la ŝanco estis malbona, svingis la manojn, blasfemis, frapmetis la kartojn sur la tablon, sin reciproke insultis, kaj ĝuis ĉiun momenton. Tia estas la bona vivo: sidi en kafejo, kun bruo, for de la brula suno, ludante je karto, kriante kaj gestante pro ŝajnigita ekscito aŭ kolero. Sendube la paradizo atendas la maljunan piulon post la morto; dume, sur tiu ĉi tero, la kafejo, kun kunulo, estas tute kontentiga anstataŭo.

Je la dua horo, la kreskanta varmo kaj interna malpleno, sciigis al ili, ke estas tempo foriri. Ĉiu pagis sian piastron por kvarhora amuzado, kaj ili disigis, kunvenonte denove morgaŭ.

Abd el-Hamid survoje hejmen ne forgesis aĉeti la akvomelonon; lasta plezuro, li aĉetis ĝin por unu piastro ok miliemoj, flarinte kaj aŭskultinte, kiel kuracisto koron, dekon da akvomelonoj antaŭ ol fari sian elekton. Kaj hejmeniris por la tagmanĝo kaj la postmanĝa dormo.

La cetero de la tago forpasis same kontentige.

Abd el-Hamid survoje hejmen ne forgesis aĉeti belegan kaŭĉukan katon. Ĝi estis japana, kaj kostis nur piastron kaj duonon. Helmi estis tre ekscitita; kaj ĉar lia avo eĉ ne provis amuzi sin per la nova ludilo, estis tre bonhumora. Lia impertinenta babilado ĝojigis la koron de la maljunulo, kiu plurfoje nomis lin *ibni kelb* admire.

Sed sabato, la sekvinta tago, estis nigra tago; ĉio fusiĝis. Ekzistas teorio, laŭ kiu ni devas pagi ĉiun

plezuron per eĉ pli profunda malĝojo; se tio estas vera, certe Abd el-Hamid pagis sian ĝojan vendredon.

Jam frue en la mateno, la afero komenciĝis. La *ful* ĉi matene havis gusteton de brulaĵo, kaj la sekvinta disputo kun la bofilino fariĝis plena kverelo, en kiu Abd el-Hamid venkiĝis; ŝi havis pli rapidan langon ol li. Post la matenmanĝo li eliris por promeni, kaj trafiĝis de unu el tiuj subitaj, mallongaj pluvoj, kiuj kelkfoje aspergas nordan Egiptujon. Lia bela eŭropana vestaro iom malsekiĝis, kaj malaperis la rektegaj faldoj de la pantalonkruroj. Kaj antaŭ ol li povis tegi sian fezon per la nadtuko, la pluvogutoj estis ĉie makulintaj la lanaĵon; tio kostos jam kelkajn piaŝtrojn por reglado. Li daŭrigis sian vojon tra stratoj kie la sendrenilaj trotuaroj konsistis nun el koto, kiu malpurigis la brilon de liaj ŝuoj; kaj konstante karambolis kun li la aliaj piedirantoj kurantaj kun klinitaj kapoj, sur kiuj sidis fezoj nun blankaj pro la protektantaj nadtukoj. Abd el-Hamid sentis tre soleca kaj senhelpa.

Fine li atingis la kutiman kafejon, varma, sen-spira, kolerema, kun antaŭsento pri pluaj katastrofoj. Hasan ne estis veninta ankoraŭ, kaj Abd el-Hamid sidis solece, morne, ne dezirante eĉ fingrumi sian rozarion. Hodiaŭ, pro la pluvo, la ombra interno de la kafejo ne plu estis malvarmeta trankvilejo; ĝi estis malgajiga kaverna. Abd el-Hamid sidis senmove, rigardante ĉiam antaŭ si, ne rimarkante la stratvendistojn kun marĉandeblaj komercaĵoj.

Atendis, kaj atendis; sed Hasan ne venis. Mankis disputoj; mankis argumentoj pri politiko; mankis kartludado. Ĉirkaŭ tagmezo la suno rebrilis, sed ne povis gajigi lin. Je la unua li ne plu povis elteni, kaj

mizere fordrivis hejmen; kaj tute rifuzis paroli dum la tuta tago. La filo kaj bofilino vane provadis regajigi lin, per ŝercoj kaj konversacio; kaj Helmi estis en paŭtema humoro, kaj turnis al li la dorson.

La proksiman matenon, kvankam li sentis, ke lia komforta vivo tute fuŝiĝis, li tamen iris, sen granda espero, al la kafejo denove. Sama rezulto; Hasan ne venis. Tiam venis al li ideo; li iros viziti Hasan-on, por eltrovi kio estas al tiu fripono. Eble li estas malsana, kaj ne povos veni al la kafejo dum pluraj tagoj; je tiu penso, Abd el-Hamid pleniĝis per granda sinkompato, kaj ĝemetis. Li antaŭvidis antaŭ si longajn tagojn seninteresajn, solecajn, kun neniu al kiu li povos babili.

Baldaŭ li estis ĉe Hasan, kiu loĝis kun nevo kaj liaj edzino kaj infanoj en malgranda apartamento. La nevo estis malriĉa — malpli riĉa ol Hasan mem, ĉar li estis juna kaj ankoraŭ ne atingis altan gradon en la Ministerio. Tie Abd el-Hamid trovis lin; sed trovis lin tute ŝanĝita homo. La elstarantaj okuloj nun ŝajnis kavaj kaj senbrilaj; la bruna haŭto estis paleca; kaj ŝajnis, ke lia granda ventro estas moliginta — ĝi ne plu elstaris, ĝi pendis.

»*Salam 'alejkum, ja Hasan! O stultulo, kial vi atendigas min vane ĉiutage? Kie vi estis?*«

Hasan turnis en lia direkto mizerajn okulojn, sed eĉ ne donis la kutiman resaluton *Alejkum es-salam*. Li ĝemis, kaj silentis.

Abd el-Hamid ŝvingis la manojn, paroladis laŭte, bruis, por veki sian amikon el la malespero, iom simile al la maniero de tiuj religiuloj kiuj batas tamburojn kaj sonigas sonorilojn por fortimigi diablojn. Kaj iagrade li sukcesis, ĉar fine Hasan povis klarigi al li la katastrofon.

»La vivo ne plu estas vivinda; mi estas ruinigita. Hieraŭ alvenis letero de la Ministerio, kiu diris, ke mi ne plu havos pension. La mensoguloj diras, ke mi neniam estis stabano, ĉiam nur portempa oficisto. Kiel tio povas esti — ĉu mi ne laboris tie dudek-ok jarojn? Mi havis kvindek-kvar jarojn kiam mi eksigis, kaj mi komencis kiam mi havis dudek-ses jarojn; do pensu, kiel mi ne estu stabano? Kaj nun ili diras, ke nur pro eraro de la fako pri stabkontrolado oni pagis al mi pension, kaj jam nun ĝi ĉesas. Kaj la afabluloj diras, ke ili ne postulos repagon de la sumoj kiujn mi jam ricevis. Ke mi mortu! Kion mi havas nun? Mi eĉ ne havas miliemon.« Kaj Hasan malespere levis la manojn al la ĉielo.

»Ne estu stulta, O Hasan!« kriis Abd el-Hamid. »Tio estas tute ne ebla. Kiu povus skribi tian leteron! Ili ne kuragos forpreni pension de vi! Neeble! Neeble!« Li neklare sentis, ke se nur li sufiĉe forte neas la aserton de Hasan, li povos malrealigi tiun leteron kaj la teruran novaĵon.

»*El-Ĥamdulillah!* Mi tamen ne malsatos«, diris Hasan. »Mia nevo promesis doni al mi mangaĵon, kaj mi povos dormi tie ĉi sur la planko.«

»Sed vi eraras! Ĉiu scias, ke Ministerio ne povas fari tiajn aferojn.«

»Ĉu tiel? Kaj kion pri la advokato? Mi hieraŭ vizitis advokaton, kiu donis al mi senpagan konsilon, ĉar li estas amiko de mia nevo. Li diris, ke nenio estas farebla; se mi ne estis membro de la stabo, mi ne povas procesi por havi la pension.«

»Nu, tamen, ne estas tiel grave,« respondis Abd el-Hamid. »Vi povos veni ĉiutage al la kafejo por kartludi, kaj vi mangos tie ĉi.«

»Kaj de kie mi havos la piastron por la kafejo? Cu eble oni donas kafon senpage nun? La nevo ne donos al mi eĉ miliemon.«

»Sed... sed kio estos?« diris Abd el-Hamid terurite. »Kion mi faros? Cu mi povos sidi sola kaj kartludi kun mi mem? Ne estu egoisma, azeno, vi ja devas veni. Kion mi povos fari?« Abd el-Hamid komencis kompreni la ampleksojn de la katastrofo.

Hasan suprentiris la ŝultrojn, evidente pensante nur pri sia propra malbonŝanco. Tia egoismo plipezigis la koron de Abd el-Hamid. Nek unu nek la alia pensis pri la fakto, ke Abd el-Hamid tre bone povus pagi al sia kunulo ĉiutagan kafon; oni faras siajn aranĝojn pri elspezoj, kaj kial oni ŝanĝu ilin? La embarasoj de aliaj ja estas la embarasoj de aliaj.

Baldaŭ Abd el-Hamid foriris, kaj hejmeniris denove, vidante nenion krom sia frakasita vivo. Nenie estis eĉ lumeto da espero; nenio krom soleco, sen konversacio, sen kartludado, sen intereso ĝis la fino de lia vivo. Ne plu li povos interesiĝi pri disputoj kun biciklistoj, pri marĉandado, pri la politikaj pekoj de Sedki Paŝao aŭ Mahmud Paŝao Ali Maher, pri la malbonŝanco de tiu aŭ ĉi tiu najbaro aŭ ekskolego. Se la egipto perdas la esperon, li ĝin perdas tute senrezerve; por li, almenaŭ portempe, la suno estingiĝas.

Kaj ĉio ĉi estis la kulpo de tiu stultulo Hasan. Dum kelkaj minutoj kolero plivigligis la paŝojn de Abd el-Hamid; sed baldaŭ forvelkis, postlasante nigran malĝojon; liaj okuloj pleniĝis je infanecaj larmoj.

Estis granda peno grimpi la ŝtuparon al la apartamento. Enirinte, li senvorte eniris sian ĉambron, kaj senvide rigardis la muron, de tempo al tempo suspir-

ante. Tiel li restis ĝis kiam tute mallumiĝis, rifuzante manĝi aŭ paroli. Li fine enlitiĝis, kaj endormiĝis, ĉar la malespero estas tre laciga.

En la mateno, li longe kuŝis maldorme, ĉiam pensante pri sia malbona sorto. Unufoje li eklevis sin, svingis la piedojn al la planko, kaj palpserĉis siajn pantoflojn. Sed kial? Kiel utilas? Li sidis tiel kelkajn momentojn, kaj tiam rekuŝis; ne estas kialo por leviĝo. Du-trifoje Aziz provis paroligi lin, demandante pri la kaŭzo de lia malespero, sed Abd el-Hamid nur klinis la kapon, kaj nenion respondis; liaj ĝenoj estis tro grandaj por babilado.

Iom post iom solvo eklumis en lia menso. Fino de tiu ĉi mizero; fino de tiu ĉi sencela, senamuza vivo. Post la tagmanĝo li aŭdis la familianojn iri en siajn ĉambrojn por la siesto, kaj la nubian serviston eliri el la apartamento por iri dormi en sia kabaneto sur la tegmento. Abd el-Hamid ekstaris sur la planko tre silente, kaj ŝtele iris al la pordo. Li ne plu pensis; nur konsciis, ke li faris decidon, kaj absolute devas ĝin plenumi. Li malfermetis la pordon de sia ĉambro, kaj elrigardis; jes, ĉiu dormas. Nudpiede li iris al la banĉambro kaj rigardis la botelojn sur la breto sub la spegulo. Tie estas la bezonata botelo: flakono da malinfektiga fluidaĵo lisolo. Li ĝin kaptis per tremanta mano, kaj same silente reiris al sia ĉambro. Tie, senrapide, senhezite, li eltiris la ŝtopilon, kaj glutis la enhavon preskaŭ unuglute. Tuj sufoka doloro kaptis lian buŝon, gorgon, stomakon; li falis sur la liton, ĝemegante kaj spasme gratante sian gorgon. La botelo falis al la planko kaj frakasigis.

Tie, kelkajn minutojn poste, aŭdinte la ĝemojn, Aziz trovis lin, kaj provis resanigi per glasoĵ da akvo.

Sed tio ne helpis, kaj li kuregis al la strato por venigi la apotekiston. Feliĉe li estis rimarkinta la flakonon sur la planko, kaj povis diri al la apotekisto pri kio temas. Ĉi tiu alkuris kun medikamentoj, kaj povis iomete malgrandigi la lukton por spiro; li tuj sendis Aziz-on por alvoki kuraciston.

Abd el-Hamid nenion konsciis krom la dolorego kiu plenigis la mondon ĝis la plej alta ĉielo kaj la plej profunda fundamento; li ne vidis la kuraciston, li ne rimarkis la hospitalan aŭtomobilon en kiu oni portis lin al la hospitalo, li ne rimarkis la medikamentojn, kiujn oni verŝis en lin. Baldaŭ li ne plu konsciis eĉ la doloron, ĉar oni dormigis lin per morfio. Kaj ĉar li estis fortika maljunulo, kaj ĉar oni kuracis lin sufiĉe frue, li ne mortis. Tagojn de doloro, kiu forŝovis la alian malfeliĉon; noktojn de maltrankvila duondormo, kaj jen li estis, ankoraŭ ne sana, sed saniĝonta.

Unuafoje li ekrigardis la grandan litejon de la hospitalo, kun dekoj da pacientoj. Preskaŭ sammomente li ekvidis Aziz-on, kiu estis aliranta lian liton, ĵus irinte tra la pordo. Abd el-Hamid palpebrumis salute al Aziz; li ankoraŭ ne povis paroli, kaj li lace ne volis levi tiun strange blankan manon.

»Kiel vi, o mia patro?« diris Aziz; »vi estas ja frenezulo. Kiom vi timigis min!« Li ridetis ame, kaj svingis platan manon en la aero minace. »Helmi konstante demandas, kie vi estas, kaj rifuzas esti konsolata per ludiloj. Rapidu, kaj revenu al li.«

Dum la lastaj tagoj, Aziz estis ĉie enketinta pri la kaŭzo de la provo pri sinmortigo, kaj estis vizitinta ankaŭ Hasan-on. Tiam li facile divenis la kaŭzon de la malespero de la patro, kaj estis klopodinta por rearangi aferojn.

»Kaj, mia patro, vi ne plu devos iri al la kafejo sola. Ĉu vi memoras Lutfi Mahmud? Li estis kun mi en la duagrada lernejo. Nu, lia patro pensiuliĝis antaŭ kelkaj monatoj, kaj li iros kun vi por ludi *kunkan-on*. Ĉu vi pensis, ke ne estas aliaj kunuloj en la mondo? Kia freneza patro vi estas!«

Kiam Aziz estis foririnta, Abd el-Hamid fermis lace la okulojn, sed sur liaj lipoj aperis trankvila rideto. Lia volo resaniĝi jam komencis funkcii; restis antaŭ li senfinaj tagoj da kafejumado, kartludado, disputado, kaj marĉandado kun ruzaĵ vendistoj; ja vere, la vivo ankoraŭ estis vivinda.

L A N O M A D O

Ni staris sur la rando de la trotuaro, kaj bakiĝis en la varmego de la posttagmeza suno. La varmon reflektis kaj pliigis la sablo sur la tero, la frontonoj de la burĝaj vilaoj bordantaj la straton, la grizaj antaŭgardenetoj, kaj la polvo kaj rubo kuŝantaj sur la vaka parcelo, kiu kontraŭis nin de la alia flanko de la strato. »Ni« estis tri egiptaj oficistoj, en eŭropaj vestoj kun fezoj, unu egipta sinjorino, ankaŭ vestita eŭropane, kaj mi mem. Ni atendis la aŭtobuson kondukantan en la centron de la urbo, por iri al niaj oficejoj; kaj ni ŝvitis pro la varmego, kaj preskaŭ dormis starante, pro la grandega tagmeza manĝo, kiun ni ĵus englutis. Ni ne konis unu la alian, sed tamen unu la alian ni malamis, kaj zorge direktis la rigardon alidirekten por ke tiu sento ne aperu en niaj okuloj. Sed en tiu morta strato, en tiu morta horo, kiam la cetero de la mondo kuŝas sur mola, malvarmeta lito, en tiu peze kuŝanta varmo, eĉ nia malamo estis io morta. De tempo al tempo la vento susuris al niaj vizaĝoj, kaj tiam estis ankoraŭ pli varme; ni sentis kvazaŭ ni rigardus en fornون por vidi, ĉu la kuko estas finbakita. Ni estis ĉiuj bonaj, respektindaj burĝoj, kaj ni ĉiuj unuanime malbenis la klimaton, la laboron kiu ŝiras nin for de la tagmeza dormo, kaj la aŭtobus-

kompanion, kies aŭtobusoj ĉiam malfruas, estas malpuraj kaj senaeraj, kaj tre maloftaj. Kaj nenio moviĝis, eĉ ne folio de polvokovrita arbo.

Kaj tiam, kvazaŭ el nenie, aperis la vivo, la sparka, kanta, danca vivo, en la formo de egipta bubo. Li havis proksimume dek-du jarojn, estis vestita en malpurega kaj tre ŝirita galabijo, kaj estis mem eĉ pli malpura ol lia vesto. Sed liaj grandaj nigraj okuloj estis moviĝemaj kaj ĉiorimarkaj, lia maldika vizaĝo portis senrespektan rideton, li kuris kaj zigzakis gracie kaj malpeze, kaj evidente lin ne ĝenis la morta varmo: kredeble, li ne estis manginta tiun tagon, do ne suferis de la dispepsio. Li kuris trans la vojon por ekzameni rubaĵon, kiu eble entenus pankruston aŭ kernojn de fruktoj, tiam fluge pasis al la alia flanko por petole kaj amike piedfrapeti dormantan hundon. Kiam lia rigardo trafis nin, li ridetis per nekomprenebla rideto, kiu povus esprimi malestimon, sinfieron, mokon aŭ nuran vivoĝojon. Ni fermis niajn okulojn lace, por ne vidi tian malzorgan malŝparon de energio. Unu el ni ruktis brue, kaj momente ni rigidiĝis, ŝajnigante, ke ni ne aŭdis.

*slechte
spijs vertering*

Baldaŭ la bubo atingis la vakan parcelon, kaj tuj komencis esplori ĝin. Tien ĉiuj apudaj domanoj kutimis ĵeti siajn rubojn, kaj tie malsata almozulo povas kelkfoje trovi valoregajn trezorojn: mang-restaĵoj, eluzitaj ŝuoj, cigared-stumpoj (kolektado de cigared-stumpoj por la fabrikistoj estas unu el la grandaj industrioj ĉe ni), malnova sed pura ĵurnalo, kiun, bele falditan, oni eble povos vendi kiel la hodiaŭan al iu negardema urbano, kaj similaĵoj.

Kaj tiam, li faris sian plej grandan, plej ekscitan trovon. Meze de la parcelo kuŝis noktovazo, soleca,

melankolie kavigita, senemajla, sed tamen vera noktovazo. La bubo rigardis ĝin de ĉiu flanko, zorge konsideris ĝin, kaj prove piedumis; kaj fine konkludis, ke la okazo estas profitenda. Tia lukso sin prezentas nur malofte. Do, sen eĉ ekrigardi al ni, li suprentiris sian galabijon, kaj kaŭrante, firme fiksitis sian postajojn sur la noktovazon, kun tre kontenta mieno; kaj komencis sian aferon.

Ni ne surpriziĝis, nek ŝokiĝis; momente ni tedite rigardis la bubon, kaj denove turnis la okulojn al la ekstremo de la strato, esperante aŭtobuson; vane. Kaj denove ni stare dormetis, stupore batalante kontraŭ la bezono rukti, kaj lace malamante unu la alian. Dume la bubo kantis, ridis al si, elpuŝis de tempo al tempo sensignifajn kriojn, kaj daŭre ĝuis la vivon. Poste, fininte sian taskon, li starigis, ĝustigis sian galabijon, kaj senzorge piedfrapis la noktovazon al la malproksima ekstremo de la parcelo; kaj pluiris sian vojon, gaje kantante; li eĉ ne rerigardis por vidi nin.

Ni denove turnis la okulojn al la horizonto, kaj tie, tremantan en la varmotremoj de la aero, ni ekvidis nigran punkton, kiu post dek minutoj proksimiĝos en la formo de aŭtobuso, en kiu ni povos almenaŭ sidi anstataŭ stari. Ni suspiris, kaj ni eĉ ne rigidigis kiam la sama kulpulo denove ruktis.

LA KRIKETLUDO

La teraso de la angla Sport-Klubo en Kairo estas bonega loko studi la homon; tio estas, la anglan specon de la homo. Kaj se la materialo estas iom karikatura, la studo ne estas malpli valora pro tio, nur iom pli klara.

Tie mi sidis sub la flama suno, iun posttagmezon en printempo, kun Garvin, por ĉeesti kriket-ludon. Mi estis sufiĉe intima amiko de Garvin; tio estas, mi konis lin jam de ses jaroj, mi sciis kie li loĝas, lian preferatan trinkaĵon, liajn preferatajn librojn, ni pasigis kelkfoje libertempan semajnon kune, kaj ni povis sidi kune dek minutojn sen paroli. Sed mi ne sciis, kion signifas liaj inicialoj J. F. Q., mi havis nenian informon pri lia religio (se ekzistis), lia sentemo rilate al la arto kaj la muziko, liaj emociaj spertoj aŭ amaferoj. Ni estis sufiĉe intimaj amikoj. Estis agrable kunadi.

Kiam alilandanoj volas imagi al si anglon, ili prezentas al si altstaturan blondulon, malvarmsangan kaj ne tre inteligentan, kiu neniam ridas. Nu, Garvin estis sufiĉe angla tipo: li estis iom malaltstatura, havis nigrajn harojn kaj moviĝemajn trajtojn, kaj kvankam li ridis ne tre ofte, tamen lia rideto estis tre ĉarma.

Ĉar mi ne estis membro de tiu multkosta klubo, li estis invitinta min, ke mi ĉeestu la kriketludon. Do, kiel fremdulo, mi rigardis la homspecimenojn kun intereso.

Antaŭ la teraso etendiĝis, ŝajnis al mi, preskaŭ ĝis la horizonto, la razeno, sur kiu oni ludas. Malantaŭe estis unu el la klub-domoj, kun greka kolonaro, tre malpeza kaj eleganta. Sur la teraso estis multaj tabloj, ĉe kiuj sidis la spektantoj, murmure interparolantaj kaj trinkantaj glaciigitajn trinkaĵojn. Unuavide, ili ĉiuj aspektis samaj, ĉar ili portis la anglan uniformon: griza aŭ bruna mola ĉapelo, blanka, senkravata ĉemizo kun mallongaj manikoj, blanka aŭ griza pantalone el flanelo; ĉiu viro havis la harojn tre mallongaj kaj aspektis, kvazaŭ li estus ĵus lavinta sin per broso kaj multe da sapo.

Sed post ioma observo, diferencoj de mieno ebligis distingi la diversajn subspecojn. Ekzemple, jen kaj jen estis grupoj da oficiroj, kiuj ĉiam membrigas al la klubo dum sia deĵorado en Egiptujo, sed tute ne miksas sin kun la aliaj, la civilaj membroj. Ili kuŝe sidis sur la seĝoj, kun ĉapeloj antaŭenpuŝitaj sur la brovojn, kaj interŝanĝis lakonajn frazojn. Kiam de tempo al tempo alia oficiro preterpasis iun tablon, ili kriis al li — kompreneble, ne laŭte — kun tiu aristokrata trenparolo kiun oni povas heredi, sed neniam akiri. Kaj iliaj frazoj estis zorge nekompreneblaj por la cetera homaro: aludoj duonfrazaj, subaludoj, privataj slangaĵoj, subsercoj senridetaj.

Ili perfekte ne konsciis la ekziston de la cetera homaro; oni kredus, ke ili kunparolas en vakuo, aŭ meze de vasta dezerto. Kaj tamen, ili ĝuis la fakton, ke la aliaj ĉeestantoj ne povas kompreni la aludojn

en ilia interparolado, kiel lerneĵanoj aŭ esperantistoj guas paroli sekretan lingvon en tramoj. Esti en la mondo, kaj ne aparteni: ili iagrade partoprenis la monaĥan idealon.

Ĉe aliaj tabloj sidis anglaj ŝtatservistoj, instruistoj, prosperaj komercistoj, bank-filiestroj. Unuavide ili aspektis kiel la oficiroj; sed estis rimarkeble, ke ili provis ne konscii la ekziston de la oficiroj kaj la fakton, ke la oficiroj ne konsciis *ilin*. Ili kuŝsidis kun malpli da aplombo, kaj kvankam ili provis paroli sekretan lingvon kiel la oficiroj, ili evidente nebone sukcesis. Oni povis kompreni la aludojn. Kaj krome, ili ne tiom trenparolis. Oni povis senti la kurentojn de malestimo, envio, moko, malico, embaraso, timo, kiuj fluis ĉirkaŭ la tabloj. Kaj samtempe, ĉiu atente observis la kriket-ludon, kiu estis jam komenciĝinta sur la vasta razeno, por ne maltrafi eĉ la plej subtilan lertaĵon aŭ mallertaĵon de la ludantoj: kaj kelkfoje sonis aprobaĵ murmuroj kiam ludanto faris ion speciale brilan.

La angla socia vivo estas tre komplikita.

Mi rigardis Garvin-on. Kiel la aliaj, li naĝis en tiu etoso, kiel fiŝo en akvo, kaj fiksitis trankvile la rigardon sur la ludantoj. Mi suspiris, turnis min alla razeno, kaj firme decidis interesiĝi.

Estis malfacile kredi, ke ni estas en Egiptujo, tri mil kilometrojn for de Anglujo: la sceno, la belega razeno, la blanke vestitaj ludantoj, la trankvil-voĉa spektantaro — ĉio povus esti reproduktita sur iu el la aristokrataj kriket-terenoj de Anglujo. La anglo insiste kunportas kun si Anglujon ĉien.

La blankaj figuroj kuris tien kaj reen, inter longaj haltoj, kiam ŝajne nenio okazis. Ĝi estis tre

serioza afero; ili montris grandan lertecon. La suno ĉion banis en ora lumo senpartie, indiferece. Mi oscedis.

»Bedaŭrinde, ke la egiptoj ne ludas.« Garvin parolis kun kvieta konvinko, kvazaŭ post longa meditado li estus trovinta la fundamentan kaŭzon de la neperfekteco de la egiptoj.

Unuavide, la ideo estis ŝoka; tamen, mi murmuris jese. La angloj sanktigis la kriketon, la nacian ludon, kiu neniam transplantigis sur fremda grundo. Al ĝi ili atribuas sian forton, sian honestecon, sian regkapablon, sian heroan kuraĝon fronte al danĝero, sian lojalan traktadon de aliaj, efektive ĉiun sian virton. Sen kriketo la Imperio apenaŭ povus ekzisti. Kaj, kiel la kriketo estas tipa kaj ekskluziva produktaĵo angla, tiel samkiale tiuj virtoj: honesteco, regkapablo, k. t. p., povas flori en sia perfekteco nur ĉe la anglo. El kriketa terminaro, ili faris sian plej absolutan esprimon de kondamno: kiam anglo diras, ke »tio ne estas kriketeca,« li indikas gradon de morala aŭ etika malnobleco nesupereblan. Kaj la esprimo, »teni rekta sian batilon,« indikas, ke oni montras, laŭ la angla kutimo, la plejaltan de flegma kuraĝo. Efektive, ne mankas angloj, kiuj kredas, ke se nur la tuta mondo povus lerni kaj ludi kriketon, militoj kaj internaciaj konkuradoj kaj la klasbatalo kaj similaj ĝenoj, tute malaperus. Sed tio estas nur teorio: ili estas certaj, ke neniua alia nacio povus aprezi la belecon kaj noblecon de kriketo; do, kunigi la du konceptojn, »egipto« kaj »kriketo«, tio estas neeblaĵo por la normale funkcia angla menso.

Sed Garvin estis eksterordinare larĝanima homo, kaj li povis imagi al si egiptojn ludantaj kriketon, kaj

ŝanĝigantaj en sanajn, flegmajn, lojalajn anglojn. Efektive, tiu imago pruvis lian fundamentan bonvolon por la egiptoj. Mi komencis pli estimi lin.

»Neniam mi konis egipton, kiu ludis... Tamen, jes: unu. Li estis el Oxford; mi konatiĝis kun li surŝipe, kiam mi unuafoje venis al Egiptujo.»

Por ne pripensi la ludon, mi komencis imagi al mi tiun unuan renkonton de Garvin kun egipto. Se nun, post dek jaroj en la lando, vivinte ĉiam kun, angloj, li povas imagi egipton ludanta kriketon, do certe tiutempe li estis entuziasma amikulo de la enloĝantoj de la lando, kiun li iris enloĝi. Supozeble, ĉar juna, li eĉ bonvenigis la provajn konatigajn frazojn de la egipto; li vigle respondis; ili baldaŭ duone intimiĝis kun la facileco de la juneco. Garvin parolis fervore pri sia deziro helpi la egiptojn, koni ilin, partopreni ilian vivon, lerni ilian lingvon; kaj li demandadis senfine pri la kutimoj, la religio, la literaturo, la sportoj de tiu antikva kaj interesa raso. Li ankaŭ, per aludoj, demandis pri la okazoj, kiun havus anglo por ekkoni ankaŭ la egiptinojn, ĉar, ankoraŭ virga, li sekrete kaj romantike esperis am-aventurojn, vesperajn rendezvoujn kun iu grandokula, bruna belulino de la Nilo. Antaŭ ol komenci sian vojaĝon, li legis la kutimajn romanojn pri Egiptujo, kaj akiris tute falsan bildon pri ĝi; sekrete, li eĉ imagis sin grimpana nokte en iun haremon, gardatan de ferocaj eŭnukoj, responde al la invito de helaj okuloj. Sed pri tio li nenion diris al sia nova amiko.

Ili trovis, ke ili havas komunan deziron dediĉi sin al la eduko, korpa, mensa kaj spirita, de la egiptoj; kaj ili ĵuris, per duon-aludoj anglecaj, ke ili ĉiam restos fidelaj amikoj. Garvin ĝojis, ke jam antaŭ

ol alveni en Egiptujo, li ekkomprenis la egiptan animon, farigis amiko, kiun ili fidis kaj al kiu ili rakontos siajn sekretojn, trovinte en li unike senteman spiriton.

Ili kunmarŝis sur la ferdeko ĝis mateno, frontante al la freŝa vento, sub la steloj de la Mediteraneo.

*

»Ibrahim Abd el-Karim li nomiĝis. Li estis kun sia nova edzino — anglino. Ho bela frapo, sinjoro, bela frapo! Cicilio.«

Mi facile distingis la kriket-frazon de la cetero. Do Ibrahim edziĝis al anglino. Li prezentis ŝin fiere al Garvin; ŝi pruvis lian fundamentan anglecon; li ne plu estis ajna egipto, kia iu alia. Ibrahim estis ensorbinta la anglan kulturon kaj la anglan vidpunkton, kun la angla nacia ludo; li uzis la slangajn frazojn de la Oxford-aj universitatoj tute nature; oni devas konfesi, ke li portis la anglajn vestojn iom pli gracie kaj bele, ol povus anglo, sed aliflanke, li konstante fumis pipon, kun forta angla tabako. Li volis sin dediĉi al la nobligo de Egiptujo, sed oni ne devis forgesi, ke li povas tion fari ĝuste tial, ke li tute angliĝis.

Feliĉe, Garvin tre bone akordiĝis ankaŭ kun Cicilio, jam de la komenco. Li traktis ŝin kun la peza, bonhumora, moketema kamaradeco de la juna anglo, kaj ŝi respondis katidece. Sur la ŝipo troviĝis multaj kontinentanoj, kiuj rigardis ŝin dum la manĝoj kaj dum promenadoj sur la ferdeko, laŭ maniero aŭdaca, persista, neangla, kiu ĝenis, eĉ timetigis ŝin, kaj la freŝa senzorga kamaradeco de Garvin redonis al ŝi sian aplombon.

Se egipto edzinigas eŭropaninon, li kutime pre-

feras la plej blondan, tio estas, la plej malsimilan al li; kaj li pli ŝatas la naturajn kurbojn ol la modan knaban figuron. Mi do imagas Cicilion gracie malaltstatura, bele molkurba, kun flava hararo, en kiu oni povis vidi ruĝorajn lumojn; ŝiaj violaj, nebletaj okuloj estis grandaj kaj pasiaj; kaj ŝiaj tre ruĝaj, iom tro grandaj lipoj facile ridis. Estis tre amuze, kiam Garvin ne sciis, ĉu nomi ŝin sinjorino Ibrahim aŭ sinjorino Abd el-Karim; fine, kun mokrezigno, li deklaris sian intencon nomi ŝin sinjorino Abd; sed jam antaŭ la fino de la vojaĝo li nomis ŝin tute simple Cicilio. Ili longe ridis pri siaj misprononcoj de la araba lingvo, kiam Ibrahim komencis ilin instrui.

Siaflanke, Ibrahim estis tre kontenta pri tiu amikeco inter sia edzino kaj sia nova amiko: ĝi plifirmigis sian egalecon kun la angloj, pri kiu kelkfoje, en sia subkonscio, li dubetis; tre klare, la anglo admiris lian edzinon kaj trovis ŝin simpatia: li do respektos sincere ankaŭ ŝian edzon. Pri ilia intimeco li neniel timis: li sciis, ke anglo neniam farus ion, kio ne estas kriketeca.

Garvin kaj Ibrahim longe diskutis siajn preferatajn librojn, kaj planis kunlaboron pri tradukado de anglaj ĉefverkoj en la araban lingvon, kaj de arabaj en la anglan. Ili eĉ projektis grandan libron pri la historio kaj moroj de la egipta popolo. Cicilio aŭskultis ilin pacience kaj admire, kaj fine interrompis per ia praktika demando pri mastrumado en Egiptujo. Kaj en la diskuto pri domoj, servistoj, prezoj, ili decidis, ke ili luos domojn apudajn kaj daŭrigos seninterrompe sian ravan kamaradecon.

»Ni devos trovi por vi egiptan edzinon,« diris ride Ibrahim, »kaj tiam ni estos perfekta, simetria kvaron«. Garvin estis dungita kiel registara instruisto;

Ibrahim, studinte en Anglujo, iris al promesita pos-
teno en la Irigacia Departamento; ili ne dubis, ke ili
estos lokitaj kune en Kairo.

»Buterfingrulo! Ni iris al Kairo sed disiĝis post
semajno. Oni sendis lin al Beni-Suef, kaj mi restis en
Kairo.«



Buterfingrulo estis iu ludanto, kiu kaptis, sed ne
povis teni la pilkon... En Kairo, Ibrahim, Cicilio
kaj Garvin loĝis ĉe la sama pensiono; kaj post la
unuataga sinprezento ĉe la Ministro, ili havis kelkajn
liberajn tagojn antaŭ ol komenci sian laboron.

Ibrahim prenis la rolon de drogmano, kaj ili
vizitis la Piramidojn, la Citadelon, la moskeojn, la
bazarojn kaj la indiĝenajn kvartalojn. Surprizis Gar-
vin-on la grandeco, la grandurbeco de Kairo; li atendis
kotmuran vilaĝon romantikan, kun putoj kaj palmoj,
kaj kameloj; kaj ŝokis lin la neatenditaj malpureco,
odoraĉoj kaj malsanoj de la indiĝenaj kvartaloj. La
lastajn li ne komentis kaj ŝajnis ne vidi, timante
embarasi Ibrahim-on; kaj mem embarasigis, kiam
Ibrahim iom tro emfaze atentigis pri ili, kaj mallaŭdis
la barbarecon, la sensciecon kaj la mallaboremon de
la egiptoj. Garvin ne perceptis, ke tiu troa emfazo
estas rimedo plifirmigi la anglecon de Ibrahim.

Sed ĉi ĉion ili vidis en pli ĝusta proporcio poste,
kiam ili sidis en la ĝarden-kafejo Groppi, la plej moda
rendevuejo en la centro de la urbo. Ili gravmiene
planis la restarigon, la modernigon, unuvorte la anglec-
igon de Egiptujo; kaj iliaj koroj varmiĝis pro ko-
muna ambicio altruisma. Ili estis tiom seriozaj pri
siaj reformoj, ke ili povis permesi al si sinmokon. »Vi,
Ibrahim,« diris Garvin, »prizorgos la irigacion kaj la

agrikulturon; vi florigos la dezerton. Cicilio, vi instruos al la virinoj la higienon kaj la kuirarton kaj la parizajn modojn; kaj mi komprenigos al ili la belaojn de la mondliteraturo. Ni estos la tri diktatoroj de Egiptujo, kaj ni faros el ĝi la plej feliĉan landon de la mondo.»

Tiel ili trapasis la semajnon, en ĉiam kreskanta intimeco; ili estis tro feliĉaj. Dum tiu periodo Garvin renkontis apenaŭ unu anglon. Sed fine alvenis la dekreto de la respektivaj Ministroj: Ibrahim devos iri al Beni-Suef, kaj Garvin instruos en unu el la duagradaj lernejoj de Kairo. Ili disigis kun promesoj revidi sin, ofte, kiam Ibrahim kaj Cicilio povos viziti Kairon; intertempe, ili skribos longajn leterojn.

*

»Mi vidis ilin kelkfoje poste, en Kairo. Sed estis, iel, malfacile paroli. Oni perdas kontakton.« Garvin rigardis al mi momente, por vidi ĉu mi komprenas. Mi kapjesis.

Evidente, lia sperto similis tiun de miloj de entuziasmaj junuloj. Komence, li sin ĵetis fervore en sian lernejan laboron; li zorge preparis sian lecionojn, interesajn lecionojn, vere lekciojn pri la belaoj de la angla lingvo kaj de la angla literaturo, kun deklamado de poemoj; kaj li perpleksigis, kiam la knaboj petis, post silenta kaj tute senesprima atento, ke li donu al ili regulojn pri la uzado de la tempoj. Li provis trakti la knabojn egalece, kamarade, kaj partopreni iliajn plezurojn kaj problemojn: li ne sciis, ke tiu kapablo estas la valora frukto de multjara sperto. Sajne la knaboj ne komprenis lian intencon — eble ili ne sufiĉe komprenis la anglan lingvon: li devis konfesi, ke kvankam la plimulto el ili studis la lingvon jam de dek

jaroj, ili tamen ne povis formi eĉ unu seneraran frazon kaj apenaŭ komprenis, kiam oni parolis al ili. Kaj li estis amuze naŭzita, aŭ naŭze amuzita, kiam ili diris al li flataĉe. »Sinjoro, sinjoro, vi estas nia patro, sinjoro,« aŭ »Vi estas bonega instruisto, sinjoro.« Kaj lia puritana kolero varmigiĝis, kiam ili demandis en klaso, kun ruza inocenteco, »Sinjoro, kion signifas *utero*?« Li kredis, ke li komprenas kaj respektas la patriarhan menson de la egiptoj, ilian simplan gastamon, ilian rave naivan mondkoncepton; sed estis malfacile akordiĝi ĝuste kun la knaboj en lia lernejo: ŝajne io estis koruptinta ilin — kredeble la kontakto kun la eŭropa civilizacio.

Ankaŭ kun la adoltoj estis malfacilaĵoj. Garvin parolis ofte kun la egiptaj instruistoj en sia lernejo, kaj invitis ilin vespermanĝi en lia pensiono. Sed ili estis embarase silentaj, kaj ofte ridis aprezeme pri frazo lia, kiu estis tute serioza. Ili ja parolis la anglan lingvon, sed ŝajne la vortoj havis por ili alian signifon, aŭ tute ne havis signifon; li kaj ili estis kvazaŭ dentoj, kies dentoj havas malsimilajn grandecojn: oni povis kunmeti la radojn, sed la dentoj ne interkroĉiĝis. Se kelkfoje ili ŝajne komprenis lian frazon, kaj kaptis emfaze, ili poste faris rimarkigon pri la plej malgrava flankaĵo en ĝi. Estis efektive senkuraĝige, kaj strange laciĝe.

Suspire, li sin turnis al la angloj en sia pensiono: ŝtatservistoj, registaraj instruistoj, komercistoj, oficistoj. Kun ili li povis paroli libere, certa, ke ili komprenos senpene ĉiun lian frazon, kaj ne mislokos la emocian akcenton; kaj tio kompensis la fakton, ke la temoj kun ili priparoleblaj estis tre limigitaj. Laboro konsiderata kiel puno, dancado, feriaj spertoj — plej-

parte amaj aŭ drinkaj, la malhonesteco de la egiptoj, la relativa komforto de la diversaj ŝipoj irantaj al Anglujo, la seksa obsedo de la egiptoj, skandalaj rilatoj inter diversaj geangloj en Kairo, firakontoj, sporto, la ĝenerala malnobleco de la egiptoj. »Kiam vi estos restinta en Egiptujo tiom longe, kiom mi, mia knabo,« oni diradis al li, »vi lernos fidi neniun egipton. Pli malbona ol mahometano, estas nur kopto; kaj kontraŭe, pli malbona ol kopto estas nur mahometano. Kaj la plej dangeraj estas ĝuste tiuj, kiuj ŝajnas plej civilizitaj; dum jaroj eĉ, ili ŝajnas esti fidindaj kaj simpatiaj, kaj tiam ili faras ion vere abomenindan. Ah, kion mi ne donus por foriri el ĉi tiu malbenita lando por ĉiam!«

Tiujn parolantojn Garvin silente malestimis; li estis jam sufiĉe sagaca por kompreni, ke kio ŝajnas ruzaĵo aŭ malhonestajo, tio ofte estas nur rezulto de alia sed egale estiminda morala kodo aŭ mondpercepto; kaj li komprenis ankaŭ, ke per sia arogema kaj malessimema konduto la eŭropanoj mem tre ofte elvokas malamikan sintenon ĉe egiptoj.

Li ne havis la ŝancon renkonti iun kun la pli vastaj interesoj kaj konoj, la pli grandanima komprenemo, kiujn li mem havis; kaj grade, nevole, li komencis limigi sian intereson en la terenon de la aliaj angloj; kaj grade, nerimarkite, la venena vidpunkto, kiun li aŭdis esprimi ĉiutage, komencis penetri en lian menson. Ĉe la komenco ofendis lin la malestima angla vorto por egipto, *ĝipo*; sed post kelkaj semajnoj, senrimarke, komencis ĝin uzi ankaŭ li. Kaj komencis formigi en lia menso la senvorta, neagnoskebla penso: ankaŭ Ibrahim estas egipto.

Dum la vespermangoj, kiam Ibrahim kaj Cicilio

venis iun semajfinon al Kairo, ili komence babilis, facile pri mastrumado, pri la nova apartamento, kiun Ibrahim trovis en Beni Suef, pri la lernejo de Garvin. Baldaŭ evidentigis, ke nek Ibrahim nek Garvin trovis ankoraŭ okazon komenci tiujn reformojn, pri kiuj iam ili entuziasmis; terure estis la inerto venkota; en la paroloj de ambaŭ ekaperis jam la unua nuanco de senkuragigo. Ili diskutis por trovi la punkton, de kiu ili ekiros por komenci sian reformadon; kaj en la interparolado kelkaj malestimaj frazoj pri la egiptoj — kompreneble, neniel aplikeblaj al Ibrahim — glitis el la buŝo de Garvin: frazoj kiujn li papage memoris de la anglaj konatoj en la pensiono. Ili komencigis per la indulgema, kompata frazo, »Kompreneble, oni devas konfesi, ke la egiptoj...«, kaj sekvis mallaŭda senatesta generalaĵo, kiun la sekanta »tamen« ne povis forvizi. Ibrahim vundigis, sed ne povis kontraŭstari: tio tro identigus lin kun la egiptoj — kaj la nivelo de la konversacio estis pure angla nivelo. La atmosfero iomete malvarmigis. Kaj baldaŭ ili iom ofte silentis, vane serĉante temojn por preparolado. Kelkfoje Garvin ŝercis kun Cicilio pri la aŭtaj gastoj en la restoracio, pri unu-du egiptoj grasaj, kiuj tro entuziasme glutis sian supon. Ibrahim silentis, kun sia pipo inter la dentoj. Kaj grade, nerimarkite, la sinteno de Garvin pri Cicilio fariĝis nuance protektema. Kelkfoje ili iris kune al kinejo, kaj en la emocia varmo, kiu sekvas spektadon de filmo aŭ teatraĵo, ili gaje babilis senretene kiel antaŭe; kaj Garvin kritikis la anglajn kaj usonajn filmojn, emfazante ties stultecon, pro la nekonscia bezono kontraŭpezi siajn mallaŭdojn pri la egiptoj... Kiam ili estis reirintaj al Beni Suef, Garvin

ofte pensis pri Cicilio kun tenera amikeco; li sentis, ke eble Ibrahim ne vere komprenas sian karakteron kaj emociajn bezonojn.

*

»Ne ĉio marŝis bone en Beni Suef. Snobeco. Kaj estis parencoj.« Garvin mane aplaŭdis iun brilan baton de iu ludanto, kaj tenis la rigardon fiksita sur la razeno.

Dum la unuaj semajnoj en Beni Suef, Cicilio estis tre feliĉa. Ĉio en la malgranda provinca urbo estis kurioza, interesa, romantika; kaj ŝi sukcesis ignori la okulmalsanojn ĉie videblajn, la odoraĉojn sur la stratoj, la muŝojn, la mankon de ĉia amuzo.

Alvenis la mebloj kiujn ili mendis en Kairo, kaj estis rava plezuro aranĝi, rearanĝi, beligi sian propran hejmon. Tri-kvarfoje ŝi kaj Ibrahim metis kaj remetis la meblojn en ĉiu ĉambro, ĝis fine ili trovis la perfektan aranĝon. Posttagmeze, kiam estis plej varme, ili senvestigis sin, kaj nudaj, babilis, legis, aŭ ame ludis, ĝis kiam ili glitis en tiun dolĉan dormon de la egipta posttagmezo. Vespere, ili promenis kune, esplorante la urbeton, ĝuante la freŝan refortigan venton, kiun ĉiu egipta vespero alportas. Ibrahim estis tre atentema, amema; ili partoprenis ĉiujn pensojn seriozajn aŭ amuzajn.

Ili dungis serviston, kaj tio estis plua plezura ekscito por Cicilio, kiu devenis de familio kultura, sed ne sufiĉe riĉa por havi servistinon. Ŝi luktis kun la araba lingvo, progresante, por diskuti kun la servisto pri la tagaj aĉetaĵoj, por aranĝi la manĝojn, por instrui al li kuiru anglajn pladojn. Ofte vespermangis kun ili egiptaj kolegoj de Ibrahim, junaj,

amikemaj homoj, kiuj sufiĉe bone parolis la anglan lingvon; tamen, ili tro ofte forgesse glitis en la araban lingvon, ridante longe pri nekompreneblaj ŝercoj, kaj Cicilio devis sidi kun ili kvazaŭ malaperante, por ne embarase memori al ili, ke ŝi ne komprenas. Sed ŝi ankoraŭ ne sentis la mankon de anglaj kunuloj.

En Beni Suef loĝis dek-kvin aŭ dudek angloj, el kiuj dek havis kun ŝi edzinon. Kelkfoje Cicilio vidis ilin surstrate, kaj ili rigardis ŝin kun malvarma, ete ofenda scivolo. Du-trifoje okazis, ke anglino haltigis ŝin, salutante ĝentile, eĉ afable. Tiuj renkontoj estis malesperige similaj unu al alia. »Bonan tagon,« diris anglino. »Mi ofte vidis vin surstrate, kaj mi komprenis, ke vi estas nova tie ĉi. Ĉu via edzo estas instruisto?« Kun ĝoja rideto, Cicilio respondis kore al ŝi. »Jes, mi estas tute nova; mi apenaŭ konas la stratojn. Mi estas s-ino Abd el-Karim — mia edzo estas en la Irigacia Departemento.« La anglino rigardis ŝin ne malpli afable, ne malpli ĝentile, sed ŝajnis, kvazaŭ ŝi korpe malproksimiĝus; ŝajnis, kvazaŭ parolus senvarma kartona figuro. »Aha, mi komprenas. Nu, mi ĝojas, ke la vivo tie ĉi plaĉas al vi. Iam vi devos temanĝi kun mi. Gis revido!«

Cicilio dankis varme, antaŭ ol ŝi konsciis, ke estas nenio dankinda. La anglino diris nek sian nomon, nek sian adreson; kaj eĉ en tiu malsincera invito ŝi ne kunmetis la nomon de Ibrahim.

En la urbeto disvastiĝis la novaĵo, ke tiu blonda novulino estas edziniĝinta al egipto. Ili kredis, ke ili kompatas ŝin, sed ili ne faris la solan aferon, kiun proponus al ili la kompato: inviti ŝin kaj ŝian edzon al hejmoj, trakti ŝin kiel amikinon. Kontraŭe, ili fakte

ignoris ŝin, salutante tamen tute ĝentile, kiam ili preterpasis ŝin sur la strato. Cicilio ne havis dikan haŭton; ŝi komprenis, ke ŝi estas pario, kaj koleriĝis; kaj nun, ĉar la kunesto de angloj estis malpermesita al ŝi, ŝi komencis ĝin deziri. Matene, kiam Ibrahim estis en la oficejo, kaj en la domo estis neniuj, kun kiu ŝi povus paroli, krom la servisto, ŝi dolore sopiris al ajna anglo aŭ anglino, por iom gaja petola babilado; kaj kelkfoje ŝi kaŝe ploretis, haste viŝante la okulojn, se la servisto venis en la ĉambron. Sed pri ĉio ĉi ŝi nenion diris al Ibrahim; eĉ menciis la konduton de la anglinoj estus insulti lin.

Tiam la patro de Ibrahim decidis, ke li iros kunvivi kun sia filo kaj bofilino. Kiam li unue faris tiun proponon, Ibrahim ne volis akcepti; sed li estis egipto en Egiptujo, kaj la ideo, ke la tuta familio kunvivus, estas tiom familiara, tiom parto de la natura ordo, ke li ne povis multe protesti — apenaŭ konsciis, ke estas io priprotestinda. Kaj Cicilio, ne komprenante kiaj estos la novaj cirkonstancoj, kaj ne volante vundi Ibrahim-on, ne oponis la ideon.

Do, ili venis. Estis la patro, la patrino, du junaj fratoj — lernejanoj, kaj du pli aĝaj fratinoj, kiuj atendis edziĝproponojn. La patro estis pensiita ŝtatservisto; li sidadis en la domo preskaŭ la tutan tagon. La virinoj levigis malfrue, kaj ankaŭ ili sidadis preskaŭ la tutan tagon en la saloneto, frandante sukeraĵojn, babilante en la araba lingvo, ĉar ili tute ne komprenis la anglan. La sama **unu** servisto havis multe pli da laboro, kaj sekve, ne povis teni la apartamenton tiom pura, kiom antaŭe. La egiptinoj faris nenian laboron, do ofte Cicilio prenis viŝilon por purigi la meblojn

aŭ la fenestrojn. Si suspektis, ke la egiptinoj ĉar ŝi ne parolas kun ili, opinias ŝin pretendema, afekta, — forgesante, ke ŝi ne komprenas la araban lingvon; kaj ŝi sentis, ke ili mokas ŝian laboron, ĝojante ke ŝi tiel humiligas sin. La servisto ne plu havis tempon por prepari aŭ lerni anglajn pladojn, kaj la manĝaĵoj fariĝis tute egiptaj: bonaj, nutraj, sed por anglino, kiu ne havis okazon al ili kutimiĝi, malallogaj. La patro kaj la virinoj ne manĝis tiom senbrue, kiom oni devas laŭ la eŭropana etiketo, kaj kelkfoje Cicilio preskaŭ ne povis manĝi pro repuŝo; ŝi ne plu havis apetiton. La lingvo de la domo fariĝis la araba, kaj ŝajnis, ke ŝi tre malofte havis la okazon paroli, babili gaje, intime ŝerci en la angla lingvo kun Ibrahim. Kaj plej do'ore, ŝi konstatis, ke li kaj ŝi ne plu estas la perfekta unuo, en kiun ili kunfandiĝis jam de la fianĉiĝo: ili estis apartigitaj, ili ne plu estis kunstaraj individuoj — ili fariĝis jam nur du eroj de la familia organizo. Li ŝajnis ne plu esti ŝia Ibrahim, kun kiu ŝi ludis, korpe kaj anime nudaj; li estis egipta familiano, kun kiu hazarde ŝi kunvivis. Per ridetoj specialaj, per karesoj, per senfina tenereco, ŝi provis reproksimiĝi al li; siaflanke, li sentis, ke io ne marŝas bone; li provis repreni ŝin al si: sed la familia atmosfero estis tro forta, estis jam neeble. Cicilio ofte volis plori, ploregi, sed ne povis: en tiu trologata domo ne estis rifuĝejo, solecejo, en kiu oni povus liberigi la sentojn.

*

Ne estis sur la razeno ludantoj; supozeble ili estis trinkantaj teon. Garvin meditis kvaronhoron. »Jes«, li diris fine, »la aferoj marŝis sufiĉe malbone. Unufoje ŝi eĉ forkuris al Kairo. Volis rifuĝi al mi.«

Tiu mizera stato daŭris en la antaŭe feliĉa pro-prega domo, Cícilio ne sciis ĉu plurajn semajnojn, aŭ monatojn: ŝi jam preskaŭ forgesis, ke iam ŝi estis la sola persono en la mondo por Ibrahim. Tamen, de tempo al tempo venis memorospasmoj, kiuj kunprem-
ŝian koron; tiam ŝi devis eliri el la domo haste, rapide marŝante por ne verŝi larmojn; poste, ŝi reiris al la apartamento, ŝvitanta kaj ellacigita, sensenta, senvola, senespere soleca, malgraŭ la prizorgo de Ibrahim — kompatinda Ibrahim, kiu, ne komprenante ŝian ĉagrenon, tamen subkonscie suspektis la kaŭzon, volis konsoli, sed jam ne povis ŝin helpi.

Kaj fine, unu matenon, sen antaŭa pripenso, ŝi iris al la stacidomo, aĉetis bileton kvazaŭ en sonĝo, kaj iris al Kairo.

Kiam Garvin reiris al la pensiono posttagmeze, li trovis ŝin sidanta sur la lito en lia ĉambro. Li salutis ŝin, kaj espris sian surprizon pri tio, ke ŝi venis sen Ibrahim; kaj, dum li parolis, eĉ li, nerimarkema, povis vidi, ke ŝi havas ian angoron, ke ŝia animo estas troŝargita.

»Kio estas?« li demandis. »Ĉu io ne funkcias bone?«

Si neis, ke io ne funkcias bone. »Ne,« ŝi diris, »mi venis nur por ŝanĝo de aero. Kompreneble, Ibrahim estas malliberulo en la oficejo.«

Si ridetis, sed la lipoj kaj la voĉo tremis; kaj subite ŝi ploretis, ploris, kaj kaŝis la vizaĝon en la kapkusenon. Garvin eksidis ĉe ŝia flanko, karesante ŝian ŝultron, kaj iom post iom la tuta historio elverŝigis: estas solece, la virinoj ĉiam sidadas kaj sidadas, frenezige, Ibrahim estas brava, li estas bonulo, sed tiom

malproksima, ŝia feliĉo estas ruinigita, oni ne povas manĝi la egiptajn mangaĵojn, sed Ibrahim amas ŝin ankoraŭ, se nur ŝi havus anglan amikino en la urbeto, sed ŝi ne rajtas riproĉi al Ibrahim, li faras ĉion, kion li povas, la domo estas tiom malpura... Garvin diris konsolajn vortojn, kaj karesadis ŝian ŝultron; kaj fine la ploroj finiĝis, malpli pro liaj konsoloj, ol pro la fakto, ke la spasma elĉerpiĝis. Ŝi residis, kaj komencis ordigi siajn harojn; kaj kiel kutime, ĉe la fino de senespera ploro, eklumis en ŝia koro iom da dolĉa espero.

Garvin diris al ŝi, ke ĉio estos en ordo; nur necesas iom paroli kun Ibrahim, li komprenos, li povos pli komforte aranĝi la vivon en Beni Suef, li kaj ŝi devus veni pli ofte al Kairo por babili kaj amuziĝi. Garvin rigardis ŝin, ŝiajn ruĝrandajn okulojn, kaj ŝian kuraĝan provon rideti, kaj li volis preni ŝin en siajn brakojn kaj kisi ŝin, kompreneble nur amike, konsole. Li eliris, dum ŝi lavis sian vizaĝon, kaj sendis telegramon al Ibrahim, petantan, ke li venu al Kairo tuj. Garvin sentis, ke li havas grandan respondumon; li devis refeliĉigi la vivon al siaj amikoj; kaj li marŝis kun la ŝultroj rektaj, kaj cedis lokon sur la trotuaro al aliaj marŝantoj eĉ pli ĝentile ol kutime. Li sentis sin tre saĝa.

La kaj Cicilio kune vespermangis en la pensiono, tre gaje, konversante ne per kompletaj, formalaj frazoj, sed per la duon-aludoj de intimaj amikoj; ili sentis sin tre proksimaj unu al la alia.

Ibrahim alvenis je la deka; ĉar ne estis taŭga vagonaro, li estis luinta aŭtomobilon. Li estis tre malsata, kaj, dum li manĝis, ili parolis pri bagateloj. Poste ili iris al la ĉambro de Garvin, kaj diskutis la situacion

gis la tria kaj duono. Cicilio estis tre amema al Ibrahim, ŝi ridis al li gaje kaj sidis proksime al li; ŝi ne multe parolis: estis Garvin, kiu klarigis al Ibrahim ŝian malfeliĉon kaj la kialon por ŝia forkuro.

Ibrahim kulpigis sin pri ĉio; estis, bedaŭrinde, jam ne eble forsendi la familianojn, sed li aranĝos, ke Cicilio kaj li havu pli da privateco por siaj propraj aferoj. Li sciis, ke la vivo en Beni Suef estas teda por Cicilio; kaj li proponis, ke almenaŭ unufoje semajne, ŝi iru al Kairo posttagmeze, tie dormu la nokton, kaj reiru al Beni Suef la proksiman matenon; certe Garvin dediĉos al ŝi unu vesperon kaj ŝin amuzos? Garvin kompreneble volis ĉion fari por feliĉigi siajn amikojn; kompreneble li dediĉos sian tempon al Cicilio. Cetere, lin tedis la aliaj pensionanoj; estus tre agrable paroli kun inteligenta persono. Fine ili disiĝis por la nokto. Cicilio ridetis tre dankeme al Garvin, kaj Ibrahim diris, ke li estas bonega, kara amiko, kaj ke li ĉiam sciis, ke oni povas dependi de anglo. Garvin iomete kuntiris la brovojn — oni ne diras tiajn emociaĵojn ĉe angloj — sed li sentis, ke Ibrahim pravas, kaj ili ĉiuj endormiĝis tre feliĉe. Dum tiuj lastaj momentoj antaŭ dormo, kuŝante en la brakoj de Ibrahim, Cicilio sentis, ke ŝi retrovis la feliĉan unuan periodon de sia edzineco.

La proksiman matenon ŝi reiris al Beni Suef kun Ibrahim.

La ludantoj revenis sur la kampon. Garvin rigardis ilin takseme. »La armea ludantaro jam ne povas gajni,« li diris; »mankas tempo. Nu, post tio, ŝi venis regule ĉiusemajne al Kairo. Ni akordiĝis tre bone; fakte, unufoje, preskaŭ... hm... preskaŭ tro bone.«

Tiu regula ekskurso al Kairo fariĝis por Cicilio

la kulmino de la semajno. Estis pli facile toleri la malagrablaĵojn de la familia vivo; ŝi sentis, ke ŝi estas sendependa de la aliaj, ĉar ŝi povas eskapi. Ankaŭ por Garvin ĝi estis la ĉefa plezuro. Grava faktoro en lia plezuro estis la fakto, ke li malsatis je la kunesto de virino, ĉar anglaj virinoj, aŭ virinoj kiujn povas koni angloj, estas tre maloftaj en Egiptujo.

Ili iris al koncertoj kaj kinejoj kaj lekcioj; ili promenis laŭ la stratoj, komentante la preterpasantojn, provante diveni, kiujn el la cent lingvoj de Kairo ili parolas; ili vespermangis en italaj, grekaj, egiptaj restoracioj, kaj kelkfoje en la hotela ĝardeno en la ombro de la Granda Piramido mem. Ili priparolis sin mem, sian vivon, kaj ĉiu aŭskultis la alian kun rava intereso. Tiujn vesperojn Cicilio aspektis tre bela; ŝi marŝis risorte, glate, ŝiaj vangoj estis ruĝaj, ŝiaj okuloj brilis pli ol kutime. Kaj ĉe ŝia reveno al Beni Suef, ĉio iris pli bone inter ŝi kaj Ibrahim; ŝajnis, ke efektive reviviĝis iom el la malnova rilato.

Unu posttagmezon, Garvin kaj Cicilio promenis sur la insulo Gezira, post temango ĉe la Angla Sportklubo. Ili intencis iri frue al kinejo, kaj poste veturi al la Piramidoj por vespermango. Estis la sesa, kaj jam komencigis la sunsubiro. Ili marŝis laŭlonge de la Nilo, malmulte parolante. Okcidente, la ĉielo estis ora lago, el kiu falis tie kaj ĉi tie gutoj oraj sur la purpure brunan akvon de la rivero. Kuŝis sur la urbego la varma silento de krepusko, nur de proksima minareto sonoris arĝente la krio de muezino. Ili eniris unu el la parketoj borde de la rivero, kaj sidis, kontemplant la fantastajn siluetojn de la orientaj domoj sur la mal-lumiĝanta ĉielo.

Ili ne parolis. Garvin turnis la kapon al ŝi; li

povis vidi nur la formon, estis jam tro mallume por distingi la trajtojn. Subite, senhaste, li klinis sin kaj kisis ŝiajn lipojn. Ŝi sidis senmove momenton, kaj tiam ŝi ĵetis la brakojn ĉirkaŭ lian kolon, kaj pasie premis la lipojn al la liaj... Ili apartigis konsternite: kio okazis? Ni ne intencis tion... Garvin ekstaris, kaj rigardis ŝin kun klinita kapo. Ŝi rigardis blinde la riveron. Ŝi ne turnis la kapon al li.

»Estus bone ekiri,« li diris; »alie ni malfruos ĉe la kinejo.«

Ŝi leviĝis. »Jes, ni iru,« ŝi diris.

Ili marŝadis senvorte, zorgante ke la manoj, la ŝultroj, la femuroj ne kuntuŝu dum iro, kvazaŭ por pruvi per la nuna ekstrema zorgo, ke tio ne okazis vere. Sed en ili la sango saltadis, vigle fluis, ili sentis pikojn en la karno kvazaŭ de elektra kurento.

En la kinejo ili sidis flankon ĉe flanko, kun la vizaĝoj turnitaj al la ekrano. Garvin nenion vidis de la filmo; li ne povis fiksi la atenton sur la moviĝantaj bildoj. Sed lia korpo, memvole, fiksas sian atenton sur la korpon apudan. Li ne povis pensi, sed unu frazo konstante dancis tra lia cerbo: Tio estas neebla, tio estas neebla. Li rigardis Cicilion. En la ombra lumo li vidis, ke ŝi rigardas la ekranon per malplenaj okuloj.

»Mi ne volas vidi plu«, li diris; »ĉu vi?«

Ŝi kapneis, kaj ili eliris la kinejon. Laŭ lia propono, ili iris al la Piramidoj. Dum la veturo, ili daŭrigis sian silentadon. Ĉiu volis nei la nekredeblan okazon; ĉiu preparis sin por diri, ke kompreneble ĝi estis akcidento, sensignifa; ĉiu senkonscie sentis plezuron revivante tiun momenton — kompreneble nur por malkovri la kaŭzon de tia strangajo.

En la restoracio, sub la orobskura maso de la

Granda Piramido kaj la inundanta lunlumo, ili malvarmsange analizis ĝin. »Kompreneble, ĝi estis frenez-aĵo,« diris Garvin; »ĝi nenion signifas. Ni scias, ke ni ne amas unu la alian: vi amas Ibrahim-on; li estas mia amiko; kaj mi amas neniun; mi estas tipa fraŭlo.« Garvin sentis agrablan sinkompaton, dirante tion; kaj Cicilio premis lian brakon, kaj diris, »Kompata tinda fraŭlo! Ni nepre devos trovi por vi edzinon.«

Li neis, ke li deziras edzinon; iel malplaĉis al li la ideo, ke li serĉu edzinon; kaj li reiris al la antaŭa temo.

»Nu, ĉar ni scias, ke ĝi estis nur sensenca akcidento, ni povas ĝin ignori. Ĝi estis eĉ utila: ĝi montris al ni, ke ni estas bonegaj amikoj, kiuj tamen ne amas unu la alian. Ni do povas daŭrigi nian rilatadon, sentimi, ke ni faros sensencaĵon.«

Kompreneble, ili konsentis, ne estas necese rakonti pri tio al Ibrahim; la afero estas finita, enterigita; plej bone forgesi. Kaj ili reiris al la pensiono, babilante tre ĝoje kaj intime pro la nova, elprovita, platona bazo de sia amikeco. Kaj kiam li diris al ŝi bonan nokton, li premis ŝian manon per tre forta, tre amika, komprena premo. Ili estis kamaradoj.

Finita kaj enterigita. Tamen, la proksiman matenon, kaj la sekvintajn tagojn, Cicilio sentis sin pli malpeza, pli gaja; ŝi pli ofte ŝercis kun Ibrahim, pli tenere premis sin al li, pli pasie akceptis liajn karesojn: ili konis grandan ĝojon. Kaj tiu ĉi ĝojo kaŭzis al ŝi kroman ĝojon: ĝi estis pruvo, ke ŝi ja amas Ibrahim-on. Estis eĉ bonŝance, ke tiu... akcidento okazis.

*

»Tiu juĝanto ŝajne neniam vidis kriket-ludon

antaŭe, « rimarkis Garvin. Tamen, ĉar li estis anglo kaj kriket-entuziasmo, li ĝin diris tre mallaŭte kaj trankvile. »Kompreneble,« li daŭrigis, »ŝi ankoraŭ venadis al Kairo ĉiusemajne. Ĉio ŝajnis pluiri senŝanĝe. Kaj tiam subite — mi ne scias kiel ĝi okazis — ni fariĝis geamantoj.»

Ĉio ŝajnis pluiri senŝanĝe. Garvin kaj Cicilio kune iris al koncertoj kaj kinejoj kaj lekcioj. Ili promenis laŭ la stratoj, kaj vespermangis en romantikaj restoracioj. Ili povis permesi al si eĉ pli intimajn, personajn konfesojn ol antaŭe, ĉar ili estis decidintaj, ke *tio* ne povas okazi denove. Tiu kombino el intimeco kaj memkonscia virto donis al ili strange dolĉan feliĉon. Ili scie lasis sin proksimiĝi al la danĝero, kaj ili estis sentimaj, ĉar ŝi ja amis Ibrahim-on, kaj Garvin amis neniun: ili ĉiam povis retroiri antaŭ ol fari sensencaĵon. Ili preparolis tiun punkton, kaj konsentis, ke tiu sekura scio donas al ilia amikeco tute eksterordinaran plezuran kvaliton. Ĝi estis bela, tre lerta aranĝo. Ofte, plurhore, ili preparolis sian interesan, plezuran, sendanĝeran rilaton en la intimeco de la ĉambro de Garvin, en la posttagmezo antaŭ ol eliri por vespermango kaj kinejo, aŭ nokte post vizito al kinejo, antaŭ ol Cicilio foriri al sia litĉambro.

Ĉio pluiris senŝanĝe. Ĝis unu tago. Tiun tagon ili iris posttagmeze al la Zoologia Ĝardeno de Kairo. Ĝi estis malagrabla, malkontentiga tago. Nenio marŝis bone. Jam ĉe la komenco ili preskaŭ malpaciis, ĉar Garvin volis iri al la kafejo Groppi por temangi, kaj, Cicilio insistis iri al la Zoologia Ĝardeno. Li cedis ne tre kontente. Iliaj humoroj ne akordis; ili interparolis tre lakone. Mankis temoj por konversacio; kaj kiam li

faris rimarkon, ŝi ŝajne ne kaptis la signifon, kaj tio iris lin. Ili fine marŝis antaŭ la kaĝoj senparole, kaj haltis antaŭ la leonoj. Ŝi staris iomete antaŭ li; ili frontis al la kaĝo, sed ili ne multe atentis la leonojn. Subite li konsciis ŝian formon, la molajn rondajn pugojn, la gracian talion, la delikatajn mampintojn kiuj levis la korsaĵon. Li konsciis, ke ŝia korpo estas varma kaj velura: li tion konsciis; li ne pensis. Li tuŝis ŝian brakon; ŝi turnis sin al li, kaj dum longa minuto iliaj rigardoj kunkroĉiĝis. »Venu,« li diris. Ili iris ekster la ĝardenon, marŝante iom aparte, kvazaŭ fremduloj. Li alvokis taksion, kaj irante al la pensiono, ili sidis ĉiu en sia angulo, senparole, kun okuloj direktitaj antaŭen. La atento de ĉiu estis turnita internen, kvazaŭ ili revus pri ia duone forgesita sperto, sed ĉiu korpo akre konsciis la proksimecon, la dolorigan belecon de la alia; kvazaŭ ĉiu poro de la korpo estis okulo, kaj rigarde esploris ĉiun kurbon, ĉiun kavon, ĉiun falton de la alia.

Alveninte, ŝi sekvis lin al lia ĉambro, sed kiam li malfermis la pordon, kaj paŝis flanken por ke ŝi eniru, ŝi ŝajne vekigis, kaj flustris, »Ne, mi ne povas, ne...« Li tenis ŝian brakon.

»Venu,« li diris.

✱

»Mi supozas, ke ĝi ne estis tute kriketeca,« diris Garvin juĝeme. »Sed ŝi ne povis esti feliĉa kun egipto. Tamen, li kondutis kiel blankulo. Supozeble, li konsoligis.«

Poste, kiam ili revenis al la racio, ili sidis sur la lito, seriozaj. For estis la irita ekscito, kiu plenigis ilin antaŭ duonhoron; ĝin anstataŭis granda, tenera dank-

emo, kaj interna varma sparko, supozeble la amo; kaj ĉiu havis ankaŭ solenan fieron, naskitan de la sento, ke ili sentime, heroe sekvis sian instinkton, kaj ke ĉiu fariĝis la centro de la universo por la alia. Ili sentis, ke ili ion faris gravegan. Kaj Garvin sentis la strangan fieron de la viro, kiam li kontentigis la korpan deziron de sia unua virino.

Ili diskutis tion, kion ili devas fari. Nepre ili devas tuj sciigi Ibrahim-on; kompatinda Ibrahim, ili diris kun suspiro kaj momenta malgajo. Tamen, li komprenos; li estas raciulo. Malprecize, ili supozis, ke devos okazi eksedziĝa proceso, kaj ke ili iam geedziĝos; sed nur malprecize: la nun bolanta sperto per sia plene ego elpuŝis ĉiun ordigan planan penson. Fine ili konsentis sendi telegramon al Ibrahim: »Cicilio restas Kairo bonvolu veni morgaŭ grave Garvin.«

Forsendinte ĝin, ili denove promenis laŭ la stratoj de Kairo; sed ĉi-foje, kiel kutime ĉe novaj geamantoj, la urbo estis pli hela, pli interesa, pli amuza, pli aventuroplena, ol iam ajn antaŭe. Ili marŝis sur la nuboj kaj enspiris aeran vinon. Kaj kun ridoj ili esprimis la esperon, ke ili ne renkontos konaton, ĉar tiu nepre divenus, kio okazis, per ilia ravita mieno.

Tamen, interne, Garvin komencis timi la morgaŭan intervjuon kun Ibrahim. Kompreneble, Ibrahim estis raciulo; li certe komprenos la aferon. Sed jen la malfacilo: Garvin komencis timi, ke Ibrahim komprenos la aferon nur tro bone.

Nude priskribita, la afero estis, ke la edzino de Ibrahim estis forŝtelita de Garvin; ke anglo ŝtelis la edzinon de egipto — terura humiligo por anglo; kaj la ŝtelisto estis ĝuste la plej bona, la plej fidata amiko

de Ibrahim. Eĉ plej favora konsidero ne povus nomi la aferon kriketeca. La urtika jukado de sinkulpigo estas netolerebla; kaj Garvin bezonis ŝanĝi sian koncepton pri sia karaktero kaj precipe pri la karaktero de Ibrahim. Li baldaŭ sukcesis kulpigi al Ibrahim, kun iom da indigno, ke ĉi tiu ne bone prizorgis Cicilion, ke li ne rajtas enkarcerigi anglinon en Beni-Suef — tiu morta vilaĝo, kaj ke ĉi ĉio pruvas, pli malpli, ke efektive Ibrahim ne tre multe amas Cicilion. Pri ĉio ĉi Garvin diris nenion al Cicilio; oni ne povas envortigi tiajn pensĉenojn; en vortoj ili aspektas tro nudaj. Ŝi ne rimarkis lian silentemon: ŝi tre feliĉe ŝabĉilis pri la stratoj, pri ilia estonteco, kaj, en la pli mallumaj stratoj, pri la beleco de lia korpo. De tempo al tempo ŝi pensis kun milda ĉagreno pri la malfeliĉa Ibrahim.

Dum vespermanĝo li kelktempe forgesis la mortgaŭnon: sed ĉi revenis en lian menson poste. Ĝi fine malaperis en la malluma kuneco de la nokto: dum tiu sorĉa, ŝpirkaptita ravo ne estis loko en ili por io ajn, kio ekzistis ekster iliaj korpoj.

Matene, li devis foriri al la lernejo: eĉ kiam la plej ekscita evento de la mondo alvenis, tamen la laboro devas daŭri. Ili parolis pri praktikaj aferoj; pri tagmanĝo, pri la probabla horo, kiam Ibrahim alvenos en Kairo. Kaj Garvin foriris al la lernejo, peze, grize; liaj pensoj ankoraŭ ne funkciis.

En la lernejo li estis iritiĝema: la multvortaj, signifomankaj frazoj de la egiptaj instruistoj en la ripozĉambro preskaŭ kolerigis lin; ili ŝajnis al li preskaŭ subhomaj. Kaj nekonscie li avide kaptis la motivon por malestimi la egiptojn, tio estas, egipton.

Vundinte netolereble unu egipton, li bezonis malestimi ĉiujn egiptojn por restarigi sian sinrespekton. Tamen, li estis pli ol ordinare lojala rilate al aliaj rasoj; kaj lia menso devis fronti al la problemo, enteni ĉi tiujn du pensojn: »La egiptoj estas simpatiaj, kaj pli bonaj, pli honestaj, ol volas konfesi la angloj,« kaj »Ibrahim estas nur egipto; por li la afero estas malpli dolora, malpli profunda, ol ĝi estus por ni.« Baldaŭ lia menso sukcese solvis la problemon; por tio ni havas ja menson.

Ibrahim alvenis posttagmeze, timplena, kredante ke Cicilio estas malsana. Kiam li vidis ŝin sana, li subite reĝojiĝis; li ridis kaj ŝercis kun ŝi; kaj tio faris eĉ pli malfacila la eksplikon.

Tamen, post kelkaj vanaj provoj, ili sukcesis fiksi lian atenton, kaj ili balbute klarigis, ke ili amas unu la alian, kaj volas geedziĝi.

Komence, li ne komprenis, kaj pensis, ke ili ŝercas.

»Bonege,« li diris, »kaj mi prenos kvar egiptajn virinojn, por pravigi la anglan opinion, ke ĉiu egipto havas kvar edzinojn!«

Sed fine ili konvinkis lin; li sidis, rigardante konsternite, senforte, de unu al la alia. Sekvis klarigoj, pluaj, bedaŭroj, sinakuzoj, kredvolaj asertoj, ke ĉio estas bona. Ibrahim plejparte silentis; li okule esploris la vizagon de Cicilio por trovi la kialon por tiu ĉi mondfenda katastrofo; je unu momento li ploris. Ce tio Garvin ekstaris kaj iris rigardi el la fenestro; li sentis, ke Ibrahim falas tro malalten sub la nivelo de »blankulo«. Momente, Garvin sentis preskaŭ vomemon;

momente lia menso jam ne povis rekapti la solvon de la problemo, kiun tiel sukcese ĝi solvis matene.

Tamen, Garvin devis konfesi, ke Ibrahim entute agis kiel »blankulo«: kio egalas la laŭdon, ke »oni tenas rekta sian batilon.« Li ne kriis, li ne sakris, li ne riproĉacis, li ne insultis; dum la tuta intervjuo li diskutis la aferon racie.

Estis vere, ke dum la lastaj kelkaj monatoj, li iom perdis en Beni-Suef sian anglecon; lia parolado de angla lingvo estis idiome iom malpli perfekta; li parolis mallaŭte kaj, kiam la emocio ne mutigis lin, komencis repreni la mondkomprenon de la ordinara egipto, kiu estas eĉ pli naiva ol tiu de la Oxford-a universitatano; li kutimis porti en la domo piĝamon anstataŭ ordinaraĵ vestoj. Sed por li la ĉefa afero en la vivo, kiu donis al li ian eminentecon, estis ĝuste lia angleco; tio sola donis al li prestiĝon, distingis lin de la aliaj egiptoj. Kaj pli entuziasme eĉ ol en Anglujo li kroĉis sin al siaj anglaj idealoj kaj al sia angla pipo.

Li rekonis, ke en tiu ĉi katastrofo li devas montri sin komprenema, trankvila, grandanima, kiel decus ĉe anglo. Li luktis, kaj en la lukto li forgesis, ke estas ĝuste anglo, kiu lin perfidis. Li luktis; kaj venkis; kaj la malvarma ĉagreno ĉe lia koro mildigis momente, kiam Garvin diris al li, tute sen ironia intenco, »Dan-kon, Ibrahim, vi estas blankulo'. Ni sciis, ke vi komprenos«.

Estis decidite, ke Ibrahim permesos al Cicilio eks-edzigi lin; laŭ la angla ideala kodo, oni ne povas permesi, ke virino estu akuzita pri malmoraleco. Inter-tempe, estus plej bone, ke Cicilio iru al Anglujo, kaj tie fari la proceson, por eviti skandalon en Egiptujo.

La proksiman matenon Ibrahim reiris al Beni-

Suef, kaj al sia familio, kaj al la senfine ripetota frazo :
»Nu, kompreneble, se vi insistas edziĝi kun fremda virino, anstataŭ kun kuzino...« Garvin kaj Cicilio havis ankoraŭ kelkajn tagojn en sia dolĉa nova mondo, kaj tiam ankaŭ ŝi foriris al Aleksandrio, kaj al Anglujo.

Ili longe kisis unu la alian sur la kajo, spite la hordojn da portistoj, ĵuris skribi ĉiutage, kaj aranĝis, ke la proksiman someron Garvin reiros al Anglujo por la edziĝo.

*

»Post ŝia foriro,« diris Garvin, »ni longe skribis unu al la alia. Sed kiam ni estis apartaj, ni ŝajnis malpli taŭgaj unu por la alia. Efektive, la afero estis jam finita antaŭ ol mi iris al Anglujo por la libertempo. Mi preskaŭ falis en edziĝon, ĉu ne?«

Jes, tion oni povas supozi: sen la varma, parfuma proksimeco, sen la sekreta interparolado de korpoj dum longaj noktoj, la kuneco ŝajnis malpli »taŭga«. Kreskanta malvarmeco en la tono de liaj leteroj; plendoj, vekrioj en ŝiaj; fine, la vire firma anonco, ke oni devas rigardi la aferon racie, kaj ne riski la fiaskon de du vivoj; momenta emocio en orienta lando ne estas sufiĉa bazo por tutviva rilato. Lasta letero ŝia, kompatige senriproĉa; kaj fino.

Finita kaj enterigita; ĉi foje definitive.

*

»Kio okazis al Ibrahim?« mi demandis al Garvin.

Li iomete tiris la ŝultrojn. »Oni diris al mi, ke li iom egiptiĝis,« li respondis.

Jes, li iom »egiptiĝis«; tion mi sciis. Car mi konis Ibrahim-on, li estis unu el miaj amikoj; mi sciis lian historion, nure mi ne sciis la nomon de la angla amiko, pri kiu li kelkfoje kolere aŭ blasfeme plendis,

Efektive, li »egiptiĝis«. Post la foriro de Cicilio, rompiĝis la ligo inter li kaj la angloj; ne estas eble por egipto, eĉ el Oxford, frekventi anglojn en Egiptujo. Li malofte parolis angle, kaj grade la vortoj ŝajnis perdi sian signifon, la frazoj estis malplenaj. Li faris sian laboron en la oficejo, malrapide, trinkante multajn tasojn da kafo kaj fumante multajn cigaredojn; li mokis la kelkajn entuziasmulojn, kiuj volas reformi kaj modernigi la egiptojn. Li komencis promeni en la malvarmeta vespero en sia piĝamo, kiel aliaj egiptaj civitanoj. Kaj en la lastaj jaroj mi ofte vidis lin vespere sur la teraso de kafejo, vestitan en galabijo, kun fezo; kiam li vidis min, li mallerte kvazaŭstaris, kaj skizis tiun fingrotuŝon al brusto kaj frunto, per kiu la egiptoj salutas siajn konatojn. Li egiptiĝis; sed kiam li promenis publike, li ĉiam tenis inter siaj dentoj sian anglan pipon: almenaŭ tion li konservis el sia restado en Anglujo, el sia angleco.

•

La sunsubiro atingis nin kun la kutima subiteco; estis jam preskaŭ mallume, kaj oni apenaŭ povis vidi la ludantojn marŝantajn for de la kampo. Ni levigis por foriri.

»Kion vi pensas pri la ludo?« diris Garvin. »Bona, ĉu ne?«

Kaj mi devis rapide serĉi ĝeneralan frazon, kiu ne perfidu la fakton, ke mi tute ne atentis la ludon de kriketo, kio estas krimo apenaŭ pardonebla.

Listo de Vortoj kaj Specialaj Esprimoj netroveblaj en la Plena Vortaro dua eldono

Adolto: maturulo, plenkreskulo.

Agnostikismo: doktrino, kiu deklaras, ke la absoluto estas nekonebla de la homo.

Aprezi: kompetente taksi la artan valoron de io.

Bakŝiŝo: trinkmono; rabato; ĉio donita senpage; kromaĵo; subaĉeta donaco.

Bebo: infaneto.

Bejo: egipta rang-titolo, inter paŝao kaj efendio.

Berbero: ano de la dezertaj triboj, loĝantaj en Norda Afriko kaj en la Norda Sudano.

Canti: muzika formo, uzata en preĝejoj, en kiu oni kantat kelkajn vortojn en monotono antaŭ ol ŝanĝi la noton.

Drogmano: gvidisto por turistoj en orientaj landoj.

Dueno: virino, kutime maljuna kaj edziniĝinta, kiu akompanas fraŭlinon publike.

Efendio: egipta titolo, ekvivalenta al »sinjoro«; ĝenerale, ĉiu egipto portanta eŭropajn vestojn.

Eksppekti: supozati aŭ kredi, ke io okazos.

Eseo: mallonga, senpretenda studo pri moroj, literaturo, k. s.

Etoso: spirito de la loko; psikologia atmosfero.

Fantasta: fantaziega, kaprice groteska.

Felaho: egipta farmisto aŭ kamparano.

Feroĉa: kruele kaj kolere atakema.

Floti: resti sur la surfaco de akvo sen enprofundiĝi.

Galabijo: egipta ĉiutaga robo, tre simila al malnovmoda eŭropa noktoĉemizo.

Gracila: gracie, bele sin movanta.

Gvati: 1. kaŝobservi, ŝtelatendi; 2. deŝore observi.

Hadeso: laŭ greka mitologio, infero.

Hasta: ekscitiĝi aŭ time rapidema.

Hurio: belulino de la mahometana paradizo.

Harti: albatigi al, puŝuŝegi, karamboli kun.
Inicialo: unua litero de nomo aŭ titolo, staranta sola en mallongigoj.
Inocenta: puranima; neniel konscia la malbonon; sen-kulpa.
Junona: ĉe virino, timige bela, imponega.
Jazo: fortitma usona dancmuziko, el negra deveno.
Kakia: havanta verde brunan koloron, similan al tiu de uniformoj en la brita kaj usona armeoj.
Kihota: grandanime batalema kontraŭ himeroj; strebanta al iu inda celo, tute forgeseme pri la propraj interesoj.
Kontempli: longe kaj medite rigardi.
Konversi: interparoladi amike.
Kopto: moderna egipto, kiu kredas sin ido de la antikvaj egiptoj kaj estas ano de la kristana Kopta Eklezio.
Lisolo: likva malinfektigilo fabrikita el kreozoto.
Mango: tropika frukto (de arbo el la anakardiacoj).
Miliemo: monero, unu milono de egipta pundo.
Morna: malĝoje premata; preme malgajiga, malhela.
Nubio: neklare difinita teritorio inter Egiptujo kaj Sudano, kiun enloĝas triboj el deveno araba, berbera kaj negra.
O: parola signo de alparolo; signo de vokativa kazo.
Obŝkura: malklara, malluma, malhela.
Oftalmio: inflama malsano de la okulo.
-oza: sufikso signifanta »plena je«.
Paŝao: plej alta egipta rangtitolo sub princo.
Paŭti: malbonhumorigi la vizaĝon, malkontente silentadi.
Piastro: egipta monero, unu centono de egipta pundo.
Pundo: mona unuo, unu funto sterlinga (egipta pundo proksimume egalas anglan pondon).
Pugo: sidvango (familiara).
Sinki: malrapide malsupreniri, fali, retenate de la resto de ŝancelita ekvilibro aŭ de la denso de la medio.
Spekti: rigardi kaj aŭskulti (en teatro, k. s.).
Stuporo: malkota aŭ malsaneca sensobtuzezo.
Suspiri: sopire, malgaje, sensargiĝe ĝemspiri senvoĉe.
Sejho: mahometano tre klera pri la Korano; araba tribestro; ĝenerale, klerulo religia.
Taksio: surstrate vaganta lu-aŭtomobilo.
Triktrako: ludo kun damoj kaj ĵetkuboj, ludata sur speciale markita tabulo (angle *backgammon*, france *trictrac*).

Prononco de Arabaj kaj aliaj Fremdaj Vortoj, Frazoj kaj Nomoj

Por lingvemuloj estas aldonitaj sube la prononco kaj akcentado de la fremdaj vortoj trovataj en la teksto. La montrita prononco, pro la manko de diversaj sonoj en la eŭropaj lingvoj, estas nur proksimuma.

Specialaj rimarkoj: 1. La akcentita silabo estas presita per kursivoj. 2. Duoblaj konsonantoj estas duoble prononcendaj. 3. La litero *h* estas ĉiam prononcenda (kun la sola escepto notita sub 4), eĉ antaŭ konsonanto. 4. La kombino *gh* signas gorgĉan frikativan *r*; similan sonon oni aŭdas anstataŭ la trila *r* en la franca parolo de Parizo kaj en diversaj germanaj dialektoj (kp. la nordgermanan prononcon de *g* en *sagen*). 5. La litero *q* signas sonon kiu similas la sonon *k* prononcatan profunde en la gorgĉo; tamen, en Egiptujo, ĝi kutime malaperas, kaj ĝin anstataŭas momenta fermo de la gorgĉo aŭ spirreteno. 6. La cirkonfleksa akcento super vokalo montras, ke ĝi estas prononcenda naze, kiel en la franca lingvo. 7. La signo * staranta antaŭ vokalo montras, ke la vokalo estas prononcenda profunde en la gorgĉo. 8. La litero *o* montras la neklaran vokalon aŭdatan en la franca *peu* kaj la angla *her*.

VORTOJ KAJ FRAZOJ

Aleĵkam es-salam: (paco estu sur vi) **aleĵkam es-salam.*

Allah fi: (Dio tamen ekzistas) *allah fi.*

Ana meskin: (mi estas malriĉa) *ana meskin.*

Bachot: (franca slango: plej malalta universitata titolo) *baŝo.*

Balaŝ kalam: (ĉesigu parolon) *balaŝ kalam.*

Ce monsieur: (franca: tiu sinjoro) *sŝ msjŝ.*

Effendi: (turka: edukito, sinjoro) *effendi*.
Effendija: (kolektiva substantivo por efendioj) *effendija*.
Effendim: (vokativa de *effendi*) *effendim*.
El-Hamdulillah: (dankon al Dio) *el-hamdulillah*.
El-kelb el-nasrani: (kristana hundo) *el-kelb en-nasrani*.
Ezajak: (kiel vi?) *ezajak*.
Ghaffir: (polica noktogardisto) *ghaffir*.
Hadr: (bone, preta) *hadr*.
Hat ezaz: (donu vitraĵon) *hat ezaz*.
Ibni kelb: (hundido) *ibni kelb*.
Inti mabsuta delŭa'ti: (vi estas kontenta nun) *inti mabsuta delŭaqti*.
Ja baša: (O paŝao) *ja baša*.
Ja bej, Allah ĵitaŭil omrak: (O bejo, ke Dio longigu vian vivon) *ja bej, Allah ĵitaŭil omrak*.
Ja hadritak: (via moŝto) *ja hadritak*.
Ja salam: (O paco, t. e. Ĉu vere! Nekredeble!) *ja salam*.
Ja sidi: (O moŝto) *ja sidi*.
Kafa'a: (unua publika ekzameno de la duagrada lernejo) *kaf*aa*.
Kunkan: (usona kartludo, nomata angle *rummy*) *kunkan*.
Ma'aliŝ: (estas sur ĝi nenio, t. e. negrave, pardonu) *m*a-aliŝ*.
Maman: (franca: panjo) *mamá*.
Mfodlak: (mi petas, se plaĉas al vi) *mfodlak*.
Molohija: (speco de glutena supo) *molohija*.
Noblesse oblige: (franca: la nobleco kunportas ankaŭ devojn nobles obliĝ).
Rabuna ĵigazik: (Dio rekompencos vin) *rabuna ĵigazik*.
Rabuna ĵihalik: (Dio longigu al vi la vivon) *rabuna ĵihalik*.
Saidah: (feliĉon!) *s*aidah*.
Salam alejkum: (paco estu sur vi) *salam *alejkum*.
Sir, Sir, I know: (angle: Sinjoro, sinjoro, scias mi) *ső, aj noŭ*.
Sofragi: (kelnero, tabloservisto) *sofragi*.
Ŝil el-ŝanta guŭa, ŭa ĝibha andi: (portu la kofron internen, kaj donu ĝin al mi) *ŝil eŝ-ŝanta guŭa ŭa ĝibha *andi*.
Uallahi: (je Dio) *ŭallahi*.
Ua omrak: (respondo al Allah ĵitaŭil omrak: Kaj vian ŭa omrak).

NOMOJ

- Abdallah Abd el-Rihim*: *abdallah *abd er-rihim.
Abd el-Aziz Mahmud el-Bedaüi: *abd el-*aziz mahmud el-bedaüi.
Abd el-Hamid: *abd el-hamid.
Aghurmi: aghurmi.
Ali Abd el-Aziz Mahmud: *ali *abd el-*aziz mahmud.
Ali Ford: *ali ford.
Aziz: *aziz.
Aziz Abd el-Hamid: *aziz *abd el-hamid.
Badia Mesabni: badi*a mesabni.
Beni Suef: beni suef.
Bourse Egyptienne: (francilingva ĵurnalo: Egipta Borso) burs ejipsien.
Cape Town: (angle: urbo de l' promontoro, en Sud-Afriko) kejp taŭn.
Compiègne: (franca urbo) kôpjenj.
Egyptian Gazette: (anglalingva ĵurnalo: Egipta Gazeto) iqipsan gazet.
Farag Effendi: farag effendi.
Fatma Muhammad: fatma muhammad.
Felton: felton.
Fuad Abd el-Aziz Mahmud: fuad *abd el-*aziz mahmud.
Gezira: gezira.
Ghobrial Nesim: ghobrial nesim.
Hasan: hasan.
Helmi: helmi.
Henriette Molard: ôriet molar.
Husejn Abd el-Aziz Mahmud: husejn *abd el-*aziz mahmud.
Ibrahim Abd el-Karim: ibrahim *abd el-karim.
Lutfi Mahmud: lutfi mahmud.
Mahmud Ali Maher: mahmud *ali maher.
Medina el-Sughajarah: medina es-sughajarah.
Mersah Matruh: mersah matruh.
Moamed: (franca misprononco de Muhammad) moamed.
Muhammad: muhammad.
Muhammad Abd el-Rahman: muhammad *abd er-rahman.
Muhammad Ali: muhammad *ali.
Nasr: nasr.
Nigma Jusef: nigma jusef.
Nur: nur.
Oxford: oksföd.

Sajed Ali: sajed *ali.

Salah el-Din Abd el-Aziz Mahmud: salahaddin *abd el-
*aziz mahmud.

Sedki: sedqi.

Senusija: senusija.

Siia: siia.

Suliman: suliman.

Uadi Sial: ūadi sial.

Zagazig: zagaziq.

TABELO DE ENHAVO

I. Bakŝiŝ'	5
II. Edzig-propono	7
III. Respektinda Sinjorino	26
IV. La Juro de Piulo	33
V. Ali Ford	54
VI. La Svatanto	66
VII. Ekzilito	81
VIII. Tragedio	92
IX. La Nomado	109
X. La Kriket-Ludo	112
Listo de Vortoj kaj Specialaj Esprimoj ne- troveblaj en la Plena Vortaro, dua eldono	143
Prononco de Arabaj kaj aliaj Fremdaj Vortoj, Frazoj kaj Nomoj	145